MEGYEI TANÁCS

37-28

F/330

HUNGARA VIVO

I
1980
11,– Ft

VIZITU NIAJN FAKVENDEJOJN „ELEKTRON"!

Magazeno ELEKTRON

1067. Budapest, VI. Lenin krt.77.
Telefono: 324-399, 129-682

Magazeno de Elementoj ELEKTRON

1065. Budapest, VI. Bajcsy-Zsilinszky u.45.
Telefono: 327-191, 321-991

Elektroakustika Fakvendejo ECHO-ELEKTRON

1065-Budapest, VI. Bajcsy-Zsilinszky u. 19/a.
Telefono: 117-698

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193, H–1368
Aperas dumonate
XXa jaro, 1980 n-ro 1
(89)

ENHAVO

Sugár, A.: Intervjuo kun Imre Pozsgay, ministro pri kulturaj aferoj 2
Abonyi-Nagy, Á.: La kooperativoj kaj la internacia lingvo 4
Kapitány, L.: Herend 6
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 13. (VHZS) 8
Torda, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo (*Rados*, P.A.) 10
Vörösmarty, M.: La maljuna cigano (K.*Kalocsay*) 12
Todorov, Ĉ.: Muzeo de amikeco 12
Tóth, E.: Pordoj 13
Gergely, M.: Cu vi konas la kvarkon? 14
Jevtusenko, J.: Ravado (*Rados*, P.A.) 15
Benczik, V.: Rolo de lingvo kaj literaturo en la formiĝo de la Orient-Eŭropaj nacioj 16
Beekman, V.: Lumo de Orienta Eŭropo (*Fragmento*) 18
Gergely, M.: Ligno-skulptarto en Hungario 19
Farkas-Tatár, Ê.: Panoramo 20
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 23
Paĝo de komencantoj *(El Amuzaj dialogoj* de A. *Lienhardt)* 25
D-ro László, F.: Budapeŝto, urbo de banejoj (E.*Fenyvesi*) 26
Bálint, Sz.: La mistera fraŭlino 34
Golden, B.: Traduttore – traditore 35
E.F.: Gaja paĝo 36
Recenzoj de Clelia *Conterno*, V. *Benczik*, M. *Fejes* 37
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 39
Krucenigmo 39
Leterkesto 40

Sur la titolpaĝo: Sunbrila vintro en la montaro Mátra

Hungara Vivo komencas...

sian dudekan jaron per tiu ĉi numero. Tia evento atestas pri fripone juna aĝo ĉe fraŭlinoj, sed nepre estas signo de (almenaŭ laŭaĝa) matureco ĉe esperantista revuo. Dum la unuaj ok jaroj redaktis ĝin Lajos *Kökény*, kiu pli frue jam eternigis sian nomon per *Enciklopedio de Esperanto*, lin sekvis Mihály *Gergely*, kiu tiam jam havis malantaŭ si ampleksan hungarlingvan verkaron. La nuna redaktoro, farinta nenion vere atentindan antaŭ ol ekredakti HV, tiklas la nervojn de la legantoj depost du jaroj, kaj nur la Senkorpa Mistero kaj la Estraro de HEA scias, ĝis kiam ankoraŭ...

Staru ĉi tie kelkaj ciferoj, kiuj montras la dimensiojn de la pasintaj 19 jaroj. Dum tiu periodo aperis 88 numeroj de HV (nur unu duobla numero en 1961) sur entute 2912 paĝoj. Ĉar sur unu revua paĝo presiĝas ordinare tri manuskriptaj paĝoj, la ĝis nun aperintaj numeroj egalas literaron de ĉ. sesdek 150-paĝaj libroj. Ni kredas, ke tio estas solida kontribuo al la celoj de la internacilingva kulturo, eĉ se ne ĉiuj aperintaj kontribuaĵoj atingis Parnasajn altojn.

HV komencis sian vivon kiel kvaronjara revuo, kun 132-paĝaj jarkolektoj. Nun la amplekso de unu jarkolekto estas preskaŭ duobla: 240 paĝoj.

Tiu nia evoluo ne eblus sen la atento, kiun donas al ni niaj fidelaj abonantoj, kies nombro daŭre plimultiĝas. HV havas indan donacon ankaŭ por sia dudekjariĝo: grave kreskis la abonantaro en Sovetio, kaj nun ĝia nombro jam superas 1000! La Redakcio aparte salutas tiujn plurajn centojn de sovetaj esperantistoj, kiuj nun fariĝis niaj abonantoj, petante ilin helpi nian redaktan laboron per letera alsendo de sia opinio pri la revuo.

En tiu ĉi numero oni trovas intervjuon kun la ministro pri kulturo de Hungario, Imre *Pozsgay*, kiu parolas eble iom eviteme pri la lingva problemo. Sed tio montras, ke restas ankoraŭ multo farenda...

Por tiuj, kiuj volas riĉiĝi, la artikolo de L. *Kapitány* malkovras la sekreton de porcelanfabrikado, dum ŝokiĝemaj filologoj havos bonan okazon ŝokiĝi pro la traduko de la poemo *La maljuna cigano* de Mihály *Vörösmarty*. (Tamen, ĝuste la ĉi-numere aperantaj rememoroj de *Gergely* atestas, ke la ioma modifo de la traduko de *Kalocsay* estas almenaŭ ne kontraŭa al la spirito de la forpasinta grandulo de nia tradukarto.)

Longa artikolo prezentas la kontaktojn de la kooperativa kaj esperantista movado, aperas ISU-prelego pri la rolo de lingvo kaj literaturo en la formiĝo de la orient-eŭropaj nacioj, bela ampoemo de Jevgenij *Jevtušenko*, iom malserena originala novelo de Endre *Tóth*, kaj ekas la rubriko *Paĝo de komencantoj*. Eble iom miksa enhavo, sed almenaŭ ne monotona, kiel certe estis tiu ĉi enkonduko.

„Oni devas konvinki la homojn, ke indas...”

Ni publikigas iom koncizigitan intervjuon faritan de András Sugár, kunlaboranto de la Hungara Televido kun ministro pri kulturaj aferoj de la Hungara Popolrespubliko, Imre Pozsgay. La tuta teksto aperis en la hungarlingva revo de la Hungara Esperanto-Asocio „Világ és Nyelv” (Mondo kaj Lingvo).

– *Kiel Vi opinias pri la fremdlingvo-scio de la hungara popolo?*

– Laŭ miaj spertoj kaj laŭ la statistiko ĉe ni malmultaj parolas fremdajn lingvojn, tre malmultaj, se ni konsideras, kiom tio iĝis necesa en la lastaj kelkaj jaroj. Hungario tutmonde estas konata, kiel klasika ekzemplo de tio, ke en lernejo ne eblas ellerni lingvojn. Unu el miaj eksterlandaj konatoj diris: „La hungaroj tiel malmulte scias fremdajn lingvojn, kvazaŭ ili estus granda nacio”. Tio estas nepermesebla lukso. En nia lando la instruado de fremdaj lingvoj havas grandajn tradiciojn, sed la kono de la eksterlandaj lingvoj malhavas la samon.

– *Ĉu vi konas la aserton de la libro de multlinga tradukistino-interpretistino Katarina Lomb „Tiel mi lernas fremdajn lingvojn”, ke „el inter 113 gelernantoj, cetere bone konintaj la deklinaciojn, konjugaciojn kaj la vortojn, entute kvar kapablis senerare peti glason da akvo ruslingve”?*

– Jes. Tio aludas evidente tiujn malmovemon kaj mallertecon metodikajn per kiuj ĉe ni oni instruas fremdajn lingvojn. Oni ne povas kompreni al la homoj, ke la lernadon de fremdaj lingvoj postulas ilia propra intereso, ke tion ili ege bezonas. Kaj oni ne povas lernigi al la homoj la grandan plezuron de la rekono, tiun de la scio. Restas nur suferoj kaj turmentoj. Laŭ konceptoj ĉe ni tre disvastigitaj lernado de fremda lingvo estas tiel granda peno, kian oni ne povas entrepreni. Multaj konsideras ĝin afero tute senespera, kaj eĉ ne komencas ĝin.

– *Subjektiva demando: kiujn eksterlandajn lingvojn Vi lernis?*

– Entute tri, el ili mi scias unun: mi parolas ruse. Ĝin mi ellernis en la universitato, Hungarlande, sed en escepte favoraj kondiĉoj kaj cirkonstancoj. Ili estis esceptaj, ĉar mi havis la eblon lerni intensive kaj povis alproprigi la lingvon de homoj tre kompetentaj. Krom tio en la tiel nomata „civitana lernejo” antaŭmilita – kiam mi estis de dek ĝis dekkvar jara – mi lernis la germanan. Mi rememoras pri tio, ke la lernado estis pena laboro, sed ĝi lasis en mi ne tro multon... Kaj eĉ se tio sonas iom strange, nun, aĝante 46 jarojn, mi decidis ellerni la anglan.

– *Ĉu vi delonge lernas?*

– Nur antaŭ duonjaro mi decidis pri tio, kaj feliĉe, mi trovis bonegan instruiston, kiu estas tre severa kun mi. En la lernado malestas indulgo. Sed samtempe tio estas por mi feliĉo, ĉar la horoj pasigitaj kun li estas ekscitaj, interesaj. Li instruas tre bone. Sed tio estas afero de bonŝanco, kaj ne estas permeseble, ke la lingvoscio dependu de tio.

– *Vi ofte traktas eksterlande kaj ankaŭ en nia lando multfoje akceptas eksterlandajn gastojn. Ĉu kaŭzas al vi problemojn la „Babelo de la mondo”?*

– Miaj profesio kaj taskoj eksterlandaj estas tiaj, ke mi bezonus laŭeble perfektan precizecon, preskaŭ artisman interpreton. Kaj ege min embarasas, se mi iam renkontas ĉe la interpretistoj sintenon alian. Ĝenerale mi havis bonŝancon, ricevinte bonegajn interpretistojn kaj tradukistojn. Despli estas memoreblaj la malagrablaj eventoj. Okazis ekzemple, ke alvenis gasto, kaj mi demandis, kiel li fartas. La interpretisto ne tradukis la demandon, sed respondis: li dankas, bone. Do, tiu interpretisto transprenis la rolon de la gasto en la konversacio...

Ministro Imre Pozsgay kun raportisto András Sugár

– *Ĉu Vi renkontis en la landoj de tiel nomataj „grandaj” lingvoj ekzemplojn de la lingva ŝovinismo?*

– Mi ne estis ankoraŭ ministro, kaj vizitis Parizon por studi la laboron de la Nacia Kunveno de Francio. Min helpis bonega interpretistino hungara, kiu parolas la francan same bone, kiel la gepatran. Ŝi foje babiladis kun la damo, gvidanta nin en la biblioteko de Palais Royal (Reĝa Palaco). Sed subite mi priatentis iom nervozan interparolon, kaj mia helpantino petis min, ke ni foriru, ĉar oni ofendis nin. Evidentiĝis, ke nia „dommastrino” demandis de la interpretistino, kiun ŝi verŝajne konsideris francino: „Ĉu la sinjoro parolas ankaŭ iun homan lingvon?” Bedaŭrinde, tiu ĉi historio estas iom karakteriza, ĉar iuj anoj de grandaj nacioj pensas pri aliaj lingvoj, ke ili ne estas homaj...

– *Specialistoj pri kulturo, apartenantaj al Via Ministerio – aktoroj, reĝisoroj, bildartistoj, ktp. – en la internaciaj rilatoj kiomgrade kapablas reciproke komuniki kun siaj kolegoj?*

– Nia tereno havas homojn, parolantajn bone fremdajn lingvojn, eĉ kelkajn, kiuj parolas ilin samnivele kun la gepatra. Ili troviĝas ĉe ni pli multnombre ol en aliaj kampoj de la vivo. Ĉio ĉi estas ligita kun iliaj profesioj,

Subskribo de interkonsento pri aŭtoraj rajtoj fare de Imre Pozsgay kaj Boris Pankin, prezidanto de la Oficejo por Protektado de Aŭtoraj Rajtoj en Sovetio

Imre Pozsgay, ministro pri kulturaj aferoj malfermis la Someran Universitaton 1979, en Debrecen

kun iliaj artoj. Tamen mi suspektas, ke el ili multnombre veturas eksterlanden ankaŭ homoj, kiuj pri la vizitita, spertita mondo povas fari al si bildon tre palan, ĉar ili ne povas kontaktiĝi kun tiu socio, kun tiu medio, en kiu ili alvenis. Nature, parto el ili estas laborantoj. La muzikisto, la kantisto veturante eksterlanden, plenumas noblan taskon por la lando, kiu lin gastigas. Li donas ion al la tiea publiko, sed tiu mondo ne tro multe povas doni al li verajn travivaĵojn kaj spertojn, ĉar li ne posedas sufiĉe da lingvoscio por kompreni tion.

– Inter laborantoj de la kulturo malmultaj parolas sufiĉe bone ekzemple la rusan kaj la anglan. Sed ĉu sufiĉus por ili paroli iom bone du fremdajn lingvojn?

– Mi jam estus dankema al la sorto, se granda parto de ili parolus almenaŭ unu solan mondlingvon. Du mondlingvoj, kiel minimuma programo – mi pensas – estos postulebla de la sekvaj generacioj. Ekzistos profesioj, kie estos necese ellerni eĉ du-tri lingvojn por pliigi la profesiajn konojn, por studi la literaturajn fontojn kaj la gazetaron de la mondo. Kompreneble, ĉar apud ĉiu ne povas stari interpretisto, por la spiritaj bezonoj de ĉiu ne eblas trovi arttradukiston.

– La loĝantoj de tiaj landoj, kiel nia patrio, havas malfacilaĵojn, devenantajn de tio, ke ili devas komuniki kun la ekstera mondo pere de kelkaj privilegiaj lingvoj, tiel nomataj mondlingvoj . . .

– El la malavantaĝa stato oni povas eliri nur tiel, se niaj sampatrianoj tre bone ellernos tiujn lingvojn, sekve necesas lerni. Sed eblas forigo de tia situacio ekzemple, se oni parolas artefaritan lingvon, kiu estas la gepatra lingvo de neniu. Tiamaniere ambaŭ flankoj troviĝas sur la sama nivelo de la komunikado. Mi multe pensis: ĉu ekzistas veraj ebloj por krei kaj – ĉefe – disvastigi tian komunan lingvon, pere de kiu la homoj multe pli facile povus kompreni unu la alian. Pri tio mi ne havas proprajn spertojn, sed ankaŭ en mi vivas deziro pri tio. Eble tia idiomo estas Esperanto, kiun mi persone ne parolas.

– Ĝia gramatiko estas senescepta, tial facile lernebla . . .

– Tio estas beno por la lernantoj. Sed la lernado de tiu lingvo havus veran sencon tiam, se la grandajn naciojn oni povus konvinki, ke ili lernu Esperanton. Ĉar ankaŭ kun ili oni devas komuniki, same kiel la malgrandaj nacioj inter si; mi ĉi tie vidas la plej grandan malhelpon en tio, ke la homoj cerbumas: ĉu indas lerni Esperanton? Oni do devas konvinki ilin, ke indas, ke ili ne iras en izolitecon, en malplimulton, kontraŭe: se ili ellernas Esperanton, antaŭ ili malfermiĝas la mondo, ili ricevas komunikilon. Sed ĉu estos jam tiom da esperantistoj, ke la homoj tiel pensu? Kompreneble, por tio ankaŭ la homoj devas ion fari.

– Jam antaŭ tri jaroj estis farita propono kun subskriboj fare de 140 deputitoj al la prezidanto de la Komisiono pri Kulturo de la hungara Parlamento. En la propono estis: oni faru subkomisionon en la kadroj de la Komisiono pri Kulturo kun partopreno de deputitoj kaj lingvistoj. La subkomisiono devus fari raporton pri lingvaj problemoj de la internaciaj rilatoj kaj pri iliaj eblaj solvoj. Ĝis nun okazis nenio. La Komisiono eĉ ne pritraktis la proponon, kvankam ĝin subskribis unu triono de la Parlamento. Kion eblos fari por ke la Komisiono pritraktu la proponon?

– Unuavice: oni devus respekti la parlamentan reglamenton, kiu devigas la Komisionon okupiĝi pri propono, se tiom da deputitoj subskribis ĝin.

– Eble, la Komisiono atendas kuraĝigon de la plenuma organo pri la kulturaj aferoj, t.e. de Via Ministerio.

– Mi pensas, ke ankaŭ ni povus ion fari. Ni atentigos la Komisionon pri la propono. Mi konfesas, mi ne sciis pri ĝi.

– Mi dankas Vin pro la intervjuo, kaj deziras al Vi multe da sukcesoj, bonan sanon por Via laboro.

András *Sugár*

La kooperativoj kaj la Internacia Lingvo

– En la spegulo de sep jardekoj –

Árpád Abonyi-Nagy

Dum la lastaj jaroj ĝojige ampleksiĝas la terenoj, en kiuj oni jam sukcese aplikas Esperanton, kiel lingvon de la praktiko. El inter tiuj certe estas konataj ankaŭ la klopodoj, kiuj celas utiligi nian lingvon en la internaciaj kontaktoj de la kooperativa movado. Krom la grandsignifa alvoko de la brita TUCEG, vekis grandan intereson ankaŭ kontrakto pri larĝskala kunlaboro inter la kooperativoj de la bulgara Kubrat kaj la hungara Várpalota. Tiutempe nia gazetaro, inter ili ankaŭ „Hungara Vivo" (5-a n-ro en 1978) detale raportis pri la evento. Tiuj informoj pri la lastatempaj iniciatoj direktis la ĝeneralan atenton al la historio de tiuj kontaktoj, kiuj formiĝis inter la kooperativa kaj Esperanto-movadoj dum la preskaŭ centjara historio de nia lingvo. Kompreneble en la kadro de mallonga artikolo oni povas doni nur la skizon de la temo, kiu cetere tute ne estas kompleta, ĉar dum la du mondmilitoj multe da valoregaj indikoj perdiĝis, neniiĝis; tamen la mallonga historia trarigardo certe akcelos la disvolviĝon de pluaj kontaktoj inter la du mondskale gravaj movadoj.

Britoj iniciatis

La penso pri apliko de Esperanto en la kooperativa movado aperis tuj post la Unua Kongreso. Jam en la sekvonta jaro, en 1906, dum la kooperativa konferenco en urbo Liverpool renkontiĝis unue kvar esperantistaj kooperativanoj, kiuj decidis fondi Esperanto-Ligon Kooperativan. Ili elektis kiel prezidanton A. H. Holt kaj laŭ lia alvoko tuj aliĝis al la Ligo rusoj, francoj, germanoj kaj nederlandanoj.

La sciigo pri fondiĝo de la Ligo baldaŭ atingis ankaŭ Hungarion, kie laŭ la organiza laboro de József Tosch, ankaŭ hungaroj grandnombre aliĝis al la Kooperativa Ligo. La iniciato trovis entuziasman apoganton ankaŭ en Pollando, kie Edward Milewski en la kooperativa revuo de Lvovo skribis artikolojn pri la neceso kaj utileco de Esperanto por krei kaj evoluigi la internaciajn kontaktojn de la kooperativoj.

La konstato meritas apartan atenton, ĉar la Internacia Alianco de la Kooperativoj fondiĝis ankoraŭ en 1895, sed la interŝtata organizaĵo signifas

Sur la bildo la tria estas Charles Bardsley, fondinto de la Brita Kooperativo-Ligo Esperanta inter la du mondmilitoj. Sur la bildo li transprenas honordiplomon de la Britaj Kooperativoj por sia 50-jara laboro

kontakton nur inter la gvidantoj de la landaj kooperativaj movadoj; kaj eĉ ĉi tiun kontakton dense trateksas konstantaj lingvaj malfacilaĵoj.

Nia unua Kooperativa Esperanto-Ligo baldaŭ eldonis ankaŭ oficialan revuon, la „Kooperativa Bulteno"-n, sed post la eksplodo de la unua mondmilito kune kun la Ligo ĉesis ankaŭ la revuo. Tiu nia unua Ligo estis reala iniciato ankaŭ finance; bone pruvas tion tiutempa sciigo, laŭ kiu post la ĉeso ĝi transdonis sian havaĵon al institucio „staranta proksime al la kooperativoj".

Post la unua mondmilito en la transformiĝinta Eŭropo, pro la malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj, la internacinivela renaskiĝo ankoraŭ longe atendigis sin. Sed en la naciaj kooperativaj movadoj la tiurilataj klopodoj vivis plu, kaj por rekomenci ĝin ili atendis nur la elformiĝon de pli favora ekonomia situacio.

Esperanto-kurso en polaj agraraj kooperativoj

Inter la unuaj estis la Laborista Kooperativo de Lublin, kiu okaze de sia 10-jara jubileo eldonis raporton en 1923, en kiu ni trovas ankaŭ esperantlingvan resumon pri ilia 10-jara laboro. En la sama jaro ankaŭ SAT turniĝis kun granda intereso al la kooperativaj aferoj. En multaj altnivelaj eldonaĵoj, per efikaj argumentadoj ĝi alvokis la atenton de sia anaro, kaj instigis ilin propagandi Esperanton inter la kooperativanoj.

Alia interesaĵo de la dudekaj jaroj estis iniciato en Ĉeĥoslovakio, pri kiu ni povas legi en la verko de János Szabó: *Internacionalisták Kirgizföldön* (Internaciistoj en Kirgizlando). Komunistoj en Ĉeĥoslovakio fondis metiistan kooperativon kaj la 29-an de marto en la jaro 1925 ili transloĝiĝis en Sovetion. La nomo de tiu kooperativo estis *„Interhelpo"*. Mem la nomo de la kooperativo konvinke pruvas, ke en la konscio de la tiama laborista movado vigle vivanta estis la penso pri la kontakto inter la du movadoj.

Sub titolo *„Konsumkooperativa movado en Finnlando"* la Societo de la Finnaj Kooperativoj eldonis esperantlingvan libreton en 1927. En la sama jaro okazis Internacia Kongreso de la Kooperativa Federacio en Stockholm. Tie Edmond Privat, reprezentanto de la Svisaj Kooperativoj proponas enkonduki Esperanton, kiel nepre necesan internacian lingvon en la kooperativan movadon. Komence de la tridekaj jaroj la esperantlingva bulteno de la tiama *Bureau International de Travail* (Internacia Oficejo de Laboraferoj) levas la penson por efiktivigo.

ĈIELARKA STANDARDO
INTERNACIA KOOPERATIVA GAZETO
2-a Jaro Januaro-Februaro 1937 Nr. 1-2

El Nederlanda Kooperativa Movado:

SIDEJO DE CENTRA ASOCIO DE NEDERLANDAJ KONSUM-KOOPERATIVOJ EN HAGO

Titolpaĝo de „Ĉielarka Standardo", aperinta inter la du mondmilitoj

Post la malrapide plenumiĝinta moderiĝo de la granda ekonomia mondkrizo, kiu komenciĝis en 1929, la pola kooperativa movado faras energian antaŭenpaŝon. Por konstrui sur pli larĝaj fundamentoj la internaciajn kontaktojn, kaj certigi kooperativajn fakulojn kiuj parolas Esperanton, en la revuo de la pola agrarkooperativa movado ili komencis E-kurson en la jaro 1933.

Tradukita el Esperanto en la hungaran kaj francan

Preskaŭ samtempe kaj laŭ sama celo Charles Bardsley, pioniro kaj ankaŭ nun aktiva batalanto de la kontaktoj inter la kooperativoj kaj Esperanto, revivigis la antaŭmilitan britan iniciaton, fondinte Britan Kooperativo-Ligon Esperantan. En la junulara revuo de la britaj kooperativoj *„Our Circle"* (Nia rondo) ankaŭ li komencis E-lingvokurson. En la revuo li raportis pri la plej gravaj okazintaĵoj de la internacia kooperativa movado. Dum UK-oj en Stockholm (1934) kaj en Wien (1936) esperantistaj kooperativanoj kontaktiĝis kun svedaj kaj aŭstraj kooperativanoj kaj vizitis kooperativojn tiulandajn.

La ĉiam pli bunte disvolviĝinta kontakto inter la kooperativa kaj E-movadoj instigis ankaŭ polojn al pli novaj paŝoj. La esperantistoj de Varsovio akurate sentis la ĉiam pli favorajn cirkonstancojn, kaj per ĝusta antaŭsento estigis propran eldon-kooperativon, por certigi el ties profito la necesajn monrimedojn al la plua laboro. Unu jaron post la formiĝo de la eldona kooperativo ili jam aperigis la libron de Jan Wolski: *Ĉu ĝi estas nur fabelo?*, kiu estas la unua kooperativa pedagogia verko en nia literaturo. La libro rikoltis grandan sukceson kaj baldaŭ estis tradukita eĉ en du lingvojn. Jenő Kormos, redaktoro de tiutempe en Rumanio aperinta hungarlingva revuo *„Szövetkezés"* (Kooperado), tradukis la libron en la hungaran, poste la edzino de Edmond Privat en la francan.

Interkontinenta kooperativa revuo en Esperanto

La organizinto kaj gvidanto de la jam internacie signifa pollanda kooperativa E-movado estis Jam Zawada, kiu forpasis antaŭ kelkaj jaroj. Rezulto de liaj entuziasmaj klopodoj, kunlabore kun la polaj kooperativoj kaj kun la jam menciita eldona kooperativo, realiĝis la unua esperantlingva kooperativa revuo de nia historio, la *„Ĉielarka Standardo"* en la jaro 1936. Kiel redaktoro Jan Zawada gvidis la revuon kaj en la redakta komitato troviĝis ĉiuj batalantoj de la ideo: Edmond Privat, Charles Bardsley, Eric Fredin, Jenő Kormos kaj multaj aliaj. Sed en tiu tempo la ideo jam havis batalantojn preskaŭ en ĉiu lando, de Japanio ĝis Usono.

La *„Ĉielarka Standardo"* estis tre altnivela revuo kaj el lingva, kaj laŭ faka vidpunktoj. Krom kooperativaj teoriaj, historiaj kaj praktikcelaj artikoloj ĝi publikigis interesajn raportojn pri la laboro de diversnaciaj kooperativoj kaj gravaj eventoj. Ĝia bibliografia rubriko precize informis la legantojn pri la plej nova fakliteraturo, ke ajn ili aperis en la mondo. Bedaŭrinde la subtenon de tiu valorega revuo baldaŭ malebligis la ombro de la dua mondmilito; tial post la sepa numero ĝi ĉesis aperi. Ni rajte povas konstati pri nia unua kooperativa revuo, ke eĉ hodiaŭ ĝi povus servi kiel modelo, se eventuale iu havus emon revivigi esperantlingvan kooperativan revuon.

Bulgaraj kaj hungaraj heroldoj de la renaskiĝo

La intermilitaj klopodoj reviviĝis tuj post la dua mondmilito, en 1947, dum la Kongreso en Bern, sed nun la kooperativanoj organiziĝis sub la egido de UEA. La reorganizita kooperativa E-movado baldaŭ havis delegitojn en 8 landoj, la plenan disvolviĝon tamen malhelpis la eventoj de la malvarma milito en la monda politiko.

Pasis do 12 valoregaj jaroj, kiam Jan Zawada denove havis eblon komenci la reorganizadon. En 1959 dum la UK en Varsovio, laŭ lia propono renkontiĝis 18 malnovaj batalantoj por revivigi la kooperativan E-movadon. La 18 esperantistoj reprezentis sep landojn: Brazilon, Bulgarion, Ĉeĥoslovakion, FR Germanion, Hispanion, Pollandon kaj Svedion. Formiĝis organiza komitato, kiu elektis kiel prezidanton la svedan Eric Fredin kaj laŭ brazila propono ili decidis denove aperigi la revuon *„Ĉielarka Standardo"*. Kiel redaktoro estis elektita Jan Zawada, sed la reeldono bedaŭrinde ne povis efektiviĝi pro kaŭzoj ekster la povo de la esperantistoj.

Sed la penso pri la kontakto inter la kooperativoj kaj Esperanto vivis plu, kaj kiam niaj revuoj raportis pri la kunlaboro-kontrakto inter bulgara kaj hungara kooperativoj, unu post la alia venis leteroj de esperantistaj kooperativanoj, en kiuj ili ne nur salutis la eventon, sed proponis ankaŭ valoregajn kunlaborojn.

En la menciitaj leteroj venis tre interesaj, eĉ valoregaj konsiloj kaj spertoj. Jen unu el ili: František Patera, jam pensiumita prezidanto de ĉeĥoslovaka kooperativo rakontas pri tio, ke li kiel ano de la Landa Centra Kooperativa estraro, ofte vojaĝis oficiale en diversajn landojn, kaj malgraŭ tio, ke krom la gepatra li parolis nur Esperanton, la ricevitajn taskojn li solvis ĉiam sukcese per sia E-lingvoscio kaj per la helpo de esperantistoj en la vizititaj landoj. Hejmenveninte en siaj raportoj li ĉiam almontris al la utileco de E, kaj tiu estis la kaŭzo, ke ĉiam lin oni sendis solvi aferojn en eksterlando.

Nova ĉapitro malfermiĝis: kontrakto pri kunlaboro inter Hungarlanda Kooperativa Konsilantaro kaj Hungara Esperanto-Asocio.

Ununura paŝo, unusola sciigo sufiĉas, ke malnovaj kaj novaj esperantistaj kooperativanoj sin anoncu proponante siajn multdekjarajn spertojn al la reorganizado kaj por kunlabori en la plua evoluigo de la afero. Per tio ni jam atingis la nuntempon en nia tre skiza historia trarigardo.

La kunlaboro-kontrakto inter la Hungarlanda Kooperativa Konsilantaro kaj Hungara E-Asocio malfermas novan ĉapitron en la historio de la malnova klopodo. La penson, kiun antaŭ kaj post la unua mondmilito entuziasmaj esperantistaj kooperativanoj klopodis venigi al sukceso, en Bulgario la tiea centro de la landaj kooperativoj kaj en Britlando la grava iniciato de TUCEG apogas per la forto de la socio.

Nun ni, esperantistoj, devas maturigi plu la penson kaj akceli la disvastiĝon de Esperanto en la kooperativa movado. Ju pli da kooperativanoj konos kaj uzos nian lingvon, des pli vastaj horizontoj malfermiĝos por krei rektajn kontaktojn, fakajn, kulturajn kaj amikajn inter diverslandaj kooperativanoj kaj kooperativoj.

HEREND

Dancantaj virinoj – post la unua „bruligo"



Porcelanaj artaĵoj sur la vojo de perfektiĝo

Sekretoj de la porcelano

Porcelano, la plej fama ceramikaĵo estis inventita en Ĉinio antaŭ multaj jarcentoj. En Eŭropon unue portugalaj kaj italaj komercistoj importis el Ĉinio artajn porcelanojn por la kortegoj, princaj familioj, aristokratoj kaj feŭdaj grandbienuloj. En tiu tempo porcelano egalis la valoron de oro, kaj tiu fakto – jam en la 15-a jc. – instigis la eŭropajn, precipe la francajn kaj italajn ceramikistojn kaj sciencistojn malkovri la sekreton de la porcelanfabrikado.

Post plurjarcentaj senrezultaj eksperimentoj en 1709 la farmaciisto Johann Friedrich BÖTTGER – servanta la polan regon Aŭgusto la Forta – trovis en Saksolando blankan argilon enhavantan la tn. kaolinon, kaj tio fariĝis la bazmaterialo taŭga por porcelano.

J.F.Böttger – estinta alĥemiisto, esploris siatempe ankaŭ la sekreton de la orfarado – sukcesis produkti efektivan porcelanon el kaolino, kaj tio rezultigis la fondon de la unua eŭropa porcelanfabriko en Meissen (Germanio).

Malgraŭ la severaj instrukcioj pri sekureco enkondukitaj en la porcelanfabriko de Meissen, gardanta la metodon de la porcelanfarado kiel ŝtatsekreton, tio fariĝis konata – pere de la fakuloj forlasintaj Meissen – kaj fondiĝis per regnestraj financoj porcelanfabrikoj ankaŭ en Svislando, Ruslando, Aŭstrio (Vieno), Germanio (Berlino) kaj en aliaj eŭropaj ŝtatoj.

Mór Fischer, potfaristo kaj artisto

En Hungario Mór FISCHER (naskiĝinta en urbo Tata en j. 1800) fondis en Herend la unuan porcelanfabrikon en 1839. Mór Fischer konsideranta sin ĉiam potfaristo, estis ne nur fabrik-posedanto, sed samtempe eminenta fakulo, sian metion bonege praktikanta, ties teĥnikajn avantaĝojn funde konanta, kaj spertulo pri la historio de la porcelanarto.

Okaze de la Unua Hungara Industria Ekspozicio en j. 1842 la porcelanfabriko de Herend gajnis distingan diplomon. Post malonga tempo, je mendo de aristokrato, Mór Fischer pretigis en unika arta perfekteco la kompletigon de malnova Meissena porcelanmanĝilaro kaj tio kreis vastan famon por Herend.

Pere de la imitado de la stiloj de malnovaj ĉinaj k.a. eŭropaj porcelanfabrikoj, Herend certigis por si amasajn mendojn kaj samtempe ĝi kreis la „Skolon de Herend", kiu portis larĝskalan ŝanĝon en la historion de la eŭropa porcelanarto.

Paralele kun la tn. „imitadoj", Herend efektivigis ankaŭ pli kaj pli novajn kreaĵojn, kiuj estas ekskluzive la propraĵoj de Herend. Neniam Herend flankeniĝis tute de la realo, kaj disponigis eblojn por la realaj stiloklopodoj.

Apud la aplikado de fremddevenaj motivoj – kiel la ĉina „Wales"-modelo, la Meissena „Tulipo–bukedo", la „Floroj de Hindio" k.a. – Herend kreis inter la multaj, la manĝilaron nomata „Balatonfüred" demonstranta en porcelano la mirindan ĉarmon de la hungara pejzaĝo.

La klopodoj prezenti la hungaran folkloron, troviĝis dekomence en la riĉa, varia agado de Herend.

La signifon de Herend en la historio de la hungara artindustrio markas tiu fakto, ke ĝi rikoltis siajn elstarajn internaciajn sukcesojn dum la senesperigaj jardekoj post la falo de la hungara liberbatalo.

Unumetra plado

La unua elstara internacia sukceso de Herend naskiĝis en 1851 okaze de la mondekspozicio en London, kies ĉefan premion la „Grand Prix", grandan oran medalon gajnis Mór Fischer, por sia aĵurita plado, havanta diametron de 1 metro. Tiu mirinda kreaĵo de Mór Fischer estis siatempe la plej granda en la mondo, kaj tio famigis la nomon de Herend en tuta Eŭropo, eĉ en Ameriko. En tiu tempo Herend decidis apliki sur siaj produktaĵoj la kronon ornamitan per naŭ punktoj. Tiu marko – simila al la Kossuth-blazono – simbolis ankaŭ la opozicion de la hungara nacio kontraŭ la tiranisma politiko de Habsburg-regado.

Dum la postaj jardekoj prosperoj kaj stagnadoj alternis en la historio de Herend, parte pro personaj motivoj (morto de Mór Fischer en 1875), parte pro ŝanĝiĝoj de sociaj kaj politikaj tendencoj, parte pro materialaj damaĝoj (incendio), ĉefe pro la dekadenco de la internacia ekonomio, kulmininta dum kaj inter la du mondmilitoj.

Sendube indan rekonon meritas la fakto, ke Herend strebis dum la menciita epoko prilabori kaj apliki en sia krea agado novajn teĥnologion kaj originalajn motivojn ĉerpitajn el la hungara folkloro.

Post la dua mondmilito komenciĝis nova epoko en la historio de Herend, la porcelanfabriko fariĝis ŝtata posedaĵo kaj malfermiĝis perspektivo kun favoraj kondiĉoj ĝis tiam ne ekzistintaj por rapida evoluo. Herend ricevis la taskon plenumi la pretendojn de la liberiĝinta hungara popolo, paŝinta sur la vojon de la socialisma kulturiĝo. Tiun programon, indikitan de la hungara registaro, la artistoj, gvidantoj kaj laboristoj de la Porcelanfabriko de Herend efektivigas kontinue en daŭre kreskanta nivelo de arto kaj dimensio. Tiu tendenco estas grava faktoro de la kulturpolitiko de la hungara registaro, celanta havigi por la hungaraj ŝtatanoj la eblecon plivastigi siajn konojn pri la porcelanarto kaj kontentigi la tiurilatajn pretendojn. Kaj tiu celo realiĝas fakte, nome la interesiĝo daŭre kreskas pri la produktaĵoj de Herend. Memkompreneble, la interesiĝo pri Herend multe plivastiĝis ankaŭ trans la limoj de Hungario. La eksporto senĉese kreskas.

Ne povas esti reala tiu ĉi informo pri Herend sen la mencio pri ĝiaj laboristoj – heredintaj sian fakscion de siaj patroj dum sinsekvaj generacioj – kiuj multe kontribuas pliperfektigi la produktadon kaj ampleksigi la prestiĝon de Herend. Strikte ligiĝas al la evoluo de Herend, krom la fondinto Mór Fischer,

La preta husaro

Ĉinstila artaĵo kreiĝas sub la lertaj manoj

ankaŭ la kunlaboro de famaj hungaraj pentro- kaj skulpartistoj kaj ceramikistoj, inter ili, Zsigmond Kisfaludy-Stróbl, Miklós Ligeti, Elek Lux, Kata Gácser, G. Katalin Steindl, Jenő Hanzéli k.a. Ilia talento kaj aktiva kontribuo levis al monda nivelo la prestiĝon de la porcelanfabriko de Herend.

Tiel fariĝis Herend altvalora havaĵo de Hungario kaj tial ĝin la hungara popolo gardas kiel nacian trezonon.

Probable niajn legantojn interesas la teĥnologio de la porcelanfabrikado: kiel oni faras la mirindajn porcelanobjektojn en Herend?

Jen, la sekreto

La porcelanproduktaĵoj de Herend gajnis sian mondfamon ne nur pro sia forma ĉarmo, riĉa kaj varia ornamstilo, sed ankaŭ tial, ĉar ili estas fabrikataj el la plej subtila, plej bona materialo laŭ la plej zorgema prilaboro. La bonaj bazmaterialoj certigas la purecon, delikatecon, la brilan blankan koloron de la porcelano – kaj la zorgema prilaboro donas al la porcelano la perfektan kvaliton, la elegantan formon kaj la artan ornamon.

La Herenda porcelano pretiĝas el kaolino, kvarco kaj feldspato. Tiuj bazmaterialoj estas analizitaj antaŭ la fabrikado laŭ severaj preskriboj en laboratorio, kaj poste – se la ekzamena rezulto estas kontentiga – oni faras provprodukton en malgranda kvanto. La bazmaterialoj nur tiam estas uzataj en uzinaj dimensioj, se la provprodukto (nul-serio) donas kontentigan rezulton en ĉiu rilato.

La unua fazo de la produktado komenciĝas per la preparo de pasto. Tiucele kaolino, kvarco kaj feldspato – miksita laŭ konvena proporcio – estas muelita en akvohava tamburmuelilo ĝis la tuto transformiĝas je subtila ŝlimo. La superfluan akvon oni forigas per filtropresilo, kaj la restinta materialo – knedebla kaj facile formebla – estas la porcelanpasto.

Produktado de la porcelanaĵoj el la preparita pasto okazas laŭ tri metodoj: sur turnata disko, per muldo kaj per mana prilaboro.

Sur turnanta disko pretiĝas la rondformaj objektoj (teleroj, tasoj, florvazoj), per muldo oni faras la kavernajn objektojn (statuoj, bovloj, pladoj). Ĉe tiu ĉi metodo la gips-negativo – farita laŭ la formo de la farenda objekto – donas la konkretan formon de la porcelanaĵo. La gips-negativoj estas uzeblaj por multobligi la koncernajn objektojn.

Cele de surdiska prilaboro, la porcelanposto estas maturigata en speciala ejo dum kelkaj semajnoj, kaj antaŭ la uzado ankoraŭfoje oni kompaktigas ĝin per knedmaŝino. Tiu procezo plifaciligas la permanan laboron, kaj certigas la bonan kvaliton de la porcelano.

Por muldo de porcelanaĵoj oni faras densan ŝlimon miksitan per akvo el la maturigita porcelanpasto, tio fariĝas facile muldebla malgraŭ ĝia denseco je la efiko de sodo aldonita en malgranda dozo. Per la tiel preparita muldoŝlimo oni plenigas la gips-negativon, kiu absorbas la akvon el la enversita ŝlimo, kaj tiel estiĝas pli solida pastotavolo – enhavanta kvanteton de akvo – sur la interna surfaco de la gips-negativo. Poste, kiam la dikeco de la masotavolo atingis la deziritan mezuron, la superfluan muldoŝlimon oni elversas el la muldilo. Post mallonga tempo la masotavolo restinta en la muldilo tiom solidiĝas, ke ĝi estas elprenebla sen difekto. Pli komplikajn objektojn (ekz. statuojn) oni muldas en pluraj (2-3) partoj, kaj post la firmigo oni kungluas ilin per flueca pastokaĉo.

Por permana formado oni knedas (kunigas) la porcelanpaston kun organikaj materialoj, kaj dum pluraj monatoj ĝi estas maturigata. Dum la procezo la pasto fariĝas taŭga por lertaj manoj formi el ĝi florpetalojn kaj florfoliojn. Tiamaniere pretiĝas la famaj floroj kaj florbukedoj en la Porcelanfabriko de Herend.

Antaŭ la pluaj prilaboroj la „krudajn" objektojn, faritajn per surdiska prilaboro, muldaŭ permana metodo, oni sekigas. Tiu procezo estas multe atentopretenda, nome, dum la akvo foriĝas, la delikataj grajnetoj de la pasto proksimiĝas unu al la alia, la tuta objekto ŝrumpis, fariĝas pli malgranda. Se la sekigo okazas subite, tiam la ŝrumpo plirapidiĝas, la objekto fendiĝas. Por eviti fendiĝon, la sekigo devas okazi malrapide, ĝi daŭras eĉ plurajn semajnojn ĉe grandaj objektoj. Post plena sekigo la objektoj faritaj el porcelanpasto ne plu deformiĝas, tamen ili estas tre rompiĝemaj, tial oni devas manipuli ilin singarde.

Kvarfoja fajroprovo.

Por pliigi la firmecon kaj forigi la akvon ligitan kemie -estantan en la „seka" varo – la objektojn oni metas en fajrorezistajn (ŝamotajn) ujojn kaj tiujn en specialajn bakfornojn kun ĉ. 900° C. Tiu procezo estas nomata „zsengélés" (freŝkreskigo) kaj pere de tio la porcelano plifirmiĝas, fariĝas taŭga por farbi gin.

La glazuro pretiĝas – ĝenerale – el la samaj bazmaterialoj, kiel la porcelanpasto, tamen ĝi enhavas pli multan fandiĝeman materialon, sekve – dum la pasto fariĝas dura – la glazuro fandiĝas je brila surfaco. Ankaŭ la bazmaterialojn de la glazuro oni muelas – laŭ difinita recepto – kun akvo en tamburmuelilo je subtila ŝlimo (eĉ pli delikata ol la porcelanpasto). En tiu maldensan glazurŝlimon oni trempas – je kelkaj minutoj – la „freŝkreskigitan" objekton kaj dume glazurtavolo 0,1 – 0,2 mm dika, adheras al la surfaco. Tiu glazurtavolo sekiĝas rapide.

La glazuritajn objektojn oni metas denove en ŝamotan ujon, kaj oni lokigas ilin en bakfornon, kie la pasto fariĝas ĉe 1400° C temperaturo je porcelano, havanta karakterizan blankan koloron. La varmo devas kreski nur malrapide, ĉar dume la pasto ŝrumpas plu, kaj fendiĝoj povas estiĝi. Poste la malvarmigon oni devas fari same malrapide, ĉar ankaŭ la subita temperaturfalo povas kaŭzi fendiĝojn.

La bela, blanka porcelano estas la rezulto de longdaŭra kaj zorgema laboro.

La tn. „blankan varon" la pentristoj – artistoj – ornamas per belegaj, kolorpompaj motivoj. Ankaŭ tiuj kolorigiloj estas specialaj materialoj, taŭgaj je alta temperaturo, nome la porcelanaĵojn post la farbado denove la trian fojon – oni devas varmigi ĝis 750 - 800° C. Ĉi okaze la farbo bruliĝas sur la glazur-tavolon kaj fariĝas nevišebla. Tamen ankoraŭ eĉ tiam ne estas preta la porcelanaĵo. Post la tria varmigo oni pentras la oro-ornamon sur la porcelanon. Tiu farbo estas malhelbruna, kaj nur dum la kvara varmigo – fariĝis 650 – 700° C – kaj post la tion sekvanta polurado ĝi ricevas sian brilan oran koloron.

Tiel kreiĝas la fieraĵo de la hungara industrio:

la Porcelano de Herend.

Lajos *Kapitány*

Zoltán Halász

13. Kompromiso en 1867



Reĝo Francisko Jozefo diras sian kronadan juron en ĉeestro de la registaranoj



La „Februara Edikto" de 1861, en kiu la imperiestro garantiis certajn limigitajn rajtojn, Hungario tamen restis submetita al la imperia parlamento

Ĝis somero de 1850 daŭris la teroro post la fiasko de la 1848-49-jara liberbatalo. Tiam barono Haynau estis eksigita kaj komenciĝis la t.n. „Bach-periodo": nome, la efektiva potenco estis en manoj de la ministro por internaj aferoj, Alexander Bach, kvankam ĉefministro estis duko Schwarzenberg. La Habsburga registaro komencis likvidi la relativan sendependecon de la lando kaj en la ŝtata administrado ĝi enkondukis la uzon de la germana lingvo. Samtempe – kvankam la 1848-aj leĝoj estis proklamitaj nevalidaj far la Habsburga absolutismo – estis jam maleble limigi la liberigon de l' servutuloj, kaj dank' al la ekanta kapitalisma transformiĝo komenciĝis forta ekonomia evoluo. Prosperis la agrikulturo kaj rapide disvolviĝis kelkaj industribranĉoj: karbeksploatado, metalurgio kaj metalellaborado

Sed malgraŭ la ekonomia evoluo, la hungara politika situacio fariĝis ĉiam pli streĉa, paralele kun la malfortiĝo de la eksterpolitikaj pozicioj de la Habsburga imperio, La ribelo de italoj, apogata de Francio pruvis, ke la imperio jam ne kapablas sukcese fari daŭrajn militojn. Sekve de ĉi tiu milita-politika malsukceso Bach estis eksigita. Imperiestro Francisko Jozefo, apogante sin sur la tradicie konservema tavolo de l' hungara aristokrataro, en 1859 emisiis la „Oktobran Diplomon", kiu promesis al la hungara asembleo rajton pri kunlaboro en la imperia leĝdonado, tamen ne menciante, ke estus starigota hungara registaro. La asembleo rifuzis en 1861 la „Oktobran Diplomon", samtiel la „Februaran Edikton", modifon de la „Diplomo" en centrisma direkto.

Dum la 1860-aj jaroj, laŭgrade aliiĝis la politika sinteno de la hungara reganta klaso. La grandbienuloj luktadis kun aro da malfacilaĵoj, tial ili esperis, ke kompromiso kun la Habsburgoj kunportus ekonomian prosperon, krome postenojn en la ŝtata administrado kaj ŝirmatecon kontraŭ la ĉiam pli forta movado de la naciaj

La novaĵo en la ĵurnalo Neues Politisches Volksblatt, en 1881, pri la verdikto kontraŭ Leo Frankel, fondinto de la Ĝenerala Laborista Partio de Hungario

Inaugŭro de la Unua Hungara Asekura Societo (Pentraĵo de Gyula Benczúr)

de la hungara popolo



Ferenc Deák (1803-1876)

La dualisma periodo

minoritatoj. La partio de l' „dekstra centrismo", estrita far Ferenc Deák favoris la kompromison; sed samtempe ankaŭ tiu de Kálmán Tisza – la t.n. partio de l' „maldekstra centrismo" – nenian principan riproĉon menciis kontraŭ la ebla kompromiso kun la Habsburgoj. Nur la „maldekstraj ekstremuloj" restis fidelaj al la ideoj de 1848. Kiam la aŭstra armeo estis grave venkita de la prusoj, evidentiĝis, ke la Habsburga dinastio, jam elpelita el Germanio kaj Italio, nur kunlaborante kun Hungario povus savi parton de sia granda politika influo. Deák faciligis la kompromison, ĉar eĉ post la malvenko de l aŭstroj ĉe Königgrätz li ne volis elperforti novajn koncedojn por la hungaroj. Komence de 1867, Francisko Jozefo nomis prezidanto de la ministraro de Hungario dukon Gyula Andrássy; post tio, la nacia asembleo aprobis la leĝon pri la kompromiso.

Laŭ tiu leĝo, la Habsburga imperio fariĝis organizata dualisme kiel Aŭstra-Hungara Monarkio. Ambaŭ landoj havis propran leĝdonan organon kaj respondecan registaron; unuigis la du landojn la persono de la imperiestro kaj la komunaj ministrejoj pri eksterlandaj aferoj, pri la financoj kaj pri militaj aferoj.

Somere de 1867, en Buda, Francisko Jozefo estis kronita reĝo de Hungario.

La politika stabiliĝo en la periodo de la dualismo favoris la ekonomian disvolviĝon. La kapitalisma ekonomia vivo ekprosperis fakte en la lasta triono de la jarcento: oni importis grandajn kvantojn da eksterlanda kapitalo, fondiĝis bankoj kaj akciaj societoj. Ankaŭ la industrio evoluis konsiderinde, sed ĝia strukturo fariĝis sufiĉe malproporcia pro la doganunuiĝo kun Aŭstrio. Pleje evoluis la agrara industrio prilaboranta enlandajn krudmaterialojn, sed pliiĝis la produktado ankaŭ de la peza industrio, la minekspluatado kaj la metalindustrio. Same disvolviĝis la agrikulturo, sed prosperis nur la grandbienoj, ĉar tie estis eble modernigi la produktadon: tiel ĉi tiuj fariĝis grandaj kapitalismaj entreprenoj, dume la plimulto de la mezaj kaj etbienuloj ruiniĝis. Fine de la jarcento en Hungario estis jam kvar milionoj da agrarproletoj. Paralele kun la industria evoluo, rapide kreskis la nombro de laboristoj kaj disvolviĝis la hungara laborista movado. En decembro de 1890 organizis sian unuan kongreson la Hungarlanda Socialdemokratia Partio.

La nova jarcento alvenis meze de akraj internaj politikaj bataloj. La sinsekvaj registaroj, kiuj reprezentis la regantan klason, ĉiam pli kruele sufokis la laboristan kaj kamparanan movadojn, samtiel la naciajn minoritatojn; sed samtempe intensiĝis la organizado de la socialismaj kaj demokratiaj fortoj. La sindikatoj fortiĝis kaj pliiĝis la efiko de la strikoj. En la Socialdemokratia Partio la maldekstraj grupoj fortigis siajn poziciojn. La kamparanoj kreis novan demokratian grupiĝon, kiu postulis dividon de la grandbienoj je malgrandaj farmoj – kaj aliajn sociajn kaj politikajn reformojn. Ankaŭ la burĝa radikalismo fariĝis grava politika faktoro, postulanta likvidon de la restaĵoj de la feŭdismo, kaj kritikanta la konserveman kaj reakcian politikon. En la jaroj tuj antaŭ la unua mondmilito, la plej grava strebado de la demokratiaj fortoj kaj de la laborista movado estis la batalo kontraŭ la milito. Oni daure protestis, en amasaj demonstracioj, kontraŭ la pormilitaj prepariĝoj de la konservema kaj dekstrema registaro.

Tr.: VHZS

Laboras la vapormuelejo



Lifto en la Danuba bordo de Pest, en la 1880-aj jaroj



Karbminejo de la Societo por Danuba Navigacio, en la 1860-aj jaroj



István Torda

* Jarcentoj de la

5. Literaturo dum la reform-epoko



Titolpaĝo de la literatura revuo Aurora

La epoko de la hungara reform-movado, preparinta la burĝan revolucion de 1848-1849, komenciĝis en la 1820-aj jaroj kaj disvolviĝis post 1830. Kuniĝo de taskoj de la nacia liberigo kaj de tiuj de la socia progreso, heroa patoso de la formiĝo de nacio en burĝa senco faris fundamenton ankaŭ por disflorado de la literatura vivo. Unueco de la literatura kaj politika agadoj iĝis karakterizaĵo de la konduto de la verkistoj,

La stilo de la epoko estas la *romantismo.* Samtempe kun ties disvastiĝo disvolviĝis kaj kreis siajn unuajn ĉefverkojn ankaŭ la kritika realismo, kies karakterizaj trajtoj estas pentrado de vasta kaj profunda bildo pri la socio kaj analiza montrado de la psiko. Ĉi tiuj du tendencoj reciproke influis unu la alian, iliaj metodoj miksiĝis.

Kisfaludy kaj „Auróra"

Károly Kisfaludy (Kisfaludi) (1788-1830) aktivis literature unu jardekon. Lia laboro rezultis venkon de la principo pri la originala beletro nacia kaj kreon de literaturaj instancoj. Li akiris sian unuan sukceson per la historia dramo *La Tataroj en Hungarlando* (1819), sed liaj talento kaj kono de la teatra metio pli sukcese efikis en liaj komedioj. La lastajn faris aktualaj konflikto inter la malnova nobela mondo de la gepatroj, fariĝanta jam komika, kaj la nova mondo de la gejunuloj; kiuj postulas siajn rajtojn kaj sur la profesia kampo, kaj en la ama vivo. Noveloj kaj poemoj de Kisfaludy aperis en tiu beletra almanako, kiun li mem eldonis (unue en 1821), kiu iĝis ĉefa rimedo por fari el



Parto el la manuskripto de Himno de Kölcsey

la urbo Pest (peŝt) literaturan centron kaj kiu iĝis organizanto de la nova literaturo. (Pest, nun orienta parto de Budapeŝto ĝis 1873 estis aparta urbo. – Red.) La almanako titolita Auróra (Aŭroro) anstataŭis la mankantan ankoraŭ beletran revuon.

La poeto de la hungara Himno

Ferenc Kölcsey (Kölĉei) (1790-1838) estis kronanto de la klasikisma stilo kaj samtempe entuziasmulo pri la romantiko.

Li perdis la gepatrojn, estis malsana (lia maldekstra okulo blindis). Li lernis kaj studis juron en Debrecen, kaj nur en 1810 vizitis la unuan fojon la urbon Pest, kie li renkontis la noviganton de la hungara lingvo Ferenc Kazinczy, kaj lian rondon. Ili ekkonis en Kölcsey junulon strangan kaj ege erudician. En la 1810-aj jaroj la juna poeto verkis poemojn, kiuj esprimis lian fuĝemon de la „hungara novalo". En la lukto por la lingvonovigo li montris sin akrapluma disputanto flanke de Kazinczy.

En la komenco de la 1820-aj jaroj aperis liaj t.n. „popolkantoj" kaj politikaj versaĵoj. El ili *Himno* (1823) fariĝis nacia himno de la hungararo. Li profunde sentis, ke lia klaso, la nobelaro plejparte konsistas el anoj konservativaj, malemaj progresi, tamen li kiel membro de tiu klaso devas lukti por la jakobenaj idealoj. Tio ĉe li finiĝis per krizo, kiam li turmentis sin mem, kaj tion li esprimis post la silentado de lia liriko inter 1827 kaj 1836. En la lastaj du jaroj de sia vivo Kölcsey verkis kelkajn grandiozajn poemojn. Dum la silentado kiel poeto li aktivis kaj verkis kiel estetikisto, kritikisto, politikisto. En 1829 li debutis sur la podio de la hungara politiko departementa. En du grandsignifaj paroladoj li montris la problemojn de la impostpaganta plebo kaj faris la demandon: ĉu povas la ekspluatita popolo esti interesita pri la defendo de la patrio? Fariĝinte deputito de la Regna Kunveno inter 1832 kaj 1836, en siaj paroladoj plej koncize li konceptis la ideojn de la reformepoko. Lia unua devizo estis: *„patrio kaj progreso„* kaj alia en la kampo de la praktikaj farendoj: *„libero kaj posedo"* por la servutuloj. Brilega spegulo de liaj progresemaj ideoj kaj amaraj pensadoj estas lia artisme verkita *Taglibro el la Regna Kunveno.* Kiam la reakciularo vokis lin de la Regna Kunveno, jam post la vaniĝo de siaj esperoj li verkis filozofian kaj politikan testamenton, titolitan *Parainesis.* (La greka vorto signifas: „Instruoj". – Red.) Tiu ĉi estas grandioza pedagogia principaro, kuniganta la idealismon de la romantismo kun la raciemo de la klerismo.

Vörösmarty

La plej granda reprezentanto de la hungara romantismo estas *Mihály Vörösmarty* (Vöröŝmarti) (1800-1855). En liaj verkoj kaj pere de ili la ebloj de nova poezia sinteno kaj nova bildformado ascendis pli altan ŝtupon.

hungara literaturo *

Mihály Vörösmarty

József Eötvös

Havanta naŭ gefratojn en la multzorga hejmo de sia patro, kiu estis mastrumisto ĉe riĉa bienulo, li edukiĝis sobraviva, serioza junulo. Li aliĝis la kontraŭ-aŭstrian movadon de la departementa nobelaro, kiu volis akiri la nacian sendependecon. Samtempe li enamiĝis al Etelka, filino de riĉega bienulo. Ĉio ĉi inspiris la poeton verki grandiozan eposon. La *Fuĝo de Zalán* (1825), tiu ĉi eposo el dek kantoj, verkita en heksametroj, kontentigis la malnovan bezonon je eposo pri la patrujokupo, kaj ĝi levis sian poeton inter la grandajn poetojn naciajn. En 1828 Vörösmarty estis komisiita pri redaktado de la revuo *Tudományos Gyüjtemény* (Scienca Kolektaĵo). Per tio komenciĝis la vivo en Pest de la unua hungara verkisto, havanta literaturan ĉefokupon.

La malsukceso de la movado pri sendependeco kaj la propra pliiĝinta izolo kaŭzis ĉe Vörösmarty krizon. Li pli kaj pli seniluziiĝis pri la „heroa" paseo. Post tio li ĉefe verkis pri tragedioj individuaj de la historio kaj krome en lia poezio aperas ankaŭ fantazia fe-mondo. En 1831 li verkis fabeldramon kun profundaj filozofiaj pensoj, titolitan *Csongor kaj Tünde.* En ĝi li kreis dramon pri amo inter la tero kaj la ĉielo, inter fabela reĝido hungara kaj feino, serĉantaj unu la alian. En la verko ricevas artisman formon tragika feliĉ-serĉado far la romantismo, sopiranta pri io senfina.

La poeto en la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento, precipe post la malfermo de la Nacia Teatro, (1837) intense ekaktivis kiel dramverkisto.

En la 40-aj jaroj, kiam disfloris kaj samtempe kriziĝis la liberalismo nobelara, la liriko de Vörösmarty disvolviĝis en sia pleja grandiozo. En ĝi aperas pasia liberamo kaj memŝirado pri tragikaj demandoj de la revolucio kaj progreso. La plej grandaj Vörösmarty-poemoj temas pri serĉado de la senco de la homa vivo. La *Pensoj en Biblioteko* (1844) eldiras amaran veron: la amasoj de la Tero vivas mizere kaj ankaŭ la riĉuloj ne estas feliĉaj. El tiu ĉi tezo sekvas negado pri la kulturo, kies efikon la genia poemo iom mildigas per citado de utopiismaj ideoj, kaj la verko finiĝas per memorigo pri la taskoj de la nacio. En la samaj jaroj plene disfloras ankaŭ la amliriko de Vörösmarty. La ampoemoj estis verkitaj por la juna Laura Csajághy (Ĉajagi), la edzino de la poeto. La pinto de tiu ĉi verkado estas la versaĵo titolita *Al la Revantino* (1843), en kiu li avertas ŝin pri danĝeroj de la fantaziado.

En 1848-1849, dum la revolucia liberbatalo Vörösmarty verkis malmulte da poemoj, sed liaj *Batala Kanto* kaj porrevoluciaj artikoloj estis tre efikaj. Kvankam li ne estis radikalulo, kiel ekzemple Sándor Petőfi, lia iama malkovrito, ankaŭ li ĝisfine restis adepto de la revolucio. Post la liberbatalo li devis sin kovri, poste, dum la absolutisma regimo li loĝis en Pest, baraktante kun gravaj financaj malfacilaĵoj. Tiutempe li kronis sian verkaron per la poemo *La Maljuna Cigano* (1854). En ĝi li per sovaĝa ritmo de sia despero pri kantas la viziojn de la disfalo, sed la dolorojn ĉe la fino venkas optimismo humanista.

La realisma romano

La vera kreinto de la hungara romano estas József Eötvös (Ötvös) (1813-1871). Li estis aristokrato – barono – kaj malantaŭ li staris spertoj de la kapitalismiĝanta grandbieno, la historiaj kaj juraj studoj en la 20-aj jaroj sub la influo de patriotisma movado kaj fine scioj, akiritaj dum vojaĝo tra Okcidenta Eŭropo.

En sia granda romano *La Notario de la Vilaĝo* (1845) li postulas radikalan reformon de la departementa administrado. Eötvös per realisma montro de la departementa medio sukcesis krei multflankan artisman kritikon pri la hungara feŭdismo. La romanon faras ĝuebla legaĵo la agado inda al detektivromano kaj la abunde riĉa satiro pri la departementaj gvidantoj.

La ribelo de la Galiciaj* kampuloj (1831) inspiris Eötvös verki sian alian grandan romanon, titolitan *Hungarlando en 1514.* Per memorigo pri la kampulara revolucio gvidita de Georgo Dózsa li volas atentigi: kiajn rezultojn povas havi la feŭda subpremado. La artisma forto de Eötvös ĉi-romane atingas sian pinton: la fermita, rigora kompozicio faras ĉi tiun verkon la plej signifa hungara romano realisma, kiu tamen enhavas kelkajn romantikajn trajtojn.

Eötvös en 1848 estis ministro pri kulturaj aferoj de la unua nacia registaro. Kiam komenciĝis la liberiga milito. li elmigris eksterlanden. Post la hejmenveno li verkis siajn lastajn epikajn verkojn, kaj fine li, kiel ministro pri kulturaj aferoj de la liberalisma registaro havis grandajn sukcesojn.

Sed al la pintoj de sia verkaro, atingitaj en la reformepoko, li neniam plu alproksimiĝis.

Tradukis: *P.A.R.*

Mihály Vörösmarty

La maljuna cigano

Hej, cigan', vi trinkis pagon, ludu!
Krurpendado vana havu finon!
Kial zorgi apud pan' kaj akvo,
En rigidan vazon versû vinon.
Viv' ĉi-monda ĉiam tia estis:
Jen ĝi frostis, jen ĝi flame festis.
Ek, ĉar eble baldaŭ mutos ton',
L' arĉ' taŭzita iĝos jam baston';
Vin' en glaso kaj ĉagren' en koro,
Ek cigan', ne zorgu pri doloro!

Akvoturne via sang' ekbolu,
Tremu via cerb' en la kranio,
Kometflame brulu la okuloj,
Sonu kordoj, kvazaŭ ventokrio,
Krude, kiel hajlobat' subita:
Gren' de l' homoj estas detruita.
Ek, ĉar eble baldaŭ mutos ton',
L' arĉ' taŭzita iĝos jam baston';
Vin' en glaso kaj ĉagren' en koro,
Ek cigan', ne zorgu pri doloro!

Lernu kanton de l' tempesto muĝa,
Kiu veas, ĝemas, hurle bruas,
Viv-sufokas, murdas beston, homon,
Arbojn, ŝipojn ŝiras kaj detruas.
Jen, militas granda mondo nia,
En Sanktlando tremas tombo Dia.
Ek, ĉar eble baldaŭ mutos ton',
L' arĉ' taŭzita iĝos jam baston';
Vin' en glaso kaj ĉagren' en koro,
Ek cigan', ne zorgu pri doloro!

Kiu ĝemas surde, sufokvoĉe,
Hurlas en ĉi kur' sovaĝkolera,
Frapas pugne sur la firmamento,
Ploras, kiel mueliľ infera?
Mens' freneza? Anĝelfal'? Korkrevoj?
Trup' venkita, aŭ ĥimeraj revoj?
Ek, ĉar eble baldaŭ mutos ton',
L' arĉ' taŭzita iĝos jam baston';
Vin' en glaso kaj ĉagren' en koro,
Ek cigan', ne zorgu pri doloro!

En dezerto kvazaŭ ni reaŭdus
Ribelanton kun sovaĝaj vortoj,
Bastonfrapon de l' fratmortiganto,
Tomboplendon de l' unuaj orfoj,
Flugilmuĝon de l' vultur' ve-porta,
Prometeon sub tortur' senmorta.
Ek, ĉar eble baldaŭ mutos ton',
L' arĉ' taŭzita iĝos jam baston';
Vin en glaso kaj ĉagren' en koro,
Ek cigan', ne zorgu pri doloro!

Stelo blinda, ĉi mizera tero
Turnu sin en sia suk' amara,
Kaj de krimoj, malpuraĵ', ĥimeroj
Ĝi puriĝu en tempest' barbara.
La arkeo venu sur la ondo:
Bark' de Noah, kun la nova mondo.

Ek, ĉar eble baldaŭ mutos ton',
L' arĉ' taŭzita iĝos jam baston';
Vin' en glaso kaj ĉagren' en koro,
Ek cigan', ne zorgu pri doloro!

Ek! Ne, tamen – lasu nun la kordojn,
Estos iam fest' en mondovaloj,
Se laciĝis la tempest-kolero,
La kverel' elsangis en bataloj,
Tiam sonu ardaj melodioj,
Entuziasme, por plezur' de dioj,
Arĉon tiam kaptu via man',
Sereniĝu nuba frunt', cigan'!
De ĝojvino plenu via koro,
Ek, ne zorgu pri la monddoloro.

El la hungara: *K. Kalocsay*

Rimarko: La supra traduko 99%-e venas el la plumo de Kalocsay. La saman poemon tradukis ankaŭ F. Szilágyi, kaj montriĝis, ke en la refreno li trovis iom pli bonajn, kaj al la originalo pli fidelajn solvojn. La redaktoro post kelka hezitado, finfine en la spirito de Kalocsay mem, decidis kombini la du tradukojn, esperante liveri tiel pli perfektan tradukon de la majstra poemo.

MUZEO DE AMIKECO



Antaŭ pli ol 30 jaroj estis malfermita en Ŝumen Muzeo de Bulgara-Hungara Amikeco. Ligita kun la restado de la hungara politika elmigrintaro en la urbo Ŝumen antaŭ 130 jaroj, ĝi estis instalita en la renesancstila hejmo de la tiama komercisto Dimitraki Ĥadipanov, kie trovis azilon la genia gvidanto de la hungara revolucio, Lajos Kossuth. Kun siaj multjaraj arboj, belaj ĝardenetoj kaj la ŝtona fontano en la vasta korto, la domo ankaŭ nun konservas la ĉarmon kaj patoson de la mezo de la pasinta jarcento.

La 20-a de novembro 1949 estas memorinda dato por multaj Ŝumenanoj. En tiu tago flirtis en la urbo bulgaraj kaj hungaraj flagoj. De la stacidomo ĝis la strato „L. Kossuth" oni povis vidi imponan manifestacion. Tiu estis la tago, kiam oni malfermis la muzeon, por tiel omaĝi al la fruktodona influo de la hungaraj elmigrintoj al la kulturo kaj ĉiutaga vivo de la malnova Ŝumen.

Jam pasis 30 jaroj. Dum tiu ĉi periodo la muzeo disvolvis vastan kultur-amasan agadon, ĝi fariĝis edukejo de miloj da vizitantoj, en la spirito de patriotismo kaj internaciismo. Nur dum la lastaj 15 jaroj la muzeo estis vizitita de pli ol 450 000 bulgaroj kaj proksimume 100 000 eksterlandanoj. Ĉiujare venas pli ol 30 000 gastoj, el kiuj hungaroj estas proksimume 6000. En la muzea memorlibro inter centoj da impresoj kaj subskriboj oni povas legi ankaŭ nomojn de bulgaraj, hungaraj kaj alilandaj esperantistoj.

La muzeo havas fruktodonajn kontaktojn kun la Nacia Muzeo en Budapeŝto, kaj muzeoj en Debrecen, Cegléd ktp. Ĝia agado grave kontribuas al la plifortigo de la kulturaj kontaktoj inter Bulgario kaj Hungario.

Cvjatko *Todorov*

Endre Tóth

PORDOJ

– ...tio jam elĉerpiĝis – diris la kelnerino –, mendu prefere Bureŝanon: ĝia prezo estas la sama, kaj nepre ĝi ne estas pli malbona, ol la alia.

Ŝia nomo estis Tereseta: dikkrura ino, iom malbela. Iam ili kune vizitis lernejon.

– Bone. Portu do tion – diris la viro, ekkubutumis sur la tablon, kaj observadis la du pordojn aliflanke. Sur la unua estis surskribo: SINJOROJ – HERREN. Sur la alia: SINJORINOJ – DAMEN.

La ciganmuzikestro levis la violonon, ek-eksonigis la kordojn, ĉirkaŭrigardis, sed ne komencis la muzikon, demetis la instrumenton kaj residiĝis, kun enua mieno.

Tereseta trarapidis la halon. Ŝi portis kolbasetojn vaporantajn, sur pleto.

Al la najbara tablo alvenis virino, en ruga vestaĵo, akompanate de du viroj. „Bonvesperon" – ŝi diris arde. Ĉu vi komprenas? „Bonvesperon". Ĉu oni aŭdis jam ion tian? Nur simple: „Bonvesperon".

Ne eblis kompreni siajn pluajn vortojn, ŝi mallaŭtigis sian voĉon, sed la rakonto povis esti interesa, ĉar la du kavaliroj vigle kapbalancadis, klinante sin sur la tablon.

– Mi atendos ŝin – pensis denove la viro. – Mi kunportos ŝin hejmen. Nu, nature al mia hejmo.

La elektra motoro haltis, aŭdigante plendan ĝemon. Grandega ferinstrumento pendis sur dika metalŝnuro super la buŝo de la ŝakto. Ĝi svingiĝis malrapide, apenaŭ videble, en la lumo de la manlampoj.

– Ĉu vi scias, ke tuj estos la dekunua horo? – la ledĉapulo diris al la alia.

– Kion fari? Nepre ni devas ellevi tiun ĉi fatrason. Ili strečis siajn fortojn, kaj komencis ŝovi la ruleblan gruon malantaŭen. Maldensaj pluveroj piketis ilian vizaĝon. Dum la laboro groteskaj ombroj kuradis sur la muro, laŭ danco de la manlampoj pendigitaj sur iliaj brustoj.

– Ĉu vi deziras glason da vino? – demandis la viro, kiam Tereseta alportis la Bureŝanon.

– Dankon, ne. Estas ankoraŭ frue, multe da laboro estas antaŭ mi.

– Ĝis kiam?

– Ĝis la dua.

– Ho ve. Kaj nun apenaŭ estas la dekunua.

– Bedaŭrinde – diris la knabino kaj veršis al li.– Tien vi nepre ne iru!

– Kien? – demandis la viro.

– Tien – Tereseta mansignis al la pordo SINJOROJ – HERREN.

– Ĝi stopiĝis denove. La fiaĵo atingas ĝis la maleoloj.

– Denove?

– Jes. Aĉa dibočejo. En oktobro mi forlasos tiun sterkejon.

– Kaj kion vi faros?

– Mi fariĝos kasistino en la florvendejo.

– Ĉu tie estos pli bone?

La knabino nur levetis la ŝultrojn.

– Tereseta, ora floro! – aŭdiĝis el la fino de la salono.

– Ni devus kovri la ŝakton – diris la ledĉapulo.

– Duope? – demandis la alia. – Kiam ni malkovris ĝin, ni estis kvarope, kaj eĉ tiam apenaŭ ni povis ekmovi tiun malbenitan betonkovrilon.

Ili staris senkonsile. La ledĉapulo direktis la lumon malsupren, en la ŝakton. En okmetra profundo kuŝis krude gigantaj fertraboj, kelkaj tuboj staris pikprete, de sur kiuj ĵus oni formetis la grandegan fermilon. En la fundo de la ŝakto vibris akvo, respegulanta kapricajn lumojn sur la ŝimmakulitajn murojn vertikalajn.

– Kvazaŭ ĝi estus elefantkaptilo – diris la ledĉapulo, kaj li kraĉis en la profundon.

– Aŭskultu min – diris la alia –, ni ŝlosos la pordegon, ni kunprenos la ŝlosilon, kaj morgaŭ matene, je la naŭa ni alvenos unuaj;,ĝis tiam neniu povos veni ĉi tien, trankvile ni lasu do la ŝakton malfermita.

– Nu, kaj tio? – diris la ledĉapulo, montrante la pordon super la sep ŝtupoj, sub kiu maldika lumstrio filtriĝis eksteren.

– Ĝi estas ĉiam fermita – asertis la alia, sed lia voĉo ne estis firma.

– Estus necese provi la pordon super la sep ŝtupoj – li pensis, sed por atingi la plej malaltan ŝtupon el la sep li devus salti super la osceda buŝo de la ŝakto, kaj tio estas ankaŭ ĉe taga lumo danĝere entrepreno.

– Ĝi estas ĉiam ŝlosita – li ripetis –, sed nepre ni avertos la trinkejestron, por ke ili estu singardaj – li aldonis poste, sin kvietigante.

La viro jam trinkis la duan glason. Tereseta estas hodiaŭ iom malbonhumora – li pensis. – Sed poste certe ŝi akceptos kelkajn glasetojn, kaj ŝi fariĝos pli gaja. – Ke ŝi estas iom malbela? – Nu, se la lampoj estas jam malŝaltitaj, ĉiuj knabinoj iĝas egale ĉarmaj,

Kvazaŭ estus tute egale, kion li faras, li stariĝis kaj ekiris al la pordo SINJOROJ – HERREN.

Kiam lia mano jam estis sur la klinko, subite li ekmemoris pri tio, kion la knabino diris: „la fiaĵo atingas ĝis la maleoloj". Faras nenion. Mi iros al la strato – li pensis –, kaj ekiris al la enirejo.

Ekstere ĵus alvenis aŭtobuso. Ordinare ĝi restas ĉi tie, ĝis alia buso alvenas. Nun ne eblas eliri tien. Faras nenion, mi eliros al la korto – li pensis. Sed li ne iris tuj. Li rigardis eksteren, tra la vitra tabulo, sur kiu pluveroj vetkuris malsupren. La reflektoro de la buso, kaj la gaja lumo, venanta el la fenestroj, iluminis la placeton, kiu nun emanis nerealan, fabelan afablecon, kun la anguloj perdiĝantaj inter la duraj ombroj.

– La buso alvenis – diris iu en la gastejo, ĝojegante. – Venu ĉiuj! Ni rigardu, kiu alvenis?

Preskaŭ ĉiuj tumultis ĉe la enirejo.

La ledĉapulo jam manipulis kun la seruro de la pordego. Li provis la klinkon ankoraŭfoje, por ke li estu certa pri la afero.

– Ni nepre admonu la trinkejestron – li ripetis.

– Nature, nature! – respondis la alia, kaj levis la okulojn al la ĉielo.

– Senĉese pluvas! Diablo forprenu ĝin!

La viro ekenuis la gapadon. Li ekiris al la korta pordo. Kiam li malfermis ĝin, la freŝa, humida aero agrable frapis lian vizaĝon. Silente li fermtiris la pordon malantaŭ si, kaj dum momento li guis la mallumon. Poste li suprenrigardis al la ĉielo. Stelo vidiĝis nenie.

– Senceše pluvas! Diablo forprenu ĝin – li diris duonvoĉe, kaj ekiris malsupren sur la sep ŝtupoj.

Mihály Gergely

Ĉu vi konas la kvarkon? *

Al la portreto de Kolomano Kalocsay

– Ĉu vi konas la kvarkon? – demandis min „la profesoro", Kalocsay, kiam mi vizitis lin lastokaze. (Ke „lastokaze", en tiu horo en decembro de 1975 ankoraŭ ni ne povis scii, ja nur antaŭ du monatoj li festis sian 84-an naskiĝtagon.) Li estis moviĝema, freŝa, sprita, kiel ĉiam, liaj okuloj brilis, lia rideto vibris, ke mi perceptis tuj, ke mi aŭdos denove de li iom pri iu interesaĵo.

– Jes... Iomete mi legis jam pri la kvarko... – diris mi suprizite.

Liaj okuloj eklumis feliĉe.

– Nu, tiam atentu, kara amiko, mi prezentas al vi la kvarkon ĝenerale kaj la plej novajn sciindaĵojn!... Do!...

Kaj li parolis longe pri la kvarkoj, pri la plej malgrandaj partoj de materio, de atomo. Pli precize: li jam ne parolis, sed prelegis, kiel fakulo, kiel profesoro de fiziko kaj matematiko de iu universitato.

Mi mem tiel nomis lin volonte: „la profesoro", ĉar jam en la komenco de nia konatiĝo mi spertis lian multflankecon, estimindan scion en multaj terenoj de la homa kulturo, scienco kaj arto. Li estis laŭ profesio kuracisto, poste direktoro de hospitalo, sed li estis ankaŭ universitata profesoro, verkinto de universitataj lernolibroj. Kaj laŭ granda hobio estis poeto, verkisto, ĉefe en siaj junaj jaroj. Kaj poste li fariĝis lingvisto, tradukisto, redaktoro de la mondfama *Literatura Mondo;* post Zamenhof la plej granda figuro de la Internacia Lingvo kaj la tradukarto en Esperanto. Kaj ankoraŭ plu: li sciis multon pri literaturo, muziko, belarto, teatro, eĉ ankaŭ pri la problemoj de nia socio, sociologio, psikologio, ekzemple: pri la sukcesoj kaj interesaj trajtoj de la nova hungara agrikulturo.

En nia epoko oni kutimas diri, ke jam delonge pasis la tempo de polihistoroj*, kiuj karakterizis la jarcentojn de Renesanco. Sed mi scias, ke ankoraŭ nun povas ekzisti polihistoroj.

Jes: Kolomano Kalocsay estis polihistoro.

Iam, eble en 1965 ni rolis kune en programo de la Hungara Radio, juna reportisto intervjuis nin pri Esperanto. Sed nia profunda konatiĝo okazis pli poste, en oktobro de 1968, kiam Hungara Esperanto-Asocio invitis min redakti la revuon Hungara Vivo. Do, tial mi akompanis la gvidantojn de HEA al Kalocsay, por festi lian 77-an naskiĝtagon, sed mi samtempe deziris konsulti la profesoron pri miaj planoj, ekscii lian opinion ekzemple pri la nova titolpaĝo, titolbildo, ktp. Kompreneble, ankaŭ tiam li estis la centro de societo, kaj ne nur tial, ĉar li estis la festata persono, sed ĉar liaj opinioj estis la plej interesaj, intelektaj.

Li aŭskultis atenteme mian redaktoran koncepton kaj longe studadis la planitajn novajn titolpaĝojn, modernajn grafikaĵojn por la unua numero, kaj poste li diris kontente;

– – Eminente!.. Mi scias, ke la unuaj numeroj surprizos esperantistajn legantojn, iometajn konservemulojn, sed tiu moderna metodo estas jam tre necesa ankaŭ por niaj revuoj!

Kaj tiam mi sentis, ke nia kunlaboro en la intereso de nova Hungara Vivo estos fruktodona.

Eble sonas eksterordinare, sed la manuskriptoj estis por li ĉiam vere granda evento, ne ĉiutaga laboro, ne griza tasko. (Eble ankoraŭ pli precize: *la sankta pasio mem!*)

Ĉar ni ambaŭ estis loĝantoj de Buda,** mia aŭtobuslinio havas haltejon proksime de lia loĝejo (en la strato Nyúl), tial estis la plej konvena solvo, se mi portas la manuskriptojn de la sekvonta numero de HV al li, al nia lingva revizianto.

Lingva revizianto – nur? En nia revuo rolis lia nomo, kiel faranto de *„Lingva revizio"*, sed kiel mi jam aludis liajn karaktertrajtojn: li povis fari nenion tiel simple.

Kiam mi transdonis la novajn artikolojn, novelojn, poemojn kaj tradukaĵojn, en tiu momento dronis ĉirkaŭ Kalocsay la tuta mondo. Kompreneble ankaŭ mi,kiu sidis antaŭ lia skribotablo. Unue li foliumis rapide la materialon, kaj poste komencis legi ion, kio interesis lin pro ia ajn kialo. Ĉefe la diskut-artikolojn, leterojn kaj la originalajn kaj tradukitajn poemojn.

Kaj laboris la plumo de redaktoro indulgema, sed ne tiel la lia. Ĉar nia „Lingva revizianto" ne kapablis tralegi iun manuskripton korektante nur la gramatikajn erarojn. Por li nek la stilo de iu skribaĵo, nek ĝia enhavo, niveloj, estis indiferentaj. Do, li kontrolis eĉ la lastan folion tiel, ke sur ĝi estis fine multaj korektaĵoj, ke mi ne povis sendi eĉ unu paĝon en la presejon.

Nur retajpite. Kaj Kalocsay tajpis denove la korektitajn manuskriptojn, tiel li redonis ĉion al mi.

Mi pensas, ke la Kara Leganto jam komprenas pli bone, kial estis ofenditaj la plej multaj aŭtoroj. Jes, parte kaj laŭvorte ili estis dankemaj, sed aliparte en iliaj animoj restis ofendiĝo. Ĉefe ĉe komencantaj tradukistoj kaj poetoj.

Ĉi tiu fenomeno: la granda, sankta pasio de Kalocsay kaj la ofendiĝo de novaj tradukistoj, talentoj estis por mi tre konata, ĉar ili ambaŭ estas homaj trajtoj.

Post unu jaro de mia redaktorado, kiam mi devis sperti ĉi tiun fenomenon kaj ĝian konsekvencon, mi provis argumenti al li, ke li ne forgesu: Kalocsay estas nur unu sola en Esperantujo, sed Hungara Vivo ne povas ekzisti sen aliaj verkistoj, tradukistoj, kaj ne povas aperi sen novaj kaj junaj literaturistoj. Tial ni, redaktoroj devas esti iomete pli toleremaj, indulgemaj.

Jen letero kiel parolema ekzemplo de niaj diskutoj:

Kara Mihály!

Mi promesis, ke mi donos mian opinion pri la poemtradukoj de s-ano Sz. en skribita formo. Nun ni jam pensas pri tio, ĉar „scripta manent",*** sed promeso estas sono – plenumo estas bono.

Bedaŭrinde, neniu el la tradukoj estas publikigebla, nek konservinda por estonta antologio. Mi ne kontestas, ke ili atestas pri laŭdinda klopodado, eĉ, pri ioma rimtrafa sagaco: la malbono estas en tio, ke malfacilas rekoni en ili la originalajn poemojn. La originalaĵoj estas bonaj poemoj, sed tiuj ĉi ne estas bonaj. Tio aparte koncernas la tradukojn el Attila *József* kaj *Kosztolányi.* Cetere tiuj, almenaŭ parte, apartenas al la kategorio de la poemoj netradukeblaj. Ekzemple, la komenco de la poemo de A. József memorigas pri la unua verso de (la tradiciiĝinta hungara traduko de) la protestanta psalmo „En vi mi fidis ekde la komenco"; la Kosztolányi-poemo rekte aludas la Primortan Predikon: „Vi vidas, homfratoj". Neniu traduko en iu ajn lingvo kapablas redoni tiujn aludnuancojn.

* Kvarko: elementa parteto pli malgranda ol elektrono, malkovrita en la lasta jardeko.

Kompreneble, tio ne eksludus, ke la traduko estu akceptebla. Sed mankas el ĝi ne nur tiu nuanco.

En la poemo de Attila József oni sentas iun amaran atmosferon de „diablo forportu ĉion!", de ŝultroleva aroganteco, kiu estas frukto de malesperiĝo, kaj ĝuste ĝi donas la spicaĵojn de la poemo. El la traduko ĉio ĉi tamen komplete mankas. Mi ne povas analizi la tutan poemon, sufiĉas mencii la lastan verson. La originalo tekstas laŭvorte: „Mi vivis, kaj pro vivo mortis jam ankaŭ aliaj", dum la traduko diras: „Mi vivis kaj la viv' finiĝas per morto". La ĉi-lasta aserto estas banala ĝeneralaĵo. Sed ja la originalo diras, ke por li – kaj tio jam okazis ankaŭ al aliaj – la vivo estas mortiga malsano. Do, ne la vivo finiĝas per morto, sed *li mortas pro la vivo,* kiel pro grava malsano. Granda diferenco! En tiu ĉi traduko la tradukinto klopodis trovi riĉajn rimojn, kaj li sukcesis en tio (*aferis-aperis, gerlenon-arlekenon, gazetojn-frazetojn*) sed, unue, tiuj rimoj forkondukas lin de la originala versteksto, – due, ĝuste en tiu ĉi poemo A. József ne uzas riĉajn rimojn, eĉ, la lasta rimparo estas tute pala: *„Jeltár-halt már"* (evidente ankaŭ per tiu rimedo la poeto volis sentigi lacecon, rezignon).

Male, en la poemo de Kosztolányi ne malhaveblas ĝuste la ludado per rimoj: la stranga efiko de la poemo fontas el la kontraŭdiro inter la morna enhavo kaj la parada verstekniko. Kaj la tradukinto ĉi tie aplikis multajn t.n. *adasismojn,* sufiksrimojn, (*bonege-treege, moralaĵo-aĵo, rigidiĝante-relikvigante, kemiaĵo-kreitaĵo*) – malgraŭ ke la esperantaj tradukistoj hontas peki tiaĵojn jam depost jardekoj – krome ankaŭ du tute surdajn asonancojn, kiujn esperantistoj tute ne aŭdas rimoj: *samaj-kunfalaj, malsamaj-saĝaj...*

Oni ne miskomprenu min, mi ne ironias. Temas pri du poemoj tre malfacile solveblaj: se la tradukinto malgraŭ siaj malmultaj praktikaj spertoj povus produkti solvon nur akcepteblan aŭ almenaŭ korekteblan, oni devus saluti lin kiel admirindan geniulon de la Esperanta tradukarto. Estas mi, kiu pleje bedaŭras, ke tiu saluto maleblas.

Mi ne volus, ke prov-tentantoj de la tradukarto – aĝe aŭ esperantiste pli junaj ol mi – rigardu min kiel verspapon aŭ eĉ verslupon mi aŭdis pri malpacemuloj, kiuj volonte konspirus por mia detronigo, sed ili apenaŭ sukcesos en tio, ĉar tronon entute mi ne havas, nur ĉ. 45-jaran tradukistan praktikon kaj ĉ. 50.000 tradukitajn versliniojn).

Se mi povas konsili ion al la komencantaj tradukistoj, tiu konsilo povas esti nur, ke ili ne kontentiĝu pri la solvoj tuj prezentiĝintaj, ili ne kontentiĝu pri la unua rimtrovo, sed ĉiam denove kaj denove ekzamenu sian tradukaĵon, ĉu ĝi estas sufiĉe fidela al la originalo en sia atmosfero, senco, sonado, tono ktp. Eble la unuajn tradukojn ili tralaboros dek- aŭ dudekfoje. Poste ju pli multe da poemoj ili jam tradukis, des pli facile ĉio iros.

Kompreneble, ankau necesas, ke oni konu la elementojn de la Esperanta versfarado. S-ano Sz. ekzemple kunrimigas la vortojn *spion'-kion.* Sed tiuj rimoj ne kunrimas, same, kiel ne kunrimas ekz. *amas* kaj *amas'.* Oni devas scii iomete ankaŭ pri la ritmo, sed tion mi ne povas detale trakti ĉi tie.

La tria poemo estas la plej facila: la diferenco inter la originalo kaj la traduko ĉi tie estas la plej granda, sed, bedaŭrinde, ankaŭ ĝi bezonas ne malmultan korektadon. Mi faris tion, tamen nur improvize; mi ne asertas, ke oni ne povus plu poluri ĝin. Cetere tiu ĉi poemo ŝajnas taŭga por la venontjara unua numero, konsiderante la 25-an datrevenon de la liberiĝo de Hungario. Ĉar mi transprenis kelkajn rimojn el la traduko de Sz., mi ne volas subskribi ĝin kiel tradukinto.

Mi ĝojus, se s-ano Sz. vidus en tiu ĉi mia opinio ne superecan tradraŝadon, sed bonintencan helpon en lia tradukista kariero, por kiu subskribinto deziras al li multajn sukcesojn.

Kun amikaj salutoj:

Budapeŝto, aŭgusto de 1969.

Kálmán Kalocsay

Ĉu Kalocsay pravis? Kompreneble; kiu povis refuti lin? Sed la konsekvenco, la fakto estis por nia redakcio, ke nek s-ano Sz. nek kelkaj aliaj provantoj tradukis plu, sed forĵetis siajn emon kaj kuraĝon por la tradukarto.

Kiam mi povis viziti lin en la hospitalo, tiam forpasis kvar-kvin semajnoj depost nia lasta labor-renkonto, ĉar intertempe ĉe la Balatono, en la verkista domo Szigliget mi komencis verki novan romanon.

Li estis ankaŭ tie parolema, eĉ serena, tamen mi vidis sur lia vizaĝo, en liaj okuloj la signojn de la morto. Ni parolis pri la lasta materialo de HV, kaj pri novaj planoj, sed fine mi petis permeson, ke mi povu ricevi de lia edzino dosierojn de Hungara Vivo, kiuj atendas sur lia skribotablo. Nur provizore, kompreneble, diris mi.

– Kompreneble! – respondis ankaŭ li kaj ridetis iomete.

Sed ni ambaŭ sciis sen eĉ unu vorto, gesto, ke definitive.

– Ĝis la revido, kara amiko! – mi diris poste. – Resaniĝu rapide, ĉar atendas Vin la legantoj... kaj la manuskriptoj!

– Mi provos... Ĝis! – diris li, kaj kiam mi haltis ankoraŭ ĉe la pordo, kuŝante li levis sian manon, movante ĝin kelkfoje, kiel malsana birdo la flugilojn. Kaj en la sekvonta minuto falis lia mano sur la murblankan peplomon. Kiel defalas sur la teron mortpafita kantanta birdo.

Tiu lasta bildo gardas lin en miaj memoroj. Liaj saĝaj, talentaj vortoj daŭre resonas en mia kapo. Kaj gardas lin la ekzemplo kiun kapablas doni nur ne-ĉiutagaj homoj.

Mi estas feliĉa, ke mi povis koni Kalocsay, kaj dum jaroj ni laboris kune por la granda afero de la Internacia Lingvo.

Tiu ĉi eseo verkiĝis por la memor-volumo pri Kalocsay, redaktata de Ada Csiszár.

---

* Homo, kompetenta pri ĉiuj sciencoj. (El la greka.)

** Okcidenta parto de Budapeŝto.

*** Skribaĵoj restas (konserviĝas). (Latinaĵo.)

Jevgenij Jevtuŝenko

Printempan nokton pensu nur pri mi,
someran nokton pensu nur pri mi,
aŭtunan nokton pensu nur pri mi,
kaj vintran nokton pensu nur pri mi.
Se ie ajn mi estos, ne kun vi,
sed fore, kvazaŭ ekster la patri',
sur friska tuk' ripozu la tali',
kiel sur mar', en kuŝa pozici',
se mola ond' balancas vin sur si,
simile ĉiam kune estu ni.

Neniam pensu min en taga lum',
ĉio sin turnus sub la taga sun',
ĉion inundus vino kaj la fum',
pri ajno eblas tage la cerbum',
perfortas pensi vin la taga nun',
sed pensu nur pri mi sub nokta lun'.

Dum ŝipa fajfo, fluga tra aer',
en vent', ŝiranta ĉion sur la ter',
bezonas mi dum mia vivo-pel',
ke en la eta ĉambro en malhel'
vi pro l' feliĉo kaj pro la sufer'
alprenu vangojn ĝis dolor-aper'.

Mi petas en silenta harmoni',
sub la bruanta pluva simfoni',
kiam penetras vitron neĝ', glaci',
se iom en la songʼ maldormas vi,
printempan nokton pensu nur pri mi,
someran nokton pensu nur pri mi,
aŭtunan nokton pensu nur pri mi,
kaj vintran nokton pensu nur pri mi.

El la rusa: Péter András Rados

Rolo de lingvo kaj literaturo en la formiĝo de la Orient-Eŭropaj nacioj

Vilmos Benczik

En la dua duono de la 18a jarcento la du partoj – okcidenta kaj orienta – de Eŭropo montris tute malsaman fizionomion. En Britujo, Francujo, Hispanujo ktp. floris ĉiam pli forte burĝiĝintaj ŝtatoj, kun esence samlingva loĝantaro. La nobelaro en tiuj landoj jam perdis siajn privilegiojn, kaj el la samlingve parolantaj nobeloj kaj nenobeloj kreiĝis la unuaj burĝaj nacioj. La akuzo – almenaŭ el lingva kaj kultura vidpunktoj – ne estis malfacila.

Dum la sama periodo, la teritorioj oriente de la linio Vieno-Prago-Berlino estis fakte nekonataj: desegnisto de lingva aŭ etna mapo povus apliki al ili nur la naivan etikedon de la mezepokaj mapistoj: „Hic sunt leones." La plimulto de tiuj ĉi teritorioj apartenis al tri grandaj imperioj: la Aŭstra, Turka kaj Rusa.

Kaj tiuj teritorioj estis ege postrestintaj. Se okcidenteŭropano traveturis ilin, li estis frapita de la mizero kaj malriĉeco. Nostalgie li repensis al sia civilizita patrujo, kaj ekhavis fortajn dubojn, ĉu tiu ĉi orienta parto de Eŭropo iam povos atingi tiun nivelon de ekonomia, socia kaj kultura evoluo, kiun jam atingis okcidentaj landoj.

La kamparanoj kulturis la agrojn kun tre malmulta efikeco kaj tre ofte malsatoj trakuris la orientajn regionojn. Tiuj kamparanoj en Aŭstra kaj Rusa imperioj estis servutuloj, personoj ankaŭ jure dependantaj de siaj mastroj: do, ili ne estis civitanoj. Sed eĉ granda parto de la nobelaro vivis malriĉe, precipe en Polujo kaj Hungarujo. En tiuj landoj nobeloj estis multaj, kaj pro tio havis ofte nur kelkajn dekojn da hektaroj. Tamen ili fiere deklaris sin elitularo, kaj rifuzis havi iajn komunajn trajtojn kun la servutuloj. Hungaraj nobeloj ekz. uzis oficiale la latinan lingvon, per ĝi ili nomis sin *„natio hungarica"*, al kiu *„natio"* apartenis ankaŭ slovakaj, germanaj ktp. nobeloj de la historia Hungarujo, sed la hungarlingve parolantaj nenobeloj estis forfermitaj el ĝi. Do, tiu *„natio"* havis nenion komunan kun la nuntempa *„nacio"*. Polaj nobeloj estis eĉ konvinkitaj, ke ili havas alian devenon, ol la servutuloj: ili pensis sin posteuloj de Sarmatoj, antikvaj loĝantoj de Orienta Eŭropo.

Okcidenteŭropano rimarkus ankaŭ, ke sur tiu ĉi teritorio vivas tre multaj popoloj: preskaŭ dudek. Kaj ili eĉ ne vivas inter la limoj de la sama imperio. Ekz. post 1795 poloj vivis en tri ŝtatoj: Aŭstrujo, Rusujo kaj Prusujo. Sed eĉ en opaj regionoj mankis homogeneco : en la nuna Slovakujo servutuloj estis slovakoj, bienuloj hungaroj, urbanoj germanoj. Eĉ tri apudaj vilaĝoj povis esti loĝlokoj de tri diversaj gentoj.

Ne mirinde do, ke ĉe la subevoluintaj komunikaj ebloj inter la samlingvanoj mankis ajna formo de solidareco, sento de kunaparteno. Malhelpis tion ankaŭ la multaj dialektoj: oni povas diri, ke regis vera lingva anarkio.

Kompreneble, la lingvo de la servutuloj ludis nenian rolon en la oficiala kulturo kaj ŝtata administrado. En tiuj roloj funkciis tri grandaj lingvoj: en la Aŭstra Imperio la germana, en la Rusa Imperio la franca, kaj en la Balkano la greka. Havis signifan rolon ankaŭ la latina lingvo, precipe ĉe hungaroj kaj kroatoj.

Fine de la 18a jarcento en kelkaj regionoj de Orienta Eŭropo – ĉefe en Ĉeĥujo – rapidiĝis la ekonomia evoluo. El la filoj de tiuj malgrandaj popoloj kelkaj atingis germanajn aŭ italajn universitatojn, kaj tie ili konatiĝis kun la ideoj de la klerismo. La freŝaj ideoj pensigis tiujn junajn intelektulojn pri multo: libereco, socia progreso, raciismo. Ili povis vidi la florantajn okcidentajn naciajn ŝtatojn. La junaj orienteŭropanoj facile tiris la konkludon: Francujo, Anglujo ktp. atingis sian grandecon dank' al siaj memstareco politika kaj kulturo nacia. Reveninte hejmen, tiuj junuloj provis „veki" siajn samlingvanojn, kaj konsciigi ilin pri ilia sloveneco, rumaneco ktp.

Almenaŭ sur la teritorio de la Aŭstra Imperio al la „vekiĝado" de la nacia sento multe kontribuis ankaŭ la intensa germaniga kampanjo fare de Jozefo la Dua, kiu kampanjo cetere havis tute praktikan celon: elimini la problemojn de multlingveco en la imperio. Tiu provo de germanigo paradokse rapidigis procezon malan: ekevoluon de la popolaj lingvoj.

Tiuj popoloj, kiuj havis propran nobelaron, estis en situacio iom pli bona, ĉar la disvolviĝon de la nacia sento akcelis ankaŭ la t.n. „nobela naciismo", t.e. regiona-landa solidareco inter la nobeloj. Ĉe popoloj sen propra nobelaro povis funkcii aliaj faktoroj, kiel ribelo kontraŭ kulture-religie tre fremda regado (ekz. ĉe Bulgaroj).

Resume: dum la jarcento inter 1750 kaj 1850 en tuta Orienta Eŭropo komenciĝas ia „fermentado". Malgranda grupo da intelektuloj, helpate foje-foje de iuj tavoloj de la nobelaro, ĉefe laŭ okcidentaj instigoj ekkonscias pri ekzisto de bulgara, slovaka, hungara ktp. nacioj, kaj vartas belajn revojn pri iama sendependa ŝtateco, ĉefe tiam, se la koncerna popolo dum la mezepoko havis propran feŭdan ŝtaton. Sed la centraj regantoj de la koncernaj imperioj ne aparte salutus ajnan formon de separatismo, do la ebloj de politika agado estis malgrandaj. Krome, hungara, kroata, estona ktp. nacio en tiu tempo ekzistis nur en la kapo de dekkelkaj homoj: la servutuloj, parolantaj tiujn lingvojn, ankoraŭ sentis nenian solidarecon inter si. Antaŭ ol komenci intensan politikan agadon, necesis krei la nacian konscion en la tuta popolo.

Por tio la unua paŝo devis esti farita sur kampo lingva, ja evidentas, ke la membroj de la prirevitaj estontaj nacioj devos kompreni unu la alian. Kaj unuecajn naciajn lingvojn tiuj popoloj tute ne havis.

Ne refutas tiun ĉi aserton eĉ elstaraj literaturaĵoj, kreitaj ĝis la 18a jarcento. Ili verkiĝis en dialektoj, kaj parolantoj de aliaj dialektoj povis kompreni ilin nur malfacile aŭ entute ne.

La apostoloj de la nacia ideo do ekagis sur kultura kampo. Kaj farendaĵoj estis ne malmultaj. La lingvoj de la orienteŭropaj popoloj havis malsaman evolunivelon – ekz. la pola estis pli evoluinta ol la estona –, sed ili estis senescepte postrestintaj kompare al la okcidentaj lingvoj. La kialoj de tiu ĉi postrestinteco estas evidentaj. Orienteŭropaj lingvoj apenaŭ estis uzataj en la ŝtata administrado, kaj dum longa tempo ili jam ne funkciis kiel portantoj de alta kulturo. Edukitaj homoj legis ĉion en la jam cititaj grandaj lingvoj. Se la popolaj lingvoj tamen uziĝis foje-foje por nevulgaraj celoj, pro la grandega proporcio de neeviteblaj fremdaj vortoj ili fariĝis preskaŭ nerekoneblaj. Favore influis la okupiĝon pri popolaj lingvoj ankaŭ la tiam disvastiĝanta romantismo per sia speciala atento al la popola poezio.

Tiu konscio pri la graveco de la nacia lingvo montriĝis unue plej forte en Polujo, kiu ĝuste tiam estis perdanta iom post iom sian politikan memstarecon. *Nacia Eduka Komitato,* kreita en 1773 fakte estis la unua ministerio de edukado en Eŭropo. Samtempe disvolviĝis ankaŭ kampanjo por forigo de fremdaj vortoj el la pola lingvo. („Demakaronigo".)

Rusujo praktike ĉiam estis lando sendependa, tamen rusojn kunligis ne ia nacia solidareco, sed la persono de la caro. La nacia konscio komencis vere disvolviĝi nur post la venko kontraŭ Napoleono. La kultura „ĉiofarulo" de tiu naciigo estis Lomonosov. La rusa lingvo bezonis ne nur purigon, sed ankaŭ signifan novigon. Aro da artefarite kreitaj aŭ derivitaj vortoj estis enkondukitaj por esprimi modernajn nociojn, ekz. *obŝĉestvo* (socio) ktp.

Ĉehujo estis ekonomie evoluinta regiono, tamen la procezon de

naciiĝo malhelpis ĉi tie pluraj specialaj cirkonstancoj, interalie la grandnombra germanlingva logantaro. La starto de la kultura renaskiĝo estis verko de Josef Dobrovsky pri la ĉeha lingvo. Poste, ĉefe dank' al la agado de J. Jungmann disvolviĝis intensa lingvonovigo, faranta taŭga la ĉehan lingvon por moderna uzado. Rekono de la slava parenceco (okaze de tramarŝo de rusaj soldatoj) donis pluan impulson al la okupiĝo pri la ĉeha lingvo. Ekde la jaro 1816 la ĉeha lingvo fariĝis studobjekto en la mezlernejoj, kaj tio donis kvazaŭ garantion pri ĝia konserviĝo kaj disflorado de la ĉeĥlingva kulturo. Estas notinde, ke pro la malgrandeco de la ĉeĥlingva teritorio, pro la alta nombro de urbanoj kaj pro la intimaj ligoj de la ĉeha burgaro al Vieno, inter la orienteŭropaj lingvoj estis ĝuste la ĉeha, kiun plej serioze minacis iom-post-ioma forvelko kaj morto.

Herder siavice antaŭdiris baldaŭan formorton de hungaroj. Li eraris, kaj tio ŝuldiĝas al la intensa naciiga procezo, kies bazon kreis Ferenc Kazinczy, per lanĉo de lingvonoviga kampanjo. Dum ĉ. nur jardeko estis enkondukitaj miloj da novaj vortoj, ofte tute artefaritaj. Sed ĉar tiuj vortoj estis bezonataj, ili rapide radikiĝis. Eĉ nun, post preskaŭ du jarcentoj, necesus aparta lerteco redakti mezlongan hungaran frazon, evitante la tiam enkondukitajn vortojn.

Estas notinda apartaĵo de la hungara lingvonovigo, ke ĝi kreis ne nur vortojn, necesajn por modernaj nocioj. Estis enkondukita ankaŭ signifa kvanto da poeziaj neologismoj, por havigi belsonajn vortojn kaj sinonimojn al la poetoj. Kazinczy mem estis fervora tradukisto, kaj li sentis la leksikan malriĉecon de la hungara lingvo. Tamen, relative granda parto de tiuj poeziaj neologismoj baldaŭ formortis.

La kroata nobelaro apartenis al la *„natio hungarica"*, t.e. hungarlanda nobelaro, kiu uzis la latinan lingvon. Nur kiam fortiĝis la hungara naciiga procezo, kaj oni volis trudi la hungaran lingvon ankaŭ al kroatoj, ili konsciiĝis pri sia aparteco. „Vekiĝis" ankaŭ la kroata popolo, kaj post la lingvoreformo de Vuk Karadžić ĉ. 1830, faranta la Hercegovinan dialekton nacia lingvo, rapide disvolviĝis la nacia kulturo. Baldaŭ aperis la unua granda poeto: Ivan Mažuranić. Cetere ankaŭ ĉe kroatoj disvolviĝis signifa lingvonovigo, ĉerpanta inspiron ĉefe el la samcelaj ĉeĥaj strebadoj.

En la sama tempo disvolvis batalon France Prešern kaj lia movado por la oficiala uzo de la slovena lingvo.

Dum ĉeĥojn minacis germaniĝo, slovakoj devis pruvi sian apartecon disde hungaroj, tiom pli, ke la slovaka nobelaro jam preskaŭ plene hungariĝis. Manke de ĉia politika aŭtonomio, por slovakoj la vere sola vojo por naciiĝo estis tiu de la kulturo. Post kelkaj aliaj provoj, ĉ. la jaro 1840 L'udovit Štur sukcesigis la mezslovakan dialekton kiel nacian lingvon.

Ĉe rumanoj la intereŝiĝo pri la propra lingvo vekiĝis pli frue, ĉ. la jaro 1700, lige kun la kreiĝo de la grek-katolika eklezio. Pastroj, ekstudantaj la latinan, rimarkis ĝian parencecon al la rumana lingvo. Tamen, vera kultura aktivado disvolviĝis nur fine de la 18a jarcento, ĉefe dank' al la agado de *Scoala Ardeleană* (Transilvania Skolo). La poeto Jenachita Văcărescu – kiu ne apartenis al tiu skolo – en 1787 eldonis rumanan gramatikon, kaj ankaŭ provis riĉigi la rumanan lingvon per vortoj prenitaj el la itala.

En Bulgario la parolata, popola lingvo venkis la eklezian bulgaran lingvon nur ĉ. la jaro 1850. Estas notinde, ke bulgaroj pli frue havis bonan literaturon, ol interkonsentitan literaturan lingvon.

Ukrainoj kaj belorusoj estis en situacio ekstreme malfavora, ja iliaj lingvoj estis konsideritaj nur kiel dialektoj de la rusa. La unua ukraina gramatiko, verkita de A. Pavlovskij, aperis nur en 1818, sed per la poezio de Taras Ŝevĉenko ukrainoj baldaŭ pruvis sian apartecon. Responde la caro en 1863 malpermesis uzon de la ukraina lingvo.

La lingva movado de estonoj kaj latvoj disvolviĝis en la unua duono de la 19a jarcento. Ĉe estonoj la lingvoformiĝon multe stampis la apero de *Kalevipoeg*. Litovoj devis rezisti du danĝerojn: poliĝon kaj rusiĝon. Ankaŭ ilia kulturmovado komenciĝas nur en la 19a jarcento.

Kiel ni vidis, praktike ĉiuj orienteŭropaj popoloj dum nur kelkaj jardekoj ellaboris por si bone uzeblan, por la tiutempaj oficialaj kaj literaturaj bezonoj pli-malpli taŭgan lingvon. Tiu lingvo estis ilo por akceli la naciigan procezon. La logika sekva paŝo estis uzi tiun lingvon por verki literaturon. Pli precize, beletron, ja la malgranda specialistaro de la epoko ne povis vivteni eldonadon de faka literaturo; escepto estis agrikulturaj libroj, kiujn parto de la nobelaro volonte aĉetis.

La beletro servis samtempe du celojn. Per sia ekzisto ĝi pruvis, ke en la koncerna lingvo povas verkiĝi beletro. Ĉar beletro tiutempe nepre estis rigardata kulmino de la uzado de kiu ajn lingvo, la nove naskiĝantaj – pli precize: naskitaj – naciaj lingvoj volis tiamaniere pruvi sian egalecon kun la okcidentaj kulturlingvoj. Samcele estis plenumitaj ankaŭ vastaj tradukprogramoj. Tradukistoj tre ofte plenumis sian laboron ne pro persona inklino, sed pro devosento: tial ekzemple Jungmann tradukas al la ĉeha *La Perditan Paradizon* de Milton, kaj plurajn verkojn de Chateaubriand kaj Goethe, malgraŭ tio, ke la ebla ĉeha legantaro de tiuj verkoj povis legi ilin ankaŭ en la originala lingvo. Sed aŭdante pri tiuj tradukoj, oni pensis: se en la ĉeha lingvo oni povas legi tiajn ĉefverkojn, do tiu lingvo fakte ne povas esti postrestinta!

La dua celo de la nove naskiĝanta beletro estis tute eksterlingva. Notinde, ke la tiutempa beletro montras ekstreman similecon en ĉiuj orienteŭropaj landoj. Tiu ĉi beletro ne servis amuzon, sed volis veki, fortigi kaj varti la nacian konscion de la legantoj. Ĝia plej ofta temo estis la glora nacia pasinteco: se mankis sufiĉe da pragloro, do oni utiligis sian fantazion, kaj kreis ĝin laŭbezone. Elformiĝis firma konvinko pri la graveco de la propra nacio, kaj la beletro estis potenca impulsilo de la disvolviĝantaj naciaj movadoj. La troemfazo de sia propra aparteco, de la propraj valoroj, en tiu tempo ludis nepre pozitivan rolon, sed en la dudeka jarcento ĝi fariĝis fonto de tro multaj tragedioj.

Tian evoluon de la beletro difinis ankaŭ la malgranda nombro de intelektuloj en la orienteŭropaj landoj. Ili ne povis „specialiĝi": poetoj kaj verkistoj ne povis forfermi sin el la socia batalo, plej ofte ili fariĝis ĉefaj gvidantoj kaj motoroj de la naciaj movadoj, tiom pli, ke ili mem ekirigis ĝin.

Estas necese diri ĉi tie kelkajn vortojn ankaŭ pri la praktikaj kondiĉoj de la naskiĝo de tiuj literaturoj. Ĉe la komenco ili povis trovi apogon ofte nur ĉe malpli ol cento da homoj en la opaj landoj. Tiuj malmultaj homoj jam sentis sin sentimente ligitaj al sia naskiĝanta – aŭ naskiĝonta – nacio, kaj aĉetis la nacilingve verkitajn librojn. Tion ili faris malgraŭ ke la nacilingvaj literaturaĵoj – krom malmultaj esceptoj – multrilate estis primitivaj, neniel konkurkapablaj kun mondliteraturaj ĉefverkoj. La paradokso de tiu situacio estis, ke legkapablaj kaj legemaj homoj senescepte sciis plurajn lingvojn, dum tiuj personoj, kiuj konis nur la propran lingvon – ne sciis legi. Restas neniu dubo, kio sekvus el tio, se tiu cento da homoj tiam rezonus pragmatisme: kial mi legu en la hungara lingvo grincantajn versojn, se mi povas legi Horatius kaj Goethe en la originalo?

Sed la rondo de la homoj, kiuj forĵetis ĉian pragmatismon, kaj *kredis* je la propra nacia renesanco, konstante kreskis. Krom la literaturo multe kontribuis al tio ankaŭ la teatro.

Teatro havis multajn eblojn: antaŭ ĉio, ĝi povis atingi ankaŭ analfabetojn kaj tiujn personojn, kiuj ne emis legi librojn. Krome, la cenzuro ne povis tiel rigore kontroli ĝin, kiel libroeldonadon. La luktado kun la cenzuro konstante bremsis la disvolviĝon de la naciaj kulturmovadoj. Tiuj luktoj foje-foje havis ankaŭ interesajn sekvojn, kiel ekzemple la specialan evoluon de pupteatro en la ĉeha kulturo: nome, la cenzuro, ne konsiderante ĝin „serioza" arto, lasis al ĝi liberecon, kian ordinara teatro ne povis havi.

En pluraj landoj kreiĝis vagantaj teatraj trupoj, kiuj kun patriotisma heroeco vekis en la homoj amon al la propra lingvo kaj al la propra nacio. Kelkloke tiuj trupoj ne forvelkis eĉ post la elformiĝo de la nacioj, sed ludis tre karakterizan – opozician – politikan rolon. Ano de tia trupo estis ankaŭ la patro de Julio Baghy.

Kiel jam dirite, pro la nesufiĉa evoluinteco de la sociaj rilatoj, literaturo en Orienta Eŭropo devis plenumi ne nur taskojn estetikajn, sed ankaŭ lingvoevoluigajn, politikajn, ideologiajn ktp. Tiuj taskoj siatempe senescepte ligiĝis al la procezo de naciiĝo. Pro tio literaturo kaj nacio por orienteŭropanoj estas nocioj nedisigeblaj: malfacile ili povas imagi literaturon, kiu ne kreiĝis en naciaj kadroj. Tiun penson fortigas ankaŭ naciaj literaturhistoriaj verkoj: kvankam estis ne malmultaj verkistoj en Orienta Eŭropo, kiuj kreis en du lingvoj, naciaj literaturhistorioj preskaŭ plene ignoras iliajn alilingvajn verkojn.

En tiu tempo la orienteŭropa legpubliko elformis ankaŭ sian poetan kaj verkistan modelon. Por orienteŭropa homo poeto kaj verkisto ĝis nun estas antaŭ ĉio „konscienco de la nacio". Almenaŭ ĝis la unua mondmilito poetoj kaj verkistoj estis la ĉefaj fermentigantoj de la socia progreso, sed eĉ en la nuna tempo ilia socia efikeco estas multe pli granda, ol tiu de siaj okcidenteŭropaj kolegoj. La registaroj de Orienta Eŭropo ĉiam bone sciis tion, kaj donis specialan atenton al la literaturo.

Vladimir Beekman

Lumo de Orienta Europo

Tiu situacio sekvigas grandan prestiĝon por la literaturo, tamen ĝi kaŭzis ankaŭ negativaĵon. La granda socia respondeco signife bremsis la internan evoluon de la literaturo, nome, la socia orientiĝo englutis signifan parton de la intelektaj energioj de la verkistoj. La bezono alparoli kiel eble plej multajn homojn, efikis bremse al la progreso, t.e. komplikiĝo de la internaj strukturoj. Tamen, la orienteŭropaj literaturoj ne postrestis signife al la okcidentaj: anstataŭ evolucio okazis pluraj estetikaj revolucioj, kiuj certigis preskaŭan sinkronecon.

Dum la lastaj du jardekoj la orienteŭropaj nacioj atingis socian konsolidiĝintecon pli frue neviditan en tiu parto de nia kontinento. Tio iom post iom liberigas la literaturon disde tiuj sociaj kaj politikaj taskoj, kiuj sekvas el la praktika agado. Tiel eblas pliprofundiĝo de la interna evoluo, sed, kompreneble, la forta socia orientiteco de tiuj literaturoj ne ĉesis, eĉ, ĝi fariĝis pli profunda kaj penetra. La konservon de tiu tradicio helpas ankaŭ la ideologia fono de tiuj landoj.

Fine de la prelego eble estas utile citi kelkajn vortojn pri ĝia celo. Mi konfesas, ke mi elektis tiun ĉi temon unuavice kiel esperantisto, kaj nur duavice kiel orienteŭropano. Ja okulfrapaj estas la similecoj inter la naskiĝo de la orienteŭropaj naciaj lingvoj, kaj la ĝisnuna vojo de Esperanto. Multaj similecoj montriĝas ankaŭ inter la naskiĝo de tiuj nacioj kaj la esperantista kultura komunumo. Mi estas konvinkita, ke en la interna fortigo de nia movado kaj la evoluigo kaj disvastigo de nia kulturo la pritraktitaj orienteŭropaj kulturaj kaj naciaj movadoj povas servi kiel bona modelo. Ja la montritaj orienteŭropaj modeloj pruvas la eblon de malspontanea lingva kaj kultura evoluo, kaj tiun argumenton devus pli intense uzi ankaŭ nia propagando. Estus necese, ke esperantistoj studu iom tiujn movadojn, kiuj povis sukcesigi ŝajne senesperajn aferojn per sindona laborado kaj lerta utiligo de la homa psikologio. Esperanto kreiĝis en Orienta Eŭropo – ĉu eble ankaŭ la modelo de ĝia sukcesigo estas trovota tie?

Prelego farita ĉe la Internacia Somera Universitato dum la 64-a UK en Lucerno. La aŭtoro ĉerpis plurajn datojn kaj konstatojn el la hungarlingva libro de E. Niederhauser: „Naskiĝo de nacioj en Orienta Eŭropo".

Enkonduko

(Fragmentoj)

Orienta Eŭropo –
senfina malgajo de ebenaĵo,
lando de melankolia pensado.
La tero glata kiel maro,
la maro inter la bordoj kiel rivero,
la riveroj kvietaj kiel lagoj,
la lagoj senmovaj kiel marĉoj.
Arbaroj, marĉoj, vilaĝoj,
urboj ŝtonpavimaj –
polvoplenaj en foirtagoj,
ordinare senhomaj kaj ventaj.
Fore de grandurba lukso,
de novaj terenkonkeroj,
de famo pri vireco kaj belo,
fore de l' caro kaj dio,
sed proksime al sia najbaro ...

En Orienta Eŭropo,
de Finna golf ĝis turka limo,
la piedoj pastlo-vestitaj[x]
paŝis laborante kampulo,
aspergis estonan herbejon,
samkiel ankaŭ montodeklivojn Balkanajn
oni aspergis per sala homŝvito,
sengrasa kiel akvo en Mazuriaj lagoj.

Ĉi tie
fibrandon drinkis nupto – kaj baptofestantoj
pro lupe mordanta enuo.
En la glason de supre falis
pro tediĝo mortintaj muŝetoj.
Per fingro for la fiaĵon!
Drinkado sovaĝa, kaj interbatado
per bastono kaj ŝtono.
Ĝis sango.
Tiel tio estis.

Ĉi tie
pro terparceleto oni procesis,
per magra lakto trinkigis bovidojn,
per kvaso – la infanojn.
Por ŝerco malica najbaran puton oni fiigis.
Ankaŭ tiel estis.

Sed ĉi tie
Romanov'oj kaj Radzivill'oj,
Bat' a kaj grafoj Esterházy,
reĝo Carol kaj la bulgara caro –
unu iom pli frue, alia pli malfrue –
faske kunligite
estis senditaj ...
Per unu vorto – ien malproksimen.

Mi scias nun:
la salo de la Tero estiĝas ĉi tie,
en Orienta Eŭropo.

El la estona: Hilda *Dresen*, Jaan *Ojalo* kaj Hillar *Saha*

Rimarko: *Lumo de Orienta Europo* aĉeteblas ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 3,60 gld., ĉe la Libroservo de HEA kontraŭ 10,- forintoj.

[x] Pastlo: - kamparana ŝuo, farita el unu peco da ledo.

Ligno-skulptarto en Hungario



Pál Lőcsei: Maria

Zsuzsa Lóránt: Knabino kun harplektajoj



Inter la materialoj de la skulptarto la plej malnovaj estas ŝtono, marmoro, diversaj metaloj, sed la plej bela estas ligno. Kial? Tial, ĉar ĝi estas trovebla ĉie, oni povas formi ĝin facile, kaj ĉefe la eksteraĵo, la desegno-efekto de la lignaj statuoj estas ankaŭ mem tre artisma, ofte eĉ pitoreska.

Apud la ŝtonaj, marmoraj kaj bronzaj skulptaĵoj tial gardas la memoron de la pasintaj jarcentoj ankaŭ multaj lignaj skulptaĵoj. Estas konate, kiom da artaĵoj en Hungario detruis la invadoj kaj regadoj de tataroj, turkoj, Habsburgoj, la du mondmilitoj, tameń, laŭ la restaĵoj la hungara gotika ligno-skulptarto havis Eŭropan rangon. Sufiĉas prezenti ĉi tie nur la plej elstaran hungaran skulptiston de la gotika epoko, Pál Lőcsei, el la fino de la 15-a jarcento. Lia verko *„Maria"* estas videbla en la preĝejo de Levoča (en Slovakio). Kiu kreis tiun ĉi belegan vizaĝon kun transcendaj trajtoj, tiu sciis verŝajne ĉion pri la homo, pri la historio de la homaro, kaj nepre ĉion pri sia profesio.

Mi opinias, ke tiu ĉi historia tradicio klarigas, kial en nia nuntempa artvivo estas tre grava kaj atentinda la ligno-skulptarto. Inter niaj plej talentaj skulptistoj troviĝas Jenő Szervátiusz, István Szabó, Pál Kő, László Cs. Kovács, kies ŝatata materialo estas ligno. En 1979 oni povis vidi la riĉan verkaron de István Szabó en la Hungara Nacia Galerio, kaj individuajn ekspoziciojn de László Cs. Kovács, Pál Kő, Jenő Szervátiusz, András Koczogh kaj László Rajki. Kaj en aŭgusto oni aranĝis en Budapeŝto komunan ekspozicion, kies titolo estis: „Ligno-skulptarto 1979".

La ekspozicion inaŭguris Pál Kő, kiu dum kelkaj jaroj fariĝis majstro de la ligno-skulptarto: liaj verkoj montras grandan talenton kaj originalecon. Unu el liaj plej belaj pecoj estas: „Chagall kaj mi".

„Ramses" – statuo de László Cs.Kovács montras la karakterizajn eblojn de la nuntempa skulptarto, kiel ankaŭ la verko de Zsuzsa Lóránt: *„Knabino kun harplektaĵoj"*, ĉar ironio kaj humuro, heroismo kaj intimeco samgrade estas ĉefmotivoj de la skulptarto.

Mihály *Gergely*

László Cs. Kovács: Ramses

Pál Kő: Chagall kaj mi



PANORAMO



János Szentágothai (dekstre) kun Angel Balevski okaze de la solenaĵo

Bulgara distingo por hungara akademiano

János *Szentágothai,* akademiano, prezidanto de la Hungara Scienca Akademio estis elektita honora membro de la Bulgara Scienca Akademio. Angel Balevski, prezidanto de la Bulgara Scienca Akademio transdonis la diplomon, la distingan medalon kaj la insignon al János Szentágothai, profesoro de anatomio en la Budapeŝta Medicina Universitato. Dum la solenaĵo ankaŭ al Ferenc *Márta,* ĝenerala sekretario kaj al István *Láng,* anstataŭanto de ĝenerala sekretario de la HSA estis transdonitaj la distingaj medaloj de la BSA.

La solenaĵon partoprenis István Roska, vicministro de eksterlandaj aferoj, Rudolf Rónai, prezidanto de la Instituto pri Kulturaj Interrilatoj kaj Vladimir *Videnov,* Budapeŝta ambasodoro de Bulgario.

Nova gumfabriko

Nova gumfabriko estis inaŭgurita en Nyiregyháza (orienta Hungario). En ĝi estas produktataj grandmezuraj gumbendoj por traktoroj kaj aliaj grandaj agrikulturaj labormaŝinoj. Ĉi tiujn radial-gumbendojn Hungario importis ĝis nun, sed la produktado de la nova fabriko laŭ la „Know-how" (scii-kiel), aĉetita de la entrepreno BF Goodrich (Usono) facile kovros ne nur la enlandan bezonon, sed ebligos ankaŭ signifan eksporton. Per ĉi tiuj tipoj de radial-gumbendoj estas eble ŝpari ĉ. 5-15 procentojn de la konsumado de materialo, sed samtempe kreskas la tirforto kaj la vivodaŭro de la bendoj.

Inaŭguro de nova uzino de gumbendoj en Nyiregyháza

Malgranda popolo – granda literaturo?

La supra titolo aperis angle kaj france sur kovrilpaĝo de volumo eldonita de la Unuiĝo de Hungaraj Libroeldonejoj kaj Librokolportistoj. La iniciatinto de la eldonaĵo estis György Gera, ĉefredaktoro de Fremdlingva Libro-revuo kiu fervore klopodas popularigi la hungaran literaturon eksterlande. Nelonge antaŭ sia morto li komencis larĝskalan korespondadon kun kontribuo de pluraj kunlaborantoj. Verkistoj, poetoj petis siajn eksterlandajn amikojn, konatojn skribi pri sia opinio, kiel estus eble entiri pli malgrandajn naciojn en la cirkuladon de la universala intelekta vivo. La amaso da respondoj – pli ol cent leteroj – pruvas, ke la problemo ĉie ardas. Respondis al la leteroj *Lundkvist,* Arthur *Miller,* Gyula *Illyés,* kaj *Krleža, Różewicz* kaj C.P.*Snow.* Respondoj venis de finnoj, ĉeĥoj, rusoj, kaj francoj. Multaj verkis eĉ eseon pri ĉi tiu grava demando de la kulturo kaj tradukarto. Kelkaj respondoj estas verkistaj kaj tradukistaj konfesoj de pasia voĉo.

Plejparto de la leteroj rimarkigas, ke popoloj, vivantaj en lingva izoliteco ne rajtas sinforlasante atendi ĝis oni malkovras iliajn literaturojn. Ili devas rekoni, ke multloke libroj unuavice estas komercaĵoj, por kiuj oni devas certigi debiton.

La verkistoj emfazas samtempe signifan rolon de personaj kontaktoj kaj por tio instigas aranĝi konferencojn, renkontiĝojn kien estu invitataj krom verkistoj kaj tradukistoj ankaŭ reprezentantoj de eldonejoj. Ili asertas, ke plej efika peranto estas amikeco.

Urbo de nia deziro

Csillebérc estas mondkonata kampadejo por pioniroj en granda parko, sur arbarorica monto ĉe Budapeŝto. Ofte renkontiĝas tie infanoj ne nur el la

La estonta urbo – laŭ infana fantazio



Foto: Béla *Somhegyi*

PANORAMO

najbaraj, sed ankaŭ el malproksimaj landoj. La alternaj dusemajnaj tendumadoj ĉiam havas specialajn temojn. La ĉisomera arta faktendaro estis granda

Krei estas agrable

Ni eternigu la kreaĵon!



eksperimento kun la komuna temo; Urbo de la futuro. En la ses subtendaroj laboris infanoj el ĉiuj anguloj de Hungario kaj prilaboris diversajn taskojn: kiel aspektos la komunikado, la arta vivo, la kontakto kun aliaj planedoj ktp, en la estonta urbo. Ili ricevis la necesajn materialojn, valorajn instrumentojn por sia krea agado. Ni prezentas bildojn pri unu el ĉi tiuj grupoj, kie 12-14 jaraj geknaboj okupiĝis pri filmfarado. Kunlaborante kun juna filmreĝisoro ili konstruis urbon sur grandan tablon, uzante forĵetaĵojn, falintajn branĉojn, plaston kaj multe da fantazio. Tiu ĉi „urbo de nia deziro" estis interesa studo. La infanoj ne revadis pri subteraj mirindaĵoj, pri superteknizita mondo: ilia plano ĝuste tial ofte fariĝis kritiko pri la nuna vivo. Ili konstruis vastajn domojn, kie komforte povas vivi kune eĉ tri generacioj, La fabrikoj estis tute ekster la urbo en kies centro bela parko etendiĝis kun lago kaj granda ludejo. La figurojn de la fantazia urbo ili „animis", same ankaŭ la aŭtojn, la karuselon, la pilkojn, la aeroplanojn, la ĝirafon kaj filmis la unuopajn movojn. Post pacienca kaj lerta laboro fine moviĝis bunta mondo de riĉa infana fantazio sur ilia filmo „Urbo de nia deziro".

Por francaj teatroamantoj

La *Eldonejo de Francaj Orientalistoj* kaj la hungara *Eldonejo Corvina* kune aperigis en Parizo kolektaĵon kun titolo „Nuntempa hungara teatro". La du volumoj entenas teatraĵojn de dek hungaraj dramverkistoj. Okaze de la prezentado al la ĵurnalistoj, Péter Nagy, akademiano, kiu verkis ankaŭ la enkondukon de la libro, prelegis pri la signifo de la moderna hungara dramo.



Ernő Rubik, la inventisto, kun la „mistera" kubo

Foto: Lajos *Székely*

La mistera kubo de hungaroj

Ĉi tiun nomon donis la raportisto de la Londona gazeto *Computer Talk* al ludilo, inventita de juna hungara arkitekto-pedagogo Ernő *Rubik*. Instruante en la Artindustria Altlernejo li rimarkis, ke la gejunuloj tre malfacile povas vidi en tri dimensioj. Li konstruis unue sian kubon por lerneja helpilo, sed finpretiginte la modelpecon ankaŭ li mem konsciiĝis, ke ĉi tiu ludilo enhavas grandan kaj multflankan valoron.

La plasta kubo kun eĝoj de 5 centimetroj, konsistas el pluaj 27 kuboj moveblaj ĉirkaŭ ses aksoj en ĉiujn tri direktojn de la spaco. La edroj de la kubo havas malsamajn kolorojn en la originala situo. Sed ekmovinte la kubetojn la edroj fariĝas multkoloraj kaj retrovi la ekiran situon postulas multe da kapablo por kombino kaj multe da pacienco. En la Budapeŝta Internacia Foiro 1978 la ludilo estis premiita kaj de tiam eksportita al FRG, Aŭstrio, Francio, Svislando, Hispanio, Italio al Skandinaviaj- kaj al Beneluks-landoj. En la BIF 1979 Usono kontraktis pri 1 miliono da kuboj kaj ludilo-trusto „Ideal" de Novjorko, per granda propagando antaŭpreparas la encirkuligon de la mistera hungara kubo.

Ne nur homojn de forta negoca senso ekscitis ĉi tiu sprita ludilo. Scienculoj, matematikistoj, psikologoj, pedagogoj rekonis ĝian valoron kaj ĉe teoriaj studoj kaj ĉe ekzamenado kaj evoluigo de kapablo al logiko kaj vidpovo en tri dimensioj.

REVUO DE REVUOJ

Por internacia lingvo estas unuaranga problemo ĝuste ĝia internacieco. Oni riskas ĝian ekzistorajton, se naciismaj tendencoj tro enŝoviĝas en la lingvon, se ĝi ricevas ian anglecan aŭ francecan, eventuale alispecan emajlon. Ne hazarde aperas diversflanke tiurilate seriozaj avertoj. Apud filoj de Eŭropaj nacioj ankaŭ orientanoj levas sian voĉon kontraŭ tia misvojo. De orientanoj tre bonvena ŝajnas, ke ili ĉiam akcentas la volon ne sekvi Eŭropanojn per enkonduko de japanaj, ĉinaj vortsencoj, apartaj de okcidente kutimaj sencoj. En nia pasintjara nro 5. mi raportis jam pri tia averto el Koreio, ke ofte senkonscie oni konfuzas siajn nacilingvajn vortojn kun la Esperantaj, eble pro simileco. Japana gazeto LA VERDA KOLOMBO publikigis pledon kaj plendon kun multaj citaĵoj, kiujn Eŭropanoj facilanime altrudas kiel *kromsencojn* – el siaj lingvoj prenante ilin.

Por montri la problemon, tiom pezan por orientanoj, staru tie ĉi kelkaj ekzemploj: (ies nomon) „li elsuĉis el sia *fingro*": (sin vesti per) *„krie* verdkolora ĉemizo"; (NN ĵurnalisto estas) „eminenta *plumo*" ktp. La uzintoj certe senkritike konsideris tiujn *logikaj* figuroj. Ja, logikaj, tamen *nur* laŭ iu nacilingva pensmaniero! Probable en alia duonsfero oni juĝas tiujn *nelogikaj!*

Vanas la disputo pri tio. Eblas nur unu elirvojo, nome la zorgplena singardo fare de aŭtoroj kaj vortaristoj. En la utila esprimo-kolekto DOMFABRIKO *Kalocsay* kaj *Csiszár* klopodis eviti la nur nacie (do ne ĉie) validajn parolturnojn, kromsencojn. La supran unuan ekzemplon ili interpretis jene: „preni el la aero", kio ŝajnas (ĉu vere? ?) ĉie komprenebla figuro. Parenteze: ankaŭ „figuro" estas ĉe kelkaj nacioj uzata en senco de iaspeca grava „persono" (ankaŭ en PIV), kvankam li/ŝi *havas* figuron, eble etan aŭ atletan. Ne nur ioma risko esti ne komprenata, sed la malfaciligo de nia lingvo, ankaŭ la altrudema supereco, tiu spirito, estas konsiderindaj minacoj por la internacieco de la Internacia Lingvo. Spontanaj eraroj kompreneble ĉiam povas okazi.

En KULTURAJ KAJEROJ oni povas legi daŭre valorajn artikolojn pri diversaj sciencaj temoj. Post interesaj natursciencaj, geografiaj kaj historiaj studetoj ankaŭ la *psikologio* aperis sur tiuj paĝoj kaj tuj sensacie, el la plumo de nia Irana pioniro G. *Zaheb Zimani.* Iom pli detale ol kutime mi resumas unu parton de lia artikolo, titolita „Psikologio kaj Esperanto".

Komence ĉiuj infanoj, post aŭskultado de paroloj en la familia cirkaŭaĵo, faras vortojn, konstruas frazojn *tute logikajn* kaj kompreneblajn, tamen ne konformajn al la nelogika kaj ofte senracia lingvo de la plenkreskuloj. Sekvas do „korektado" dum jaroj, la logikema, simpla menso de infano devas adaptiĝi al la patrinlingva kontraŭlogikeco (ĉar tia estas ĉiu ne-artefarita lingvo). Inter kontraŭlogikeco kaj logiko daŭras la enmensa batalo, eĉ vivlonge, kaj devos venki – tra doloroj, genoj en la infana cerbo – la inklino al imito super kreemo, por tiel akordigi kun la erara menskonduto de la socio.

Tamen infano devas poste *denove* lerni logikon, matematikon, k.s., kio kaŭzas forte malutilan kontraŭecon en la personeco, en la mensa evoluo. Tiamaniere fortikiĝas inklino al *neracia* pensmaniero, tiom ofte videbla ĉe homoj. Racia lingvo, Eo – kiel esploroj montris – sentigas al infanoj psikan ĝojon, lasante ilin *krei* plej diversajn formojn: la lernado ne suferigas, nek kadukigas ilin, kiel kutime ĉe aliaj lingvoj. Estis eksperimente pruvite, ke Eo estas 10-oble pli facile lernebla ol ĉiuj aliaj lingvoj, ĝi havas multe malpli da reguloj, la logika strukturo prosperigas, kaj ne malhelpas la infanan menson.

Venas unika ebleco por psikologoj eksperimenti pri la grava, malnova demando: ĉu estas la menso kiu kaŭzas la mallogikecon de lingvo, aŭ ĉu estas la lingvo kiu kreskigas la mensan malracion? En tio grave helpos observo al denaskaj esperantistoj.

La aŭtoro krome substrekas la parte psikan, parte ekonomian problemon en la *tria mondo* pro malrapida alfluo de la scienco. Ege malhelpas ĝin ĝuste la necesa scio de fremdlingvoj por studentoj, la tiucela ega persona elspezo de energio, tempo kaj mono. La malkovrita faciligo prezentata de Eo vekas en Irano kaj en najbaraj landoj tiom da interesiĝo, kio certe utilos por *ŝanĝi* la cirkonstancojn rilate E-on.

„Interŝtataj unuiĝoj – kiucele? " Jen kerno de temaro por KONTAKTO, ankaŭ kiel kongresa temo. La opinioj jam eniras en la pluajn titolojn: „La Eŭropa parlamento, ĉu heroldo de demokrata Eŭropo aŭ senmuskola mamuto? " – „Kontraŭ interŝtataj unuiĝoj" – „La rajto esti nacio" de Kataluna aŭtoro – „Sukcesa kunlaboro pere de Interkosmos" de Bulgara aŭtorino, ktp. Videble liberaj opinioj diversflankaj, de pluraj vidpunktoj, kaj en tute legindaj kontribuaĵoj de tiu bonnivela revuo junulara (tamen ne nur ilia!). Mi estas certa, ke la interesiĝo daŭre kreskas al tiu revuo, sekve de la atentindaj, variaj temoj – kaj eminenta lingvaĵo. Rajte oni povas fidi je la novaj E-generacioj do fidi en la venonto!

Gravan fakton oni rimarkas en ESPERANTO pri niaj „diplomatiaj" aferoj. Okazis dum la 17a Konferenco de Neregistaraj Internaciaj Organizaĵoj (en konsultaj rilatoj kun Unesko) en Parizo, ke UEA estis elektita kiel *membro* de la Konstanta Komitato – sekve de aktiva rolo de UEA. Ankaŭ okazis, kadre de la supra ligo, en Parizo *simpozio* pri rajto je komunikado. Ties fina dokumento *rekomendas* atenti ankaŭ la lingvan aspekton de la komunikado, kaj aparte aludas al la IL. Mi trovas eĉ pli grava, ke niaj argumentoj manifestiĝis ne laŭ rektaj proponoj de UEA-komisiono, sed de *alia* organizaĵo! Sur internaciaj forumoj – kaj ne nur en E-kongresoj aŭ kunvenoj – estas do bonegaj eblecoj por *instigi aliajn* en direkto de niaj disvastigendaj ideoj.

Esperanto-elsendojn aŭskulti per radio, kaj la elsendan stacion informi pri plaĉo – estas konata devo, ne malfacila. Estu permesate de nia legantaro, se ĉifoje ne poŝtkarte, sed pere de tiuj linioj mi kvitancas elsendojn de *Radio Zagreb.* La eminenta, senlaca Emilija *Lapenna* zorgas tie pri simila „rubriko", tamen ŝi plenumas multe pli ampleksan taskon. Ŝia trarigardo fidele informas la aŭskultantaron, de tempo al tempo ĵetas lumon de reflektoro ankaŭ al la E-gazetoj de Hungarlando. Lastfoje, post detala konigo, BUDAPEŠTA INFORMILO estis taksita kiel „vere riĉa mozaiko", kaj H.V. ankaŭ ricevis laŭdajn vortojn, samkiel nia hungarlingva propaganda revuo VILÁG ÉS NYELV (MONDO kaj LINGVO). Ni aŭskultas Radion Zagreb vere kontente pro ĝia serioza programo!

Ervin *Fenyvesi*

LEHEL

MASTRUMA SORBA FRIDUJO

S 150 ***

HÜTÖGÉPGYÁR

Jászberény

Se Vi veturos eksterlanden de la aŭtobuso-staciejo de la placo Engels,

- **la bileton Vi povas aĉeti jam 60 tagojn antaŭ la ekveturo, kaj per tio rezervi ankaŭ lokbileton (eĉ por la reveturo!):**
- **sen veturilŝanĝo Vi povas atingi proksimajn Slovakiajn kaj Rumaniajn urbojn, la montaron Tatro, Jugoslavian marbordon:**
- **eĉ kun vizitpasporto vi povas pagi la vojaĝkostojn per Forint, al Vieno, Graco, Munkeno kaj Venecio.**

Biletmendo, informoj: Volánbusz Utazási Iroda Aŭtobuso-stacidomo sur placo Engels, domo „B". Tel.: 172-562

Adreso: Volánbusz Utazási Iroda
Budapest, V. Engels tér



Se Vi eltranĉos la suban blanketon kaj sendos al ni, ni elpoŝtigos al Vi horaron de niaj internaciaj buslinioj kaj respondos al demandoj.

Nomo: .....
Nevem:
Adreso: .....
A választ a következő címre kérem:
Al .....**trafikantoj aŭtobusoj mi petas pli detalajn informojn. Speciale interesas min, ke.** .....

.....

A .....-ba közlekedő járatokról közelebbi felvilágosítást kérek. Különösen az érdekel: hogy ....

.....

Paĝo de komencantoj

Albert Lienhardt

AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO

Tiu ĉi libro longe estis populara inter novaj esperantistoj. Sed lastatempe ĝi ne plu estas aĉetebla. Laŭ permeso de Universala Esperanto—Asocio baldaŭ ĝi denove aperos en Hungario, kaj ni kredas, ke multaj ŝatos ĝin. Nun ni publikigas fragmenton el tiu ĉi libro.

Ĉu vi permesas, ĉarma fraŭlino, ke mi eksidu apud vi? Faru kiel vi volas ..... Sed atentu pri mia hundo!

Dialogo n-ro 18

(Interparolas Francisko Adek, 20-jara junulo
(A) kun junulino (J) en la urbo-parko)

A: Pardonu, fraŭlino Ĉu estas libera loko sur ĉi tiu benko?
J: Estas loko, tie, por pluraj personoj...
A: Ĉu vi permesas, ke mi eksidu apud vi?
J: Faru, kiel vi volas... Sed atentu pri mia hundo!
A: Ha...! Ĉu la pudelo sub la benko apartenas al vi?
J: Jes. Estas evidente.
A: Simpatia besto... Ĉu ĝi estas mordema?
J: Povas okazi... Precipe, se iu provas tedi min.
A: Nu, kun mi, vi riskas nenion... Mi ne permesus tion al mi.
J: Ankaŭ mia pudelo ne permesus tion.
A: Estas kredeble, ke vi estas bone protektata, fraŭlino.
J: Nuntempe, estas ofte necese havi fidindan protektanton.
A: Prudenta rimarko. — Cetere, bonvolu pardoni, ke mi ne prezentis min! Mia nomo estas Francisko Adek...
J: ...studento pri sociologio, se mi ne eraras.
A: Efektive. Vi ne eraras. Kiel vi povis diveni tion?
J: Mi jam aŭdis mian fraton paroli pri vi.
A: Kiu li estas? Kio estas lia nomo?
J: Eriko Hernandez.
A: Ho, jes! Mi bone konas lin. Li estas unu el miaj studokamaradoj. Ĉu, do, vi estas la fratino de Eriko?
J: Ĉar li estas mia frato, mi efektive estas lia fratino...
A: Hm... Kompreneble!... Tio estas amuza koincido. Mi vere ĝoja konatiĝi kun vi, fraŭlino... Hernandez.
J: Mia antaŭnomo estas Julja.
A: Ĉarma nomo. Tre konvena por ĉarma fraŭlino.
J: Ŝajnas al mi, ke vi ŝatas fari komplimentojn.
A: Kiam estas favora okazo, mi ne preter-lasas ĝin!
J: Kiu tro flatas, tiu... Vi certe komprenas.
A: Mi ĉiam parolas tiel kiel mi pensas kaj sentas, fraŭlino Julja. — Ĉu vi permesas demandon?
J: Demandu!
A: Kion interesan vi legas?
J: Vi povas rigardi... Mi apenaŭ eklegis.
A: Ha...! Poemoj de Carducci (:karduĉi). Mi multe ŝatas tiun aŭtoron.
J: Ne tre moderna, ŝajnas al mi.
A: Certe. Sento-plena klasikulo. — Ĉu vi preferas aŭtorojn modernajn?
J: Mi multe ŝatas certajn nun-tempajn teatroaŭtorojn, ekzemple Cocteau (:kokto) kaj Ionoesco (:ionesko).
A: La dua estas iom avangarda, laŭ mia vid-punkto.
J: Eble... Sed liaj komedioj havas multan sukceson.
A: Pariza bulvardo-teatro... Estas afero de modo. — Alia demando: Kiel vi rilatas al sporto?
J: Mi estas iom sportema. En somero mi ŝatas naĝi: kaj en vintro, mi praktikas skiadon.
A: Ĉu vi ludas tenison?
J: De temp' al tempo Mi ne ofte havas okazon.
A: La nova tenisejo, apud la urba naĝo-baseno, estas nun tre taŭge aranĝita.
J: Mi jam aŭdis pri tio.

. . . . . .

A: Jen, subite mi devas demandi min...
J: Pri kio?
A: Pri via „cerbero"[1], tie, sub la benko...
J: Kio estas pri ĝi?
A: Ŝajnas al mi, ke tiu respektinda reprezentanto de la hundo-specio ne estas tiel timinda, kiel vi asertis antaŭe.
J: Kial vi kredas tion?
A: Ĉar jam plurfoje, ĝi amikeme lekis mian manon.
J: Ĉu vere? Tio estas la unua fojo, ke ĝi amikiĝas kun fremdulo.
A: Tio enorme[2] honoras min, fraŭlino Julja... Kaj faras multan plezuron al mi.
J: Kiam mi pensas, ke mi fidis al tiu besto, por esti protektata.
A: Kredeble, ĝia instinkto malkaŝis al ĝi, ke, nunmomente, via vivo ne estas en danĝero...
J: Povas esti...
A: Tio pruvas, ke ĝi estas tre inteligenta pudelo.
J: Jes, tia ĝi vere estas... Ho...! Kion mi vidas? ... Estas jam la sesa horo.
A: Ĉu vi devas for-iri?
J: Jes. Mi devus jam esti for.
A: Estas domaĝe... Ĉu mi esperu iam revidi vin, fraŭlino Julja?
J: Kion diri? ... Mi ne scias.
A: Ĉu eble morgaŭ, ĉi tie, je la sama horo?
J: Mi promesas nenion...
A: Mi treege ĝojus, Julja... Ĝis revido! Ĝis morgaŭ!
J: Eble... Mi vidos... Ĝis revido, Francisko!

---

[1] Infera gard-hundo laŭ la antikvaj grekoj

[2] Multege



Dr-ro Ferenc László

Budapeŝto, urbo de banejoj

Hungario estas tre riĉa je mineral- kaj kuracakvoj. La diversloke troveblaj kuracakvoj forte diferencas inter si laŭ konsisto, temperaturo kaj ceteraj, ecoj, sekve ankaŭ laŭ kuracefikoj. Jen kial tre multaj malsanoj estas sanigeblaj pere de Hungarlandaj kuracbanejoj.

Ni rimarkigas, ke ĝuste Budapeŝto, la ĉefurbo estas la plej grava trovejo de kuracakvoj en la lando. Estas 123 lokoj en Budapeŝto, kie suprenvenas varma kaj varmeta akvo mirinde abunde: entute pli ol 50 milionoj da litroj ĉiutage. Grandioza saniga ebleco por multaj miloj! Ne hazarde do, ke en la historio de Budapeŝto la termofontoj de la flanko Buda[1] havis ĉiam gravan rolon.

Aerfoto pri la Banejo kaj Hotelo Gellért

1 Ponto „Libereco"
2 Gellért-monto
3 Ond-baseno
4 Tegmento de Ŝaŭmbanej
5 Tegmentfenestroj de termobanejoj.
6 Hotelo

Vestiblo-halo de Banejo Gellért

En la antikvaj tempoj la elekto de loĝlokoj, dum la turka okupado la religieca banejkulto, en la moderna epoko la ekflorinta kaj de la balneologia scienco instigita bankulturo baziĝis sur la kuracefikaj termofontoj, elŝprucantaj ĉe la orienta rando de la Buda-montaro.

Sur teritorio de la nuntempa Budapeŝto jam la keltaj triboj konis la multajn fontojn, tamen ties konscia utiligo komenciĝis nur dum la Romia regado (ĉ. 10 – 410 p.K.). Sur la norda parto de Buda, *Aquincum* iĝis la *ĉefurbo* de Romia provinco *Pannonia inferior*. Ĝia nomo devenas de antaŭa kelta loknomo: *ak ink,* t.e. „akvo abunda". Tie formiĝis ampleksa urbo: 60-80-mil da leĝantoj, du grandaj amfiteatroj, akvoduktoj, *14 banejoj, bankuracejoj* por malsanaj soldatoj kaj invalidaj legianoj karakterizas la grandiozecon de tiu prokonsula rezidejo.

Aquincum akiris famon pro sia bankulturo. Apud la kuracfontoj oni konstruis tutan banejkomplekson, kie faksciaj „balneatoroj" kuracis la malsanulojn, venintajn eĉ el foraj lokoj. Imperiestro *Septimius Severus* en j. 201 konstruigis belajn ŝprucfontanojn, kaj renovigis plurajn publikajn banejojn. En privataj domoj troviĝis banĉambroj kun kanalizado, en pluraj vilaoj de riĉuloj eĉ tre lukse ornamitaj banhaloj.

Post la dekadenco de la Romia Imperio, dum epoko de la popolmigrado dekadencis ankaŭ la bankulturo, kvankam restis daŭre la famo pri la termobanejoj de Buda. Tiu famo montriĝas en la imagita rakonto de kronikisto *Anonymus*[2] (13a jc.):

„La potenca reĝo de hunoj, *Attila,* kun sia regimento marŝis en jaro 451 el Skitio al Panonio. Venkinte la romianojn li starigis sian reĝan seĝon ĉe la varmakvoj (supra calidas aquas) proksime al Danubo. La tie troveblajn antikvajn konstruaĵojn li ordonis renovigi kaj ĉirkaŭpreni per fortika muro. Ĝi nomiĝas laŭ nuna hungara lingvo *Budavàr* (Budaburgo), kaj de la teŭtonoj estas nomata *Etzelburg,* t.e. urbo de Attila." (:Ververe la nomada popolo de hunoj ne utiligis urbojn kaj murojn: la rezidejo de Attila moviĝis sur la Granda Ebenaĵo, verŝajne en proksimeco de la rivero Tiso.:)

La varmaj kuracfontoj de Buda estis konataj de la hungaroj jam en la 11-a jarcento. Apud Danubo, sude de la iama Aquincum situis vilaĝo *Felhéviz* (Supra Termoakvo), kaj pli sude, ĉe piedo de rokeca monto (Gellért) alia vilaĝo portis la nomon *Alhéviz* (Malsupra Termoakvo). La tiama nomo de tiu monto Kelen (Kilin) signifas en la kelta lingvo same varmakvon (termoakvo), ja la kelta loĝantaro jam antaŭ la Romia konkero uzis la tie elŝprucantajn multajn fontojn. Desur la monteto Kelen ĵetis la ribelintoj en la Danubon episkopon Gellért (11-a jc), post kio ĝi ricevis la nomon *Gellért-monto.* Apud la kuracfontoj poste la kavalir-ordeno de Johanitoj instalis kuracejon por lepruloj kaj pest-malsanuloj kiu ricevis la nomon Elizabeta (ankaŭ la apuda vilaĝo), filino de Andreo la 2a, pro ŝiaj legendaj resanigoj. La historiistoj plej parte asertas, ke tiu bankuracejo estis surloke de la nuna Gellért-Banejo.

La multe ruiniginta *turka* okupado tamen montriĝis favora por la banejoj de Buda. Oni povas diri, ke dum la turka regado alvenis la dua granda florado por la kuracfontoj kaj banejoj de Buda. La sinsekvaj paŝaoj de Buda faris multon por la bankulturo, i.a. ili konstruigis novajn banejojn ĉe la fontoj. Pri tiuj postrestis abunde skribaĵoj, gravuraĵoj kaj desegnoj, do ni bone konas la tiaman bankulturon, la vivon en la banejoj. En kvar, eĉ nuntempe funkciantaj banejoj la orientstilaj baseno-halo kaj kupolo okulfrape memorigas pri la turka banejkulturo.

La turkoj uzis akvon ne nur por sinpurigo, sed ankaŭ por kuracado, krome en la banejoj viglis la so-

cieta vivo. En la lukse kaj komforte ekipitaj privatbanejoj la altranguloj gastigis ankaŭ eksterlandajn ambasadorojn, precipe antaŭ gravaj traktadoj. El la sekvantaro de imperiestra ambasadoro *Lichtenstein.* iu skribis jene:

„Dum la ambasadoro longe restadis ĉe la paŝao, ni havis eblon viziti la banejojn, ankàŭ banadi tie. La turkoj montras ilin plenrajte kun fiereco, kaj tial oni aparte zorgas pri la pureco de la banejoj. La bangastoj pagas certan sumon pro la servado kaj uzo de l' komfortigaj instalaĵoj. Antaŭ la banloĝioj estas konstruitaj grandaj vestibloj, kie oni demetas la vestaĵon. Ĉiu estas devigata sin antaŭbani, kaj nur poste enpaŝi la basenon! La akvo de l' banbaseno altas ĝis kolo, kaj tial marmorbenkoj ebligas en ĝi la sidadon..."

En la turka periodo paŝao *Sokoli Mustafa* estis la plej grava konstruanto de banejoj. La sankta dervişo *Gül Baba* flegis malsanulojn en la bankuracejo de la turkaj monaĥoj.

Post rekonkero de Buda en 1686 la banejoj iĝis posedaĵoj de la ŝtata fisko. Ĝi utiligis la banejojn pere de urba direktado, ankaŭ pere de luantoj. Kelkaj estis venditaj, eĉ donacitaj.

La teknika kaj scienca evoluo, precipe tiu de la medicino ebligis, ke en la 19-a jc. la banado estis jam ĝenerale bezonata. En tiu periodo unu post la alia estis konstrutaj publikaj kaj privataj banejoj por higienaj kaj kuracaj celoj. La Budapeŝta moderna bankulturo komenciĝis en la dua duono de la 19-a jarcento per konstruado de la kuracbanejoj Császár (imperiestro), *Margaret-insula* kaj *Lukács,* sed kompreneble la jam ekzistantaj ceteraj banejoj klopodis same kunmarŝi kun la progreso. La konstruado de la kuracbanejoj *Széchenyi* kaj *Gellért* dum la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento efektiviĝis jam sub la devizo „Banejurbo Budapeŝto".

En tiu ĉi artikolserio ne eblas prezenti ĉiun grandan banejon de Budapeŝto, tial ni donas informojn nur pri la plej gravaj kuracbanejoj de la ĉefurbo.

Kuracbanejo Gellért

Iam, en tre malnovaj tempoj, kiam la XI-a distrikto (Sud-Buda) de la ĉefurbo grandparte estis kovrita de marĉoj kaj akvoj, tiam la ankoraŭ nun aktivaj fontoj elŝprucis plurajn metrojn desub la nuna placo Gellért, krome ankaŭ elfluis tra rokfendoj de la dolomita Gellért-monto. La kunfluintaj akvoj erozie fosis al si sulkojn, kiuj vastiĝis lageto, kaj iam la homoj banis sin en tiu natura baseno. Estas interese, kiajn nomojn ricevis poste tiu ĉi banejo, kaj kiel oni klarigis la nomojn. En skribaj mencioj aperas la nomo „Purgatorio", ĉar – kiel en la katolika Purgatorio



Ruinoj de Banejo Gellért post la Dua Mondmilito

pekuloj ricevas punon laŭ grado de siaj krimoj pli kaj pli severe – ĉi tie same varias la temperaturo de la banakvo. Enirante de la Danubo ĝi estas ankoraŭ malvarmeta, poste jam varmeta, kaj interne pli kaj pli kaj pli varmega, ĝis netolerebleco.

Laŭ alia priskribo la turkoj nomis ĝin *Aga-banejo.* La fama turka vojaĝanto, *Evlia Ĉelebi,* kiu ĉ. 1660 faris viziton en Buda, la banejon sur loko de la nuna Gellért-banejo, mencias per nomo *Aĉik Iliĝe,* t.e. nefermita, libere alirebla banejo. Do tiam ĝi estis nek kovrita, nek ĉirkaŭita de iu konstruaĵo.

Menciindas ankaŭ la nomo *„Banejo de virgulinoj"*, kion pasintjarcenta banej-kuracisto, d-ro *Vàri-Szabó* klarigis jene: „Rilate ĉi nomon oni aludas pri la konservita memoro pri certaj virinoj, iam kaŝitaj kaj garditaj en la banejo: sed kiuj ili estis, ĉu haremvirinoj de agaoj kaj paŝaoj? ĉu eble rabitaj knabinoj oferindaj al altranguloj? – pri tio silentas la memoroj." Tamen la bona doktoro prezentas ankaŭ pli racian motivon: kuracadon de malordoj en certaj virinaj funkciadoj. Aliaj rememoroj scias pri la tie troveblaj multaj „malvirgulinoj", kiuj tre volonte klopodis helpi al la sanon kaj samtempe plezurojn soifantaj bangastoj.

Post la reokupo de Buda imperiestro Leopoldo la 1-a donacis la ruiniĝintan banejon al sia kortega kuracisto, Frederiko Ilmer, kiu baldaŭ rekonstruigis ĝin. De nun, ĝis la fino de la 19-a jarcento ĝi nomiĝis *Sárosfürdő* (Kota-Banejo), ja la fontoj eligis ankaŭ fajngrajnan ŝlimon, kaj kiam oni perturbis ties fajnan sedimenton, la akvo aspektis kvazaŭ kota. Modernaj esploroj elmontris, ke tiu ŝlimo konsistas el amasoj da dolomitkristaletoj.

La rekonstruita baseno.

Multaj skribaĵoj informas pri la longaj vicoj de ĉaroj, kiuj tiutempe atendadis apud la banejo, ĉar la famiĝinta sanigbanejo akceptis multajn gastojn krom la provinco ankaŭ el eksterlando.

Fine de la pasinta jarcento estis decidite konstrui la nunan Libereco-ponton, kaj tiam la ŝtato eksproprietigis la Kotan-Banejon, ĝiaj domoj estis malkonstruitaj. La fontoj kunfluis en basenon, kaj ĝin – ĉar ĝi troviĝis en akso de la konstruota ponto – oni kovris per tegmento, kaj ĉirkaŭe la ternivelon oni konvene altigis. Por ĝustamaniere kapti la fontojn, estis konstruita sesangula rezervujo (kun dekmetra diametro), kies volbon apogas centra granitpilastro. Tiu fontakvo-kolektejo en 1914 jam estis preta, havanta 103 m^2 da areo: ĝia volbsupro troviĝas 3 metrojn sub la nuna nivelo de la placo Gellért. Tiel sinkis sub la teron la iama Aĉik Iliĝe, la nefermita banejo, kaj restis kiel fontakvo-kolekta baseno por la Kuracbanejo Gellért, liverante tien ĉiuminute ĉ. 1000 litrojn da kuracakvo de 43 C gradoj, raĉioaktiva kaj kalcia-magnezia-hidrokarbonata. La Ministerio pri Internaj Aferoj jam en 1896 deklaris oficiale *kuracfonto* la mineralakvon de la Kota-Banejo.

En 1911 estis ekkonstruita sur la loko de la Kota-Banejo la Kuracbanejo kaj Hotelo Gellért, laŭ planoj de arkitektoj Iz. *Sterk,* A. *Sebestyén* kaj A. *Hegedűs.* Pro la militaj malfacilaĵoj – manko de laboristoj, materialoj, k.a. – la konstruado estis finita nur en 1918. Impone granda, marmora banhalo servas kiel vestiblo en centro de la nova konstruaĵo. Ĉirkaŭ tiu halo ariĝas la multspecaj ejoj de banado kaj kuracado, kiuj ligiĝas ankaŭ kun la kurachotelo. Jen la partoj de tiu – altnivelan servon prezentinta – komplekso de banterapio kaj kurachotelo:

1. Termobanejo por viroj kun 3 basenoj, 145 kajutoj.
2. Termobanejo por virinoj kun 3 basenoj, 105 kajutoj.
3. Ŝlimo-terapio aparte en 9 banĉambroj.
4. Komuna ŝlimo-terapio en vira kaj virina sekcioj.
5. 32 bankuvoj, ekipitaj por karbacidaj kaj medikamentaj specialaj banadoj.
6. Sekcio de varmaera terapio.
7. Sekcio de hidroterapio por viroj kaj por virinoj.
8. Sunbanejoj por viroj kaj por virinoj.

9. Meĥanoterapio (Zander).
10. Sekcio de inhaliloj kaj pneŭmatika ĉambro.
11. Elektroterapio.
12. Ginekologiaj kuracadoj.
13. Rentgen-sekcio.
14. Laboratorio.

La kurachotelo enhavis 240 ĉambrojn kun 340 litoj kaj 80 banĉambroj.

La direktoraro de la banejo en 1924 turnis sin al la Ĉefurba Konsilio, proponante – por malpliigi la deficiton – instali naĝbasenon kun ondigilo kaj plaĝo, krome tutjare uzeblan kovritan naĝbasenon. La ĉefurbo aprobis la proponon, kaj en 1927 oni inaŭguris en la parko de la Banejo-Hotelo la 560 m^2 arean *„Ond-banejon"* kun 286 kajutoj kaj 160 vestaĵŝrankoj. En 1934 malfermiĝis ankaŭ la *„Ŝaŭmbanejo"*, 260 m^2 granda baseno, surloke de la hotela „oranĝerio".

La Dua Mondmilito kaŭzis egajn damaĝojn en la konstruaĵoj. La hotelo preskaŭ tute forbrulis. La virina termobanejo grave difektiĝis, sed pli-malpli ankaŭ ĉiuj aliaj banej-sekcioj. Oni konsideris la tutan militan damaĝon ĉ. 75-procenta! Per rapida, komence provizora, poste plena restaŭrado denove iĝis eble por la publiko uzi la banejon. En aprilo de 1945 povis banadi soldatoj, en majo jam ankaŭ la publiko. Somere ekfunkciis ankaŭ la Ond- kaj Ŝaŭmbanejoj. Estis instalita nova malsanulejo por reŭmatismuloj sekcio kun 30 litoj.

La renovigo kaj modernigo de la banejo ricevis novan elanon post kreado de la komunumaj konsilioj. La Ond-banejo ampleksiĝis per surherbara sunbanejo: estis faritaj basenoj por la tn. *„balasta banterapio"* por viroj kaj por virinoj: plene renoviĝis la termobanejo por viroj. La moderna restaŭrado de la Hotelo Gellért – per grandega investado – finiĝis en 1958. Lige kun tio, sur ĝiaj ebenaj tegmentoj pretiĝis *terasaj sunbanejoj* por viroj kaj por virinoj. Ĉiuj ĉi forte kontribuis al la saltmaniere kreskanta amasa vizitado al la banejo.



„Pendigitoj" ĉe balasta banterapio

En la lastaj jaroj okazis plena renovigo kaj modernigo de la naĝbasenoj. La rekonstruantoj konservis la formojn kaj mezurojn de la Ond- kaj Ŝaŭm-

Ŝaŭmbanejo Gellért



En la ondbanejo

Kuracado kontraŭ malvastiĝo de vejnoj per karbacidgaso

banejoj, same la eklektikan stilon de la jarcent-komenco. La pura, travidebla, bluverda akvo estas interne lumigata per 16 reflektoroj. La purigon de la akvo reguligas moderna filtra-turniga aparato. La ŝaŭmbanhalo estas klimatizita: la temperaturon kaj humidecon reguligas bonega hejta-aeruma sistemo. Ceramiko „Zsolnay" de la Porcelanfabriko en Pécs ŝirmas la murojn kontraŭ koroda efiko de la mineralakvo.

La vestiĝejojn oni atingis iam tra la banejo. Nun el la granda centra halo oni al-iras ĝin tra koridoro, kondukanta laŭlonge de la ŝaŭmbaseno – *sub la akvonivelo.* Tra sekuraj fenestroj rigardante en la brile lumigatan akvoprofundon, oni povas plezure ĝui desube la movojn de la naĝantoj. Tra la naĝeja supra galerio oni iras al la sunbanejo (300 m^2), kie kuŝejoj kaj koloraj plastikseĝoj staras je dispono. La tegmento de la Ŝaŭmbanejo estas movebla laŭ la vetero.

Al la Banejo Gellért apartenas nun du naĝejoj (subĉiela kaj kovrita), termo-bankuvoj, sekcioj por sala, karbacida kaj karbacidgasa banado, por ŝlimkuracado kaj balasta banterapio. La fiziko-, elektro-, meĥanoterapion prizorgas la kuracista sekcio kaj la 32-lita malsanulejo por reŭmatismuloj. Ĉi tie estas prizorgataj malsanuloj, alsenditaj el la tuta lando.

Tradukis: E. *Fenyvesi*

Dum ekskurso,
ĉe sporto

en teo,

en limonado

Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1025, Budapest, XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefon: 176–716, 573–088

Regalu viajn gastojn

HUNGARA DOLĈAĴINDUSTRIA ENTREPRENO

per niaj delikataj biskvitoj!

Szilárd Bálint

La mistera fraŭlino

Jozefo estis orfo. Kiam li estis neplenaĝa, li paŝtis blankajn ŝafidojn kaj ŝafojn. Post la soldata servo li iĝis fervoja gardisto en iu malgranda relvojgardista dometo. Dumnokte, kiam en lunluma muteco silentis la ebeno, li sidis antaŭ la gardejo kaj li ŝalmis. Tiam li rigardis la brilan astroplenan ĉielon kaj revadis: ekde la infanaĝo li alkutimiĝis al la izoliteco. La relparo, kiu en la lunlumo arĝente brilegis, tiel kuris al la malproksimo, kiel senfina rubando. Malofte po unu trajno forkuregis antaŭ li kaj fortan venton kirlis, kiam li kun lanterno staris antaŭ la dometo.

Iun nokton denove ekaperis la blankaj okuloj de la lokomotivo, li balancis la lanternon kaj malrapide silentiĝis la klakado de foririnta trajno. Momente mallaŭta ĝemetado estis aŭdebla el arbusto. Li rapidis al tiu direkto kaj rimarkis, ke malantaŭ la arbusto io blankas.

– Iu homo... virino... defalis el la trajno! – li pensis.

Li levis la blankvestitan virinon kaj enportis ŝin en la dometon. Pala, juna knabineca profilo estis antaŭ li, kies blondaj haroj disvolviĝis kaj ore brilis en la ĉambro. La knabino senkonscie kuŝis sur la lito. Jozefo per vinagro frotis la frunton de la virino, kiu post kelkaj minutoj reviviĝis kaj ekparolis:

– Ĉu mi ne estas disrompita? ... Oni eligis min el la trajno...

Ŝi trapalpis sin, membrostreĉis kaj konstatis, ke sen akcidento ŝi falis sur la teron.

– Mi petas akvon... – ŝi diris.

Ŝi trinkis kelkajn glutojn kaj tuj ekdormis. Jozefo dum la tuta nokto viglis, por ke en okazo de bezono li povu helpi ŝin.

Kun birdvoĉoj alvenis la aŭroro. Trankvila kaj klara estis la aero, la sunradioj tra la verdaj foliaroj ensteliĝis sur la liton, kie la virino profunde dormis. Jozefo razis kaj lavis sin, prenis purajn vestojn kaj kun pulsanta koro deŝiris kampajn florojn por bukedo.

– Bonan matenon... kie mi povas lavi min? – eksonis freŝa voĉo malantaŭ la dorso de la viro.

Jozefo putoakvon verŝis en la lavopelvon kaj forlasis la ĉambron. Dum la matenmanĝo la viro eldiris la atendeblan demandon:

– Kara fraŭlino... bonvolu diri, kio okazis kun vi?

– Oni eligis min el la trajno...

– Kial?

– Mi ne scias...

– Mi telefonos al la staciestro kaj mi petos lin, ke li informu la policon pri la incidento!

– Ankoraŭ ne... Atendu unu tagon...

– Kie estas viaj valizo kaj kofro?

– Ili restis en la kupeo... – diris la fraŭlino, ŝi ekstaris kaj eliris al la ĝardeno. Jozefo iris post ŝi.

– Kia floro estas tiu ĉi... ege bela.

– Fazeolo... nun ĝi floras... sed mi tute ne komprenas vian konduton... la kulpulojn portas la trajno malproksimen... viaj pakajoj certe perdiĝos!

– Faras nenion... ĉu mi estas bela? – ridetis la virino kaj kun brilantaj bluaj okuloj rigardis la viron.

Jozefo esti konfuzita: li alkutimiĝis al la soleco kaj nun kvazaŭ el la ĉielo estus falinta iu feino, kiun ne estas permesate tuŝi, ĉar ŝi malaperos, kiel bela sonĝo. La tuttaga plezuro ne volis finiĝi, la nekonata fraŭlino ellernis manĝigi la kokidojn kaj provadis fosi en la ĝardeno, eĉ ŝi entreprenis kuiri tagmanĝon. La manĝaĵo iĝis brulgusta, preskaŭ nemanĝebla, sed Jozefo fervore laŭdis ĝin.

Poste ili sidis apud la dometo sub akacio, kiam abrupte kun akra fajfado turniĝis kontraŭ ili trajno. Jozefo sen flago saltis kaj staris antaŭ la gardejon por akcepti la jam malaperantan trajnon.

– Ĉu la trajno, ĉi tie ne haltas – demandis la fraŭlino.

– Neniam haltas... tiu ĉi estas nur relvojgardista dometo...

– Per kio mi povas hejmenveturi?

– Mi telefonos al stacidomo... kaj la policon helpos vin...

– Absolute ne... hodiaŭ ne... eventuale morgaŭ...

Jozefo komprenis nenion, sed la virino ege plaĉas al li, li estus feliĉa, se la fraŭlino dum longa tempo restus ĉi tie, eble eĉ kiel edzino. La kirlantajn pensojn abrupte interrompis la voĉo de la virino:

– Kara Jozefo... jam vesperiĝas... mi ŝatus enlitiĝi... bonan nokton... belan sonĝon!

Jozefo tra la malgranda fenestro rigardis, kiel la virino komencis senvestiĝi, kaj dumtempe ŝi estingis la petrollampon. Post duonhoro Jozefo vokis per telefono la staciestron kaj detale raportis la tutan eventon. La staciestro konsultis kun la policon, kie la oficiro diris, ke antaŭ la tagiĝo ili alvenos. Kiam la policaŭto aperis ĉe la fervoja gardejo, la lito de la fraŭlino estis malplena.

La alvenintaj staciestro kaj la policoficiro rigardis unu la alian kaj ili komencis laŭtege ridaĉi kun nemalmulta kolero. Fine la staciestro diris al la fervojisto:

– Kara kolego... vi certe pli bone spertas pri ŝafoj kaj fervojo, ol pri virinoj!



Kara Leganto! Mankas la fino de tiu novelo, tial la redakcio petas vian helpon. Kiamaniere falis la nekonata virino el la trajno? Kiu estis la fraŭlino kaj kial ridegis ĉagrenite la du oficistoj? Bonvolu sendi ne pli ol 30 tajpitajn liniojn. La plej bona solvo estos premiita, kaj la teksto aperos en H.V.



Kaj jen la premiita fino de la rakonto „Turisma vojaĝo sur la Meza Maro", aperinta en n-ro 1978/2. Ĝia aŭtoro estas Mária *Vadász* (Pannonhalma, Béke u. 21. H-9090). La libropremion ni jam sendis al ŝi.

Sabate aperis denove ĉe Eva la oficiro de policejo. Li petis pardonon pro la malagrablaĵoj.

– Sinjorino, viaj fingrostampoj dokumentas vian senkulpecon –li diris.

– Kiu pikis sinjoron Hafiz? –demandis Eva.

– Ahmed Badiollah, kies kajuto estis apud via.

– Mi ne komprenas... Kial li serĉis tamen sian ponardon?

– Li estas ruza: tiel li volis forigi ĉian suspekton. Kvankam li viŝis la ponardon, hazarde restis unu fingrostampo sur ĝi.

– Kial li faris tiun teruraĵon?

– Laŭ lia konfeso, li kaj Hafiz vidis, kiam vi, estimata sinjorino, prenis multan monon en la banko. Ili priparolis, ke Hafiz provos amindumi vin. Eble kun sukceso, ĉar li estas juna kaj bela viro. Hafiz volis forŝteli la monon kaj eskapi. Ahmed postulis ricevi duonon de la mono, ĉar li havis la ideon de la ŝtelo. Poste li decidis akiri la tutan sumon. Nur kelkaj pikoj... Ahmed ne sciis, ke la entrepreno ne sukcesis. Li estis surprizita, kiam rapide li traesploris la poŝojn de la kunkulpulo!

NOVA DISKO

Islanda Esperanto-Asocio eldonis grandformatan diskon titolitan Songĝpoemo pri ponto kaj aliaj kantoj.

La titolverko estas impona kantato de islanda komponisto, Sigursveinn D. Kristinsson, sed tiun ĉi verkon li dediĉis al Universala Esperanto-Asocio okaze de la 62-a UK en Reykjaviko. Krome troviĝas sur la disko 11 diversaj islandaj kantoj, iuj plenumitaj koruse aliaj solkante. Ĉiuj tekstoj estas presitaj sur la koverto.

Ĉefa distribuanto de la disko estas UEA. (Prezo 27.90 guld.)

– TRADUTTORE – TRADITORE

En *Hungara Vivo* (1978/6, p. 222), la verkinto de la rubriko „Revuo de Revuoj", Ervin *Fenyvesi,* atentigas pri la minaco de nove-denove aperantaj „naciismoj" en Esperanto.

„Kontraŭbatali tiajn tendencojn, kiuj enŝovas en la IL-on naciajn formojn, ne kompreneblajn internacie, estas ja nia devo, t.e. gardi la internaciecon de nia lingvo evitante anglismojn, francismojn, hungarismojn kaj la aliajn."

Mi centprocente samopinias kun s-ro Fenyvesi kaj lastatempe mi provis direkti atenton al la problemo de hungarismoj en Esperanto per prilingvaj artikoloj kaj referaĵoj. En tiu ĉi artikolo mi dezirus pritrakti alian gravan difekton en la lingvouzo –la mistradukadon. Jen la kialo de la titolo *traduttore – traditore.*

Estas malpli facile kapti tradukajn fuŝaĵojn ol naciismojn en Esperanto, ĉar ofte estas necese legi la originalan tekston kaj kompari ĝin kun la esperantigita versio, por rimarki, ke temas pri mistraduko. Tamen, ekzistas ankaŭ tradukeraroj, kiuj estas tiel evidentaj, ke ili falas al ĉiu en la okulojn. Ĉi-sube mi donos ekzemplojn de ambaŭ specoj per citaĵoj el la prestiĝa periodaĵo *Esperantologiaj Kajeroj–3.*

1. „...interpretistoj ne konvenas por rapida, scienca opiniŝanĝo..." (p.339) *Véleménycsere* signifas ne „ŝango de opinio" sed „interŝanĝo de opinioj".
2. „Esperanto Magazeno" (p. 307, 313, 321, 328).
   La ĝusta traduko de *magazin* estas „magazino". „Magazeno" en la hungara lingvo estas *raktár, áruház.*
3. „...samtempe ĉesus la fuŝado en la fremdaj lingvoj, kiu eterne infektas la nacian lingvon per la plej diversaj barbaraĵoj..." (p. 226).
   En la hungara originalo la vorto „barbarizmusok" devas esti tradukita per „barbarismoj" en Esperanto. Temas pri lingvaj eraroj. „Barbaraĵo" estas barbárság, kegyetlenség.
5. „„La granda plimulto kiu ne ricevis specialan lingvokapablon de la sorto, vane disipas tempon kaj lacon..." (p. 236-237). „Disipi lacon" estas sensencaĵo. En la hungara teksto la vortoj estas „hiába pazarolna időt és fáradságot", signifanta „vane disipus tempon kaj fortostreĉon". La tradukinto estas eksterlanda studento, kies gepatra lingvo ne estas la hungara. Li konfuzis la vorton *fáradság,* „penado", „klopodo", kun *fáradtság* „laceco"!
5. *Esperantologiaj Kajeroj – 3* estas dediĉita al la eminenta hungara lingvisto Géza *Bárczi* (1894-1975), kiu estis ankaŭ esperantisto. Antaŭ la unua mondmilito li estis kunlaboranto de la revuo *La Verda Standardo.* Li verkis kelkajn librorecenzojn pri verkoj, kiuj hodiaŭ plejparte estas forgesitaj eroj de la literatura historio de Esperanto. Tamen, unu recenzo kaptis mian atenton, ĉar mi legis ankaŭ ĝian enhungarigon (p. 151, 172).

   En 1912 estis eldonita en Vieno *La Verda Kakatuo,* unuakta groteskaĵo de la Aŭstria teatraĵverkisto Artur Schnitzler, tradukita de Joh. Schröder. La titolo en la hungara lingvo iĝis *A Zöld Kaktusz.* Retradukante ĝin en Esperanton oni ricevas la novan titolon *La Verda Kakto!* Jen mirakla transformiĝo de birdo en planton! La povra tradukinto, ne sciante la signifon de la Esperanta vorto „kakatuo", kiu ja estas internacia, tradukis ĝin per la hungara vorto *kaktusz,* „kakto". Sed jam en 1909 pli lerta hungara tradukisto elgermanigis la originalan titolon *Der Grüne Kakadu* kiel *A Zöld Kakadu,* t.e. *La Verda Kakatuo.*

   Kion opinius la aŭtoro, Artur Schnitzler, pri tiu fuŝtraduko de la titolo de sia verko? Ĉu li sakrus aŭ ridus? Kaj kiel reagus Géza Bárczi, la universitata profesoro? Mi konjektas, ke li ĝemus unu-du fojojn kaj elbuŝigus la italan diraĵon *„traduttore – traditore!*

Bernard *Golden*

Modesta verkisto diras:

– Mi estas simpla, eta talentulo. Nur griza, sentaŭga geniulo...

Interparolo post vespermanĝo:

– Videble ankaŭ vi enuas en ĉi tiu societo. Venu, ni forlasu ĝin!
– Maleble! *Mi estas* la gastiganto.

Sonĝe sonĝa sonĝo:

– Mi havis ĉi-nokte teruran sonĝon: mi estis polinezo, kaj mi prenis belegajn koralojn el la marfundo.
– Nu, bone, sed kial terura la sonĝo?
– Ĉar unue: mi ne scias naĝi, kaj due: eĉ unu vorton mi ne parolas polineze.

El certa aspekto...

La matrikulisto vidas nure-nur *feliĉajn* familiojn...

Ankoraŭ pri kaĝo:

Iu eniris kuraĝe en la leonkaĝon! – ja, la *leono.*

...kaj elegante:

Li eksidis en la taksio kaj kviete alparolis la ŝoforon:
– *Ni iros* nenien.

Denove la distrita profesoro:

– Pardonon pro la alparolo, sinjoro profesoro, ĉu vi operacias ĉiufoje tiamaniere?
– Operacii? Mi kredis, ke ni faras *sekcadon.*

Ekstravaganca tabuleto:

NENIU HEJME! BONVOLU SONORIGI TRE LAŬTE!

Nemendita anonco de INOE:

– Mia dikiĝo igis malĝustaj miajn bankostumojn. Tio devigas min serĉi *nudistan plaĝon...*

Amikina plendo:

– Mi suferas pro *fatala eraro!*
– Hu! kio okazis?
– Miaj piedoj havas la sepan grandecon, sed en la magazeno ege ekplaĉis al mi tiu ŝuo de sesa grandeco.

...aŭ la moderna modo:

– Diru, ĉu vi estas junulo aŭ knabino?
– Tutegale! Gravas, ke ni amas unu la alian, ĉu ne?

...kaj post kelkaj semajnoj:

– Kara mia, estas jam tempo festeni nian *unujaran* geedziĝon, nun kiam ni ankoraŭ kunvivas – diris la duonmonata edzineto.

...kaj se daŭras feliĉe:

– Eĉ ideeton mi ne havas, *kion aĉeti* al mia edzino je ŝia naskotago!
– Kial cerbumi, amiko? Demandu de ŝi, kian donacon ŝi deziras...
– Ah! tiom multe mi ne povas elspezi!

...eventuale tiel?

– Interese, kiaj stultaĵoj aperas foje dum sonĝo – edzo meditas.
– Kio okazis do en via sonĝo? – edzino demandas.
– Imagu, mi donacis al vi je naskotago *poŝtukojn,* kaj vi *vere* ĝojis pro ili!

Deklaro de recenzisto – aŭ rubriko-fino:

VOLONTE MI PETAS PARDONON DE ĈIU: TAMEN NE DE TIUJ, KIUJN MI GRAVE OFENDIS!

E. F.

recenzoj - recenzoj - recenzoj

Funda pesimismo pri la homo

„Kain kaj Abel" de Sándor Szathmári. Redaktado kaj postparolo de Vilmos Benczik. Bibliografio (verkoj de kaj pri Szathmári) de Karl Pov. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1977. 288 p., 19 cm. Prezo: 16,50 ned. gld.

La noveloj ĝis nun neniam libroforme aperintaj de Szathmári estas kolektitaj en ĉi tiu volumo, kies meritoj estas tri liaj eroj („Pythagoras", „Superstiĉo" kaj „Mistika profundo"): la kompletigo de sistema eldono de lia tuta originala literatura verkaro (ĉi tie ne reaperas la pecoj entenataj en „Maŝinmondo" eldonita ĉe Stafeto): la kritika eseo de Benczik, ekvilibre serioza kaj grava por studemulo: kaj la esenca bibliografio, science detalita, de ŝajne ĉio kio aperis de S. kaj pri li.

Malmeritoj estas, en la realigo de la publikaĵo, kelkaj eksteraj aspektoj. La lingvo de S. ne ĉiam estis sanpeka, kaj, malgraŭ ĝia polurado, kiun Benczik prenis sur sin, ankoraŭ vidiĝas malglataĵoj, precipe en la unua novelo, kiu donas la titolon al la libro. Aldoniĝas multaj preseraroj, troaj por tiel grava kolekto, kaj la tre ĝena bindado kiu forprenas tro da marĝeno.

Tion dirinte, ni aliru al la enhavo. La funda pesimismo de S. pri la homo pri ĝia esenco kaj ĝia destino, ĝiaj kontrastoj kaj paradoksoj, koaguliĝas en diversaj grupoj de noveloj. La kontraŭmilitaj, kiel „Kain kaj Abel„ ' „Honorigo", „Barbaro"..., prezentas la homojn senespere malbonaj, celantaj suferigi siajn samulojn, krei la malamikon pro la kruela plezuro venki lin, detrui la plej valorajn mensojn, niveligi ĉiujn en la sangoplena kaldrono de la militoj, kie belas kaj justas turmenti kaj dispecigi vivantojn, sed estas krimo tuŝi sensentajn kadavrojn. En la paradoksa, konscia kontraŭlogika eltiro de konsekvencoj signas preskaŭ ĉiujn erojn, kiuj amare kaj cinike kondamnas la homajn agojn, la neagnoskitan diferencon de la vidpunktoj: en „Perfekta civitano", maŝino ne povas tiel humiliĝi fie, kiel nur homo kapablas: en „Fluidumo de la ĉiovido" la ekzaltita gusto de la paradokso rikanas pajace: kaj cetere en „Barbaro" iu personaĵo, kiu ŝajnas esti elirinta el la itala novelaro de Pirandello, asertas: „Senkulpan homon mi povis nur tiel savi, se mi ŝajnigas lin kulpa". La kontraŭvirinaj noveloj („Tria preĝo de Pygmalion", „Genezo", „Mistika profundo", „Feliĉa amo", „Maksimoj" ho, multaj, ve!) distingiĝas per akra senkompata spito al „la pli bela duono de la homaro", kiel Benczik diras: sed, ĝuste pro tio, ili regurdas la facilecon de finpaĝaj spritaĵoj, diluante ĝin en tro multe da vortoj. Scienc-fikciajn rakontojn, kiel „Urania", ni ne konsideru aparte: la fikcio en S. etendiĝas al preskaŭ ĉiuj verkoj, kaj ĝi ne estas celo al si mem, sed rimedo por antaŭenmeti la, tiel ĝin mi nomus, pesimisman idealismon de la aŭtoro, kiu koncepto evidentiĝas en la literature plej bona grupo, prezentanta la subpremon al seriozaj, kuraĝaj malkovistroj fare de la stata konformismo, de la etmensismo de oficialaj superuloj: vidu la erojn pri Pythagoras, pri la du grekaj sklavoj, pri Colombo. Tuta galerio de portretoj pri aŭtokratoj ĉiutempaj, fantaziaj (kaj pri ĉi tiuj oni sentas la influon de Orwell) aŭ historiaj, de la Plejamata Ŝtatpatro al Gladio, de la Grandmonarko de Atlia al Kleisthenes, de Sulla al la Roma sklavestro, aperas antaŭ la leganto. Tamen oni devas atentigi, ke ili tute similas unu al la alia, kaj absolute neniel estas karakterizitaj.

Cetere, la rigardo al la homo kiel individuo estas la plej granda manko en la verkoj de S. Neniu el la homa speco havas, laŭ li, la forton perfektiĝi: al la homaro tia, kia ĝi estas, neeblas pluvivi. Aŭ venos de ekstere (kiel por la hinoj de „Vojaĝo al Kazohinio") plibonigaj radioj, aŭ la homoj per si mem ne scios aliiĝi, kaj la mondo devos reduktiĝi al maŝinoj: nur ĉi tiuj estas raciaj, konsekvencaj, kaj rajtas vivi: kio estas la tezo de „Maŝinmondo". Sed ĉiu homo, ni emas respondi, estas ulo kun sia propra sentaro, sia propra mikrokosmo: tion S. ne esploris; kaj, aliflanke, daŭra, martela argumentado tre malfacile kaj malofte transformiĝas en arton.

Clelia *Conterno*

Ĉu vi volus ŝanĝi vian sekson?

Kara Diablino. Originala romano de Douglas P. Boatman. Eldonis: TK-Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1979. Bel-literatura eldon-serio n-ro 40. 110 p., 21 cm. Prezo: 12,– ned. gld. (Por Hungario 150,– forintoj.)

Kion vi pensus kaj sentus, kara sinjoro, se en unu tago vi vekiĝus kiel alloga, ĉarma virino, kaj apud vi kuŝus en la lito viro, kiu havas vian pli fruan aspekton?

Ĝuste tio okazis al Paŭlo, juna brito, post nokto pasigita kun mistera belulino, nomata Rozo, en Edinburga hotelo.

Post tia ŝanĝo de sia aspekto Paŭlo ne povas reiri al la edzino, kiu certe ne raviĝus pro la vir-ekscitaj konturoj de sia edzo. Sekve li – aŭ prefere *ŝi* – devas plenumi la danĝeran taskon, destinitan por li (ŝi).

Tiu ĉi dua romano de la aĝa verkisto (li naskiĝis en 1892) neniom postrestas al *La nekonata konato*, aperinta en 1932, kaj lastatempe reeldonita de la sama eldonejo. La ĉefa virto de lia verkarto estas teni viva la atenton de la leganto, kaj regali lin per surprizoj vere neatenditaj. Tamen, tiujn oni ne sentas absurdaj: per lerta influo Boatman ĉiam sukcesas, ke – eble kun komplica okulsigno – oni akceptu eventojn ankaŭ neverŝajnajn.

La lingvaĵo de la verko estas tre bona, oni ne trovas en la teksto ion vere riproĉindan. Mi ne dubas, ke tiu ĉi nova originala prozaĵo furoros en la Esperanta libromerkato.

V. *Benczik*

Belorusaj esperantistoj petas

ĉiujn niajn legantojn baldaŭ skribi al
Izdatelstvo „Belorusj"
Leninskij prospekt, 79
SU-220 041 MINSK-41, USSR

kaj demandi, ĉu oni antaŭvidas eldoni verkojn de Janka *Kupala* kaj Jakub *Kolas*, klasikaj aŭtoroj de la belorusa literaturo, okaze de ilia 100-jara jubileo, kiu okazos en 1982. Oni ankaŭ esprimu sian deziron konatiĝi kun la verkoj de *Kupala* kaj *Kolas* per Esperantaj tradukoj. Ĉar la antaŭpreparoj por la jubileo jam komenciĝis, necesas tuj preni plumon, kiam vi legis tiun ĉi alvokon. Via helpo estos duobla, se vi sendos kopion de via letero al samideano
Adam Pavlukovec
P.k. 17.
SU-225-650 LUNINEC
(Brestskoj oblasti)
Pripensu, ke nur per kelkminuta laboro vi povos atingi, ke plia eldonejo aperigu Esperantajn librojn!

Foto: Juhani Kemi

1500 infandesegnaĵoj en Oulu

Pro la Internacia Jaro de la Infano kaj kiel oficiale akceptitan programeron de la Tagoj de Oulu, la loka Esperanto-societo en Oulu, Finnlando, aranĝis 27.8. – 9.9.1979 internacian ekspozicion de infandesegnaĵoj. Por la ekspozicio alvenis entute 1500 desegnaĵoj el 24 landoj, el kiuj Argentino estis la unua ne nur en la alfabeta ordo, sed ankaŭ laŭ la nombro – 332 desegnaĵoj. La elmontro de la ekspozicio okazis en aŭlo de la Popola Instituto, kie vizitis dum la du semajnoj kelkaj miloj da rigardantoj. La formo de la ekspozicio figuris „internacian vagonaron" kaj donis belan impreson pri tutmonda amikeco kaj pri la bezono al la internacia lingvo.

Allan *Mehtonen*

Muntita en ambaŭ sencoj

GUTARO, muntita de AVOTO, eldonita de Esperanto Editions, Hasting, England, 1979. 64 p., prezo ne indikita.

34 poemojn kaj ampleksan postskribon enhavas tiu ĉi belaspekta kajero, originalaĵojn kaj du tradukaĵojn de AVOTO – s-ro A.W. Thomson, veterano de la Esperanto-movado. La dato de la unua estas 1917, tiu de la lasta: 1977. Elekti el rikolto de ses jardekoj estas malfacila tasko, precipe, se la aŭtoro per tiu ĉi elekto intencas ilustri siajn tezojn kaj konceptojn pri la poezio mem.

El tiu vidpunkto nĉ povas konstati plenan sukceson: la ĉikune publikigitaj poemoj tute konvenas al la simpatia kaj sincera konfeso de AVOTO, kiu ne pretendas por si famon aŭ gloron de poeto, sed kiel simpla „dumviva poeziamanto" pledas postparole por la tradiciaj, fiksaj poemformoj, por puraj rimoj, pulsanta ritmo.

La forta flanko de la aŭtoro (cetere: filo de angla poeto), kiu jam en 1918 aperigis Rimvortaron Esperantan – estas la verstekniko, ĉiu lia poemo havas fiksan formon, kaj li majstre manipulas per la metiejaj sekretoj de poezi-verkado. Aparte menciindaj estas liaj sonetoj laŭ Petrarka, Ŝekspira, Miltona kaj Natura formoj, same estas ĝueblaj la ludemaj poemoj: Kvar literoj (versa anagramo) kaj la aliteraciantaj versoj de Kurioza Kanto.

Laŭ la interna titolpaĝo la poemaro estas *muntita* de AVOTO, kaj fakte, la muntado rimarkeblas en ambaŭ sencoj, fiksitaj en PV: la versoj estas fikse kaj majstre kunmetitaj el teĥnika vidpunkto, sed pli gravas, ke kelkaj poemoj konvenas ankaŭ al alia signifo de *munti:* t.e. *fiksi juvelŝtonon*, ĉar ili estas ne nur laŭforme perfektaj, sed ankaŭ poeziaj en la vera senco de la vorto.

M. *Fejes*

OBLIKVA KRUCENIGMO KUN KAŜITA PROVERBO

DEKSTREN MALSUPREN:

1 – Finaĵo de la aktiva futuro. 2 – Frakcioj. 3 – Opozicias, kontraŭstaras. 4 – Numeralo – opoj de dek aferoj. 5 – Miksaĵ'el kunfanditaj metaloj – priparolataj aferoj. 6 – Havas delikatan odoron – individuoj. 7 – LA UNUA PARTO DE LA PROVERBO. 8 – Rektangula – lasta vorto de preĝoj – epoko, longa tempospaco. 9 – Pezo de la pakmaterialo – loĝanto de Arabujo – granda rabobirdo. 10 – Nia najbara planed' – virseksa infano – spirebla gasmiksaĵo. 11 – Tre religiemaj, diotimaj – aserto defendata de iu persono – kunliga interplektaĵo de ŝnuroj aŭ fadenoj. 12 – LA DUA PARTO DE LA PROVERBO. 13 – Kaŭzos, instigos – audorganoj. 14 – La prezentejo de cirko – faros ion nedifinitan (familiare, malofta). 15 – Forta teno, apliko de forto sur ion – Universala Kongreso. 16 – Laboras per pioĉo. 17 – Fermil' de akvotubo. 18 – Bildkarto (m11.).

MALDEKSTREN MALSUPREN:

9 – Organiza Komitato (m11.). 10 – Vicmontra numeralo. 11 – Plenaĝa. 12 – Unubranĉa nefermita koniko (Kurbo). 13 – Ago de tiu, kiu movas ion al si, aŭ post si – speco de freneza murdemo. 14 – Paŝas – sufikso de la pasiva prezenca plurala participo – prepozicio, uzata antaŭ distribuaj numeraloj. 15 – Faroj – korinklinis – rivero en Sovetio. 16 – Eksperiment' – akcepti ion kiel veraĵon (rad.) – havos en la mano. 17 – Rilata al reproduktado de libroj aŭ gazetoj – malgrandegule (kriple) – subitaj, komencaj. 18 – En kiun direkton – team' de estroj – aŭdigos bruon kiel fluganta insekto. 19 – Elemento (Br) – infaneto – instrumentoj. 20 – Mola pasto – fekunda loko en dezerto – part(et)oj. 21 – Kemia simbolo de natrio – granda arbara plandmarŝanta besto(mamulo) – grupaj. 22 – Malgranda monkvant' – faras, estas aktiva. 23 – Supera oficiro (preskaŭ generalo). 24 – Daŭre sonanta sono. 25 – Elemento (J). 26 – Anglalingve: „Ne".

HELPILOJ: 14 – Umos. 13 – Amoko

Stano *Marček*



Solvojn oni alsendu ĝis la 1-a de marto 1980.

Ĝusta solvo de la enigmo en n-ro 1979/4: Tridek tri porinfanoj poemoj, Steloj de Eger, La sep reĝidoj.

LIBROPREMION GAJNIS:

Por n-ro 1979/3: Teodoro Löwenkopf, Emek Hayarden, Maagan, Israelo; Z. Hršel, Botanická 28, 602 00 Brno, Ĉeĥoslovakio. *Por n-ro 1979/4:* Voldemars Linta, Riga-16, str. Lemesu 13-30, Latvia SSR, Sovetio; Kovács Lajos, Hajduszoboszló, Török u.5. 4200–Hungario. *Por n-ro 1979/5:* O. Murasko, str. Majakovskogo 58/3, Lvov-17, Sovetio; Ludmila Hubczenko, ul. Sienkiewicza 10 m 8, PL-45-037 Opole, Pollando. La librojn ni jam sendis per poŝto.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

BAZA LITERATURA KRESTOMATIO

1. En unu el la verkoj la heroo fantazias pri „ nigraj diabloj", kiuj vendas „ŝtelitan vinon". Skribu al ni, kio estas la vera profesio de tiuj „diabloj"?
2. Skribu al ni, kio estas la profesio de Kuno Toma?
3. Kiu estas la aŭtoro de la poemo, kies ŝlosila verso estas: *ankoraŭ neniam najtingalon mi aŭdis* -

Oni respondu almenaŭ du el la tri demandoj. Limdato: unu monaton post la apero de tiu ĉi numero.

Ĝustaj solvoj de la demandoj en la n-ro 1979/3: 1. Lódz. 2. ...averti la popolon. 3. Ĉapitro XVIII. Libropremion gajnis: J. Zakrzewski (Pollando). Ĝustaj solvoj de la demandoj en la n-ro 1979/4: 1. Z.Zelk-M.Fejes. 2. S. Weöres: Restigado. 3. Cent forintojn. Libropremion gajnis: J.V. Ivanov (Sovetio).

Korespondi deziras

E-gazetojn kol., duoblaĵojn i.s. Zdenek *Hrsel,* CS-620 00 *Brno* Botanická 28. Certe respondas. – Precipe kun polaj fraŭlinoj deziras kor. *Szőnyi* Tibor (19) studento de altlernejo, H-6423 *Kelebia* Ady Endre ut 144. – Marek *Truszkowski* (18) serioza junulo ktm. serĉas leteramikojn, gejunulojn, bk. ankaŭ por reciprokaj vojaĝoj. PL-09-500 *Gosztynin,* ul. Gabinska 39. – Győző *Gaál* (32) fraŭlo, inters. kolordiapozitivojn, E-aĵojn, gekorespondantojn serĉas el Finnlando, Hispapanio, Grekio, Japanio. Interesoj: vojaĝo, naturo, kutimoj de popoloj, montaroj, grotoj, turismo ktp. H-4031 *Debrecen,* Krónikás str. 6. part.6. – Pri filatelio, numismatiko, bk. Ramon *Astrada,* Argentinio-5900, *Villa Maria* (CBA), Malvinas Argentinas 1475. est. 7. Respondon garantias. – Johano *Brenner* (34) kvalito-kontrolisto ktm, pri turismo, aŭtosporto, kinologio, akvaristiko. Kol. E-aĵojn, aŭto-kolorfotojn. R-4925 *Sighetu-Marmatiei* Piata Libertátii nro 9. – Grzegorz *Ciemny* (24) elektroteknikisto, pri E-movado, geografio, muziko, tekniko. Kol. pm. pri Eo, glumarkojn, E-librojn k insignojn ks. PL-88-100 *Inowroclaw,* ul. Wierzbinskiego 93. – *Dudás* Zoltán (19) abituriento, kripla knabo, lernas lingvojn. Kun samaĝaj, similaj knabinoj prefere. Jugoslavio, 14000 *Subotica* Fred. Sopena 74. – Instruistino Vija *Granta* (39) kun ges-anoj de ĉiuj aĝoj, kol. bk, de floroj, vidindaĵoj. Gvidas *Infanan E-Klubon* (10-15) ankaŭ dez. kor. kun infanoj, studentoj. SU-Latvio, 229-161, *Pociems* Limbazu Rajons 8-grad.skola. – Bronislavo *Fras* (30) fraŭlo, int. pri E-movado, turismo, geografio, lingvoj, kol. bk. Ankaŭ ĉehe, slovake, ruse, PL-32-511 *Jaworzno,* ul. Jasminowa 27d-48.

Leterkesto

Ramon Molera, Hisp., Moyá/Barcelona: Certe multaj envios vin eksciante, ke vi legas ĉiujn revuojn de Esperantujo. Des pli pezas via afabla konsidero, ke inter la plej interesaj nuntempaj E-revuoj trovi-ĝas HV kun tre bonstila, valora kultura enhavo. Tial via fiereco: la kompleta kolekto de HV! Vian laŭdon pro modesteco kontraŭdiri – certe ŝajnus tre malmodesta ago, do akceptu simple dankeman manpremon!

Ferenc Tót, H, Debrecen: *„Kial tusi la netuŝeblan?* vi demandas aludante al la Fundamento kun amara sento kontraŭ freŝaj elkovadoj de „propra" *ortografio*. Ankaŭ ni vidis-legis ie-tie presitajn proponojn por solvi la plej-plej urĝan kaj kernan problemon de la movado, pri la supersignitaj literoj. Car la novigemuloj pretendas ŝparon por presejoj kaj tajpiloj, *vi konsilas al ili* imagi la *francan*, kiel internacian lingvon! Tuj ili trovos sin en ega embaraso – eventuale bezonante reformi la francan literaron – pro la 12 supersignitaj literoj kaj 1 subsignita.

Martha Walker, Usono: Bedaŭrinde, via aserto ne estas disputebla, nome, ke tro ofte niaj originalaj aŭtoroj estas forgesitaj dum la tempopaso. Tamen nur unu el ties kaŭzoj estas – la cetere agrabla fakto – ke „tiom da E-aĵoj glitas nun ĉirkaŭ la terglobo". Pro tio vi tiras plian atenton al la *Baza Literatura Krestomatio*, ĉar ĝi konigas verkistojn, kiuj por multaj restus nekonataj. Vi trovis precipe taŭge por kursoj, klubdiskutoj ĉerpi el ĝi frandaĵojn de la romanfragmentoj aŭ de la poemoj, gustumi ilin lingve kaj arte. Multajn plezurojn dum via kutima legado!

Walter Zelazny, PL, Zarzecze: Bonvenaj estas viaj instigoj koncerne nian redaktadon: por teni la *intelektan* nivelon necesos pli da interlingvistikaj temoj: por daŭrigi la *modernecon* de la revuo, ni ne timu ankaŭ la sekson! Komprenite. Nu, niaj redakcianoj sincere konfesis antaŭ la severa rigardo de la ĉefredaktoro, ke ili – geviroj – neniam timis la sekson, almenaŭ duope...

Glauco Corrado, I, Milano: En la informoj pri viaj nombraj E-kursoj aparte plaĉis io speciala, t.e. ilia kunligo kun familiaraj bicikloekskursoj kaj konkuroj. Sekve ne nur plezurdona praktikado, sed ankaŭ allogo de junuloj akompanas tiun sukcesan movadan formon: vere tre lerte! Amikan dankon pro la entuziasma propagando por HV eĉ en Trieste.

„Observanto", H: en nia nro 79/1. vi prave rimarkis nekorektaĵojn – sinceran dankon! Sur p.12. devus stari „okuloj *kiel* antaŭe" aŭ „kiel iam". En tiu traduko vere iom svarmis la monotona *ad* sufikso, ĝi estis pli variinda. Gluanta (=glua) aŭ glueca *pano* ŝajnas preferindaj por la kompreno, kvankam *glua* estis korekta, kaj per ĝi eblas „eliri *tra* la pordo" pli ĝuste. – Kelkaj rimarkoj montras iomete malatenton al elasteco. La Fundamenta *zumi* ne kongruas kun murmuri, voĉbrui (viaj proponoj): malamikan armeon eblas rebati, forpeli, repuŝi, forbati, dum batalo neniigi, disbati ktp. „Geidoj" tie aludas al iomete malpli valoraj ol „infanoj", kvazaŭ mallaŭdante ilin. Ŝultron eblas jen faletigi, subigi, jen retiri, malsuprenigi, mallevi... dependе de loko kaj gusto! Tempo pasas, lingvo ŝanĝiĝas iom post iom, ĝi nek rajtas, nek povas rigidigi dum cirkonstancoj moviĝas. (Temas kompreneble pri la „kutimaj" esprimmanieroj.) Tio kaŭzas, ke foje – je nia bedaŭro – malnovaj *neologismoj* (friska, lanta sur p.14.) restis ne glositaj tie, kie alia vorto ricevis gloson. – Nu, *bruon imitantaj* vortoj (onomatopeoj) de ĉiuj lingvoi, kutime, prezentas ian distron, precipe se pro malofte uzata tia vorto rompas al si kapon la kara leganto. (p.23.). Daŭre ni atendas viajn observaĵojn!

Bärbel Kulisch, GDR, Frankfurt/Oder: Se vian (ankaŭ ĉe kolegoj) intereson vekis jubilea prezentado en Berlin far *P.A.Rados* pri la Hungarlanda Konsilia Respubliko, ni rekomendas por pliaj konoj libron: HEA reeldonis post duonjarcento „133 TAGOJ". Siatempaj artikoloj kaj rememoroj pri tiu proleta ŝtato, la dua en la mondo, igas facile tiri surprize multe da respektindaj konkludoj por la nuna tempo.

Cv. Todorov, BG, Ŝumen: En ĉi tiu numero ni publikigas la artikolon pri la *Muzeo Kossuth* en Ŝumen. Dankon al via rondo „Vekiĝo" ankaŭ pro la enmuzea eksponado de nia numero pri Lajos Kossuth:

Zbigniev Lepieszkiewicz, PL, Koszalin: Alvenas ofte similaj opinioj pri la eble longa serio *pri medio kaj akvo*, kio por vi „tute ne estas teda, sed tre dezirata", i.a. pro unikaj observoj en ĝi troveblaj. Via inklino al la personeco de Gy. *Krúdy* komprenigas, kial al vi plaĉis pleje la nro 78/4 al vi. Konsentite. – Bedaŭrinde jam ne estas troveblaj la instruaj faldfolioj de T. *Ujlaky-Nagy*.

Georgi Simeonov, BG, Vidin: Via propono estas pripensinda: eldoni *en volumo* la rakontojn kaj novelojn aperintajn en HV dum ĝiaj 19 jaroj. Precipe novaj abonantoj bezonus ĝin, laŭ via opinio, kiuj – eble pro juneco – ne havas ĉiujn jarkolektojn, kiel vi fidela abonanto ekde la komenco. Koran dankon!

HUNGARA VIVO

Cefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits** * Cefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H—1368 Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96—162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) **Ft** 66,- - al eksterlando por unu jaro 78,- forintoj * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H—1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,—Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. – 80-7024 Somogy megyei Nyomda Responda gvidanto: Béla Farkas, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 0018—7704.**

Lingvolecionon de instruisto, sinekzercon per magnetofono



Ĝin produktas:

Budapesti Rádiótechnikai Gyár

1033 Budapest Polgár u. 8-10.
Telefono: 682-080

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

BÁV

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért